


ESTONIA ANTOLOGIO



ESPERANTO-ASOCIO DE ESTONIO

T A L L I N N * 1 9 3 2

ESTONA ANTOLOGIO I

ELDONO DE

ESPERANTO-ASOCIO DE ESTONIO

*T A L L I N N * 1 9 3 2*

Tiel pasis pluraj jaroj. La plano ŝajnis neniel efektivebla pro manko de monrimedoj. Tamen en la korfundo de la iniciatintoj ĉiam brulis fajreroj de espero, kiujn de tempo al tempo nutradis jen ĉi-rilataj informpetoj, jen notoj en la estona gazetaro, varme subtenantaj la ideon pri eldono de estona antologio en Esperanto. Ree la direkta komitato ekserĉis rimedojn por la efektivigo de la longjara revo kaj trovis ilin en la decido eldoni la grandan verkon povolume, kio signifus faciligon kiel por la eldonanto tiel ankaŭ por la aĉetanto. Ĉar tiamaniere la revo iĝis pli proksima al la realeco, ektriviĝis ankaŭ oferemaj gesamideanoj, konsentantaj prunti la komence necesajn sumojn; samtempe Esperanto-Asocio de Estonio akceptis la proponon iĝi la oficiala eldonanto de la antologio. Kaj nun do fine la estona antologio povas aperi.

Nian plej koran dankon ni esprimas ĉi tie al la estonaj verkistoj, al la tradukintoj, al la verkintoj de la konspekto pri la estona literaturo kaj al ĉiuj, kiuj en ia maniero partoprenis la laborojn, ligitajn kun la eldono de la antologio.

La 15.10.1932.

Direkta komitato.

MALLONGA KONSPEKTO PRI LA ESTONA LITERATURO

N. ANDRESEN kaj A. ORAS.

I.

La estona literaturo apartenas al la plej junaj en Eŭropo: tiu ĉi okcident-finna popoloeto sur la orienta bordo de la Balta maro ektriviĝis en tiaj historiaj cirkonstancoj, kiuj por longa tempo prokrastis la estiĝon de ĝia spirita kulturo. Kiam la germanaj glavordenanoj kaj la taĉmentoj de la dana reĝo en la komenco de la 13-a jarcento submetis la landon, kiu hodiaŭ formas Estonion, ĝia popolo estis ankoraŭ sur la nivelo de sia primitiva kulturo — la skrib-arto ne estis ankoraŭ konata tie ĉi. La invado de la fremduloj metis la tutan indiĝen-popolon de la lando en la staton de submetita plebo, kaj baldaŭ, post longaj senesperaj bataloj por la libereco, la indiĝen-popolo de la lando, la tuta estone parolanta loĝantaro, estis sklavigita. Ĉar la tuta popolo senescepte estis sklavoj de la germanlingva nobelaro, tial ankaŭ la altrudita kristanismo kapablis akceli nek ŝanĝigon de la kulturbazoj nek estiĝon de literaturo.

Vere, la komenciganta protestantismo estis en la 17-a jarcento kreinta estonan eklezian literaturon. Sed nur en la fino de la 18-a jc. — kiam la lando jam estis fariĝinta parto de la rusa cara imperio — kelkaj germanoj-pastroj ekkuraĝis pro la racionalismo, kiu sin etendis el Okcident-Eŭropo ankaŭ tien ĉi, krei laikan kamparanan legmaterialon — moraligajn kaj instruajn rakontojn. Ĝuste tiaj filantropaj germanaj inteligentuloj zorgis pri la unuaj paŝoj de la popola literaturo, ĝis kiam ilian laboron iom pli profundeme ekdaŭrigis jam unuopaj estonaj inteligentuloj, saviĝintaj el la sklaveco.

Por viviĝi sian ĉiutagan pezan laboron, por esprimi siajn plej intimajn sentojn, la sklavigitaj estonoj havis neniun rimedon krom popolkantoj, bazantaj sin sur longjara tradicio kaj havantaj apartkarakteran metrikon kaj poetikon. La parte epikaj, sed precipe lirikaĵoj kantoj uzas formon, kiu kutime en tradukoj

estas transdonata per kvarpieda trokeo, sed kiu fakte estas skandebila versmezuro, kalkulanta la kvanton de sonoj, pri kies varieco doni imagon en traduko estas malfacile. Aliteracio kaj paralelismo ludas en tiuj kantoj grandan rolon. Ĉiuj okazajoj de la simpla vivo de la estono respeguligas en ĝi jen en potence ŝvelantaj, jen subtile ludemaj versoj, en kiuj melankolio kaj humoro estas reprezentitaj kun preskaŭ egala abundeco. Speciale rezulte de kolektadoj, aranĝitaj dank' al klopodoj de D-ro Jakob Hurt, prof. M. J. Eisen kaj en pli malfruaj tempoj prof. W. Anderson kaj D-ro O. Loorits, la notitaj trezoroj de la estona folkloro iĝis tiel grandaj, ke nur malmultaj popoloj en Eŭropo havas ion similan por montri.

La plej malnova estona beletristiko — en la nuntempa senco de la vorto — limiĝas per la nomo de Kristjan Jaak Peterson (1801—1822). Tiu ekster sia hejmlando (en Riga) kreskinta junulo revis jam pri literaturo en sia kamparana lingvo, kaj en unu kanto li demandas:

„Kial lingvo de ni
Eterniĝon al si
En kantoflam', flagranta
Ĝis ĉiel', ne penu akiri do?“

Sed Peterson mortis kiel juna studento, antaŭ ol la estona popolo, en tiuj jaroj jam liberigita de la persona sklaveco, sed ekonomie ankoraŭ restigita sklavaro de la grandbienuloj, evoluis ĝis la uzado de beletristiko. Eĉ la malmultenombraj versaĵoj de Peterson estis presitaj en unu kolekto nur 100 jarojn post la morto de la juna poeto.

Post kiam la aŭtoroj de kelkaj didaktikaj rakontlibroj kaj Otto Villem Masing (1763—1832) per la unua estona semajna gazeto, de ili eldonita, kaj lia posteulo Johann Voldemar Jannsen (1819—1890), denove per gazeto, estis instruintaj la popolon legi, nur tiam estis kreita grundo por beletristiko. Sed la unua rimarkinda literatura verko ne estis ankoraŭ difinita por la popolo tiom, kiom por eksterlandanoj.

Friedrich Robert Fählmann (1789—1850) kreis aron da mitaj rakontoj, kiuj laŭ lia aserto devenis el la popolo. Sed fakte ili estis frukto de la fantazio de Fählmann, kvankam parte laŭ malmultaj folkloraj rudimentoj. Ili estis kreitaj kun la celo kredigi al la scienca mondo kaj la eksterlandaj inteligentuloj, ke la estona kamparanpopolo estas kulturacio. Tion sekvis la kompilado de l' epopeo „Kalevipoeg“ (Kalevido) de Friedrich Reinhold Kreutzwald (1803—1882); ankaŭ

Kreutzwald mem kreis la figuron de l' heroo kaj la formon de l' epopeo, sed li uzis por la kompilado de la verko grandparte folkloran materialon en senpera aŭ prilaborita formo.

II.

„Kalevipoeg“ aperis en 1861. Tiu verko fariĝis la unua angustiono de la estona literaturo: en la sama tempo, paralele kun la ekonomia liberiĝo de parto de la kamparanoj el la perforto de la grandbienuloj, estiĝis ampleksa nacia movado inter la kamparanoj. Nome parto de la kamparanoj, ĝuante fiksitan monan farpagon anstataŭ la antaŭa natura kaj labora, povis akiri al si per la altiĝo de l' prezoj de la terproduktoj certan emancipon, kiu pligrandigis poste, kiam la grandbienuloj komencis vendi la farmbienojn. Guste la terposedantoj formis resonsurfacon por la nacia movado, iniciatita de la malmultaj inteligentuloj. Ideologian bazon al tiu movado liveris la koncepto, ke la estona popolo antikke estis granda kaj kultura kaj ke nur la sklavigo de la popolo per la fremdaj landkonkiritoj malprogresigis la popolon en ĝia kultura evoluo.

„Kalevipoeg“ kunhelpis subteni la koncepton pri la iama grandeco de la estonoj, bazita de l' radikala popolgvidanto Carl Robert Jakobson (1841—1882; konsiderebla ankaŭ kiel verkisto: li kreis unu dramon pri la klas-antagonismo inter la kamparanoj kaj nobelaro, kaj kelkajn versaĵojn). La tiama ĝenerala opinio, ke „Kalevipoeg“ estis iam kreita buŝe kiel tutajo kaj estis konata al la tuta popolo, pligrandigis la nacian memfidon. Ĝi estis grava rimedo, kiu ebligis al C. R. Jakobson kiel radikala kamparan-gvidanto organizi fortan kontraŭnobelan batalon. Malgraŭ tio, ke la alia populara gvidanto dum la tempo de la nacia revekiĝo, J. V. Jannsen, okupis kun la granda folkloristo D-ro Jakob Hurt la pozicion de kristana pacemo, la revekiĝa tempo estis jungita ĉefe al liberiĝo de la klaso de kamparanoj el la politika kaj ekonomia influo de l' nobelaro, kaj „Kalevipoeg“ kune kun la legendo pri la granda pasinteco de Estonio fariĝis la standardo, ĉirkaŭ kiu estiĝis la radikala kamparana naciismo, vere, iom amika al la rusa cara registaro, en kiu la tiutempaj malmulte evoluintaj popolgvidantoj vidis akcelanton de la batalo kontraŭ la grandbienuloj.

La literaturo, kiu estiĝis dum tiu revekiĝo de la kamparanpopolo, havis sian grandan socian valoron. Tamen la ceteraj verkoj de la aŭtoro de „Kalevipoeg“ F. R. Kreutzwald estas ekster tiu batalo, kaj tiu grandulo prezentas el si ne nur unu

el la unuaj estonaj inteligentaj personecoj, sed ankaŭ unu el la plej bonaj estonigantoj de la germana literaturo. Li tradukis aron da poeziaĵoj de Goethe, Schiller, Bürger, Lenau, Hauff kaj Heine, adaptis kaj faris akceptebla por la estona kamparana leganto „Das Leben des vergnügten Schulmeisterlein Maria Wuz im Annenthal“ de Jean Paul (malgraŭ tio ne malaltigante ĝian artan valoron); tradukis kaj transplantis en la estonajn cirkons-tancojn „Buddha“ de J. W. Widman, kreante per tio grandajn verstradiciojn. Sed liaj originalaj verkoj ne apartenas al bele-tristiko — ili havas popular-sciencan karakteron.

Lydia Koidula (1843—1886), filino de la popolgvidanto kaj ĵurnalisto J. V. Jannsen, metis fundamenton al la estonaj liriko kaj teatro. Siaj patriotaj kaj prinaturaj versaĵoj ĉiam pli kaj pli stimulas la kolektigintojn ĉirkaŭ la estona nacia stan-dardo — kaj eĉ ĝis hodiaŭ ili restis senkomparaj en la fako de la patriota liriko. Kiam la kreskanta enurbigado de la estonaj kamparanoj preskaŭ ebligis ankaŭ teatron, L. Koidula faris la unuan — kvankam mallongdaŭran — provon per ĝi, verkante kaj estonigante mem ankaŭ kelkajn teatraĵojn, el kiuj unu — „Säärane mulk“ —, traktanta la lokajn kaj pro la aĉetado de la farmbienoj estiĝintajn antagonismojn inter la estonoj, gajnis grandan popularecon kaj fariĝis fundamento de la sekvanta dramliteraturo.

III.

En la lastaj jardekoj de la pasinta jarcento aperis en la estona liriko apud L. Koidula alia poetino, Anna Haava (1864), kies patriota kaj ama liriko estas daŭrigo de la poezio de l' unua. La milda, reva tono de ŝia liriko estas forte influita de la samtempa germana poezio, sed en siaj plej bonaj momentoj trovas Haava proprajn, originalajn kolorojn, precipe en la am-kantoj. Ĉe ŝia personeco tute mankas akreco, ĝi estas virine sentema kaj sindone impulsema. Kiel tradukinto de Shakespeare kaj Goethe havas Haava taksindajn meritojn.

Karl Eduard Sööt (1862) estas poeto, kies loko estas inter la sentimentalema liriko kaj romantika baladiko de la 19-a jarcento kaj la simbolismo de la fino de la sama jarcento. Sed li sukcesas iufoje ankaŭ rilate al facilaj ŝercaj notoj, kvankam plej ofte li inklinas al melankoliaj meditadoj.

Sed pli rimarkinda estas en la sama tempo la evoluo de la beletristika prozo. Jakob Pärn (1841—1916) montris per siaj duone publicistaj noveloj al la estona popolo la direktojn de ĝia ekonomia evoluo. Sed la ceteraj verkistoj de tiu tempo

deturniĝis de la estanteco. La juna E. Bornhöhe (Eduard Brun-berg, 1861—1923) la unua kreis la tradicion de historia rakonto per du heroaj kaj aventuraj rakontoj pri la bataloj de la estonoj por la libereco en la 14-a jarcento. Post li Andres Saal (1860—1931) verkis serion da sentimentaltaj rakontoj pri la tagoj de la invado de la germanoj kaj danoj kaj la alporto de la kristanismo. Eĉ August Kitzberg, pri kiu temos malsupre, komencis sian literaturan agadon per historia rakonto.

Tiuj historiaj rakontoj, kvankam multe populariĝintaj, ne prezentis historian veron kaj literaturajn gajnojn. Tial ilia sola merito estas, kaj nome de la rakontoj de Bornhöhe, ke ili rememorigis tiel al la kamparanoj kiel al la freŝa proletaro la historian maljuston de la german-devena nobelaro, kaj per tio akcelis la socian batalon. Al la verkoj de A. Saal mankas eĉ tiu valoro.

August Kitzberg (1856—1927), laŭ la tono iom sentema, sed samtempe ankaŭ abunde kaj bonvole humorista, prezentas en multaj rakontoj, traktantaj la popolan vivon, memorindajn tipojn. Li estas verkisto plenviva, kvankam evitanta akutan naturalismon. Sed lia ĉefa merito estas tamen liaj teatraĵoj, el kiuj la tragedio „Libahunt“ (Luphomo) staras certe en la unua vico. Heroismo, romantiko de la pasinteco, kutimoj de la popola superstiĉo kaj la sufiĉe konsekvenca traktmaniero de la psiko-logiaj problemoj faras el tiu teatraĵo interĉenon inter la tempo de Kreutzwald-Koidula kaj la nova realista epoko. Kiel talenta felietonisto Kitzberg alportis dum jardekoj al la estona gazetaro refreŝigan humoron.

Unu el la plej interesaj kaj tragikaj figuroj en la estona literaturo estas Juhan Liiv (1864—1913), lirikisto kaj novel-isto. Liiv pasigis sian vivon kiel vegetanta ĵurnalisto, kiu neniam sukcesis materiale sin sekurigi. Lia maltrankvila, malsana spirito ne permesis al li efektiviĝi iajn grandajn taskojn. La ĉiutaga porpana laboro kaj la neŭrozaj revoj konsistigis la plej grandan parton de lia vivo. Sed ĝuste la neŭrozo — kiu poste evoluis je frenezo — inspiris al li multe da versaĵoj, plenaj je vizioj, profundaj travivaĵoj kaj intima natursento. La simplaj stilaĵoj de Liiv tamen ne malhelpis al li fariĝi la plej individua poeto de sia tempo, en kies versoj esprimiĝas melankolia, pasia, pensema animo. Lia populara intimeco faris lin unu el la estonaj favorat-poetoj, kiu donas animon kaj koloron al la monotona naturo de la hejmlando. La noveloj de Liiv estas laŭ la strukturo primitivaj, sed la ĝojojn kaj zorgojn de la ĉiutaga vivo de la vilaĝanoj li scipovas priskribi pli lerte ol iu lia sam-

tempulo. Lia pli aĝa frato Jakob Liiv (1859) inklinas al pli formala, klasicista poezio, kaj la malvarma formkulto, kiu sin tie esprimas, helpis turni la ĝeneralan atenton al la teknikaj problemoj de la poezio.

Opozician spiriton kaj kritikemon respegulas la simple kaj naturalisme pentritaj verkoj de Ernst Peterson (1868). En la plejparto de ili li malkaŝe priskribas la mallumajn flankojn, la „abscesojn“ de la kampara vivo.

Kiel traktanto de la kampara, precipe marborda vivo estas atentinda Jakob Mändmets (1871—1931), antaŭ ĉio en la noveloj, kiuj ne estas pretendemaj, sed montras fundan kaj simpatiantan konon de la traktaĵo kaj bonan, popularan rakont-talenton. Problemojn ne havas Mändmets multajn, sed ilian mankon kvitigas lia scipovo freŝe kaj spontane speguli la vivon.

IV.

Ĝis la komenco de la nuna jarcento la diferencigo en la estona popolo estis bone progresinta. Parta proleto de la kamparanoj kaj ekapliko de maŝinoj en la grandaj terkultivejoj elpuŝis multajn homojn el la lando — devigis ilin fariĝi laboristoj kaj terkultivistoj ne nur en la vasta rusa imperio, sed eĉ en Ameriko kaj aliloke. Samtempe ankaŭ en la urboj de la propra lando (Tallinn kaj Narva) evoluis grand-industrio.

Reflektanto de la nova socia progreso en la estona literaturo fariĝis Eduard Vilde (1865). En la familio de grand-biena oficisto Vilde povis akiri ian kleron, kaj jam kiel 18-jara junulo li ekverkis rakontojn kaj romanojn, proksimume en la sama spirito kiel liaj modeloj en la germanaj familiaj gazetoj. Sed kelkjara restado en Berlino malfermis al Vilde novan mondon: en kontakto kun la tiam moderna naturalismo malfermiĝis al li ankaŭ la socia batalo, kaj en 1896 li aperigis la unuan pli longan novelon, kiu fariĝis fundamento por la estona literaturo: ĝi estis „Külmale maale“ (Al malvarma lando — Siberio), priskribo de sociaj antagonismoj de la vilaĝo, kie, vere, en la modlado de ideala vilaĝa knabino estas iom da spirito de Dostojevski. La teruraj vivkondiĉoj de la laboristoj en la Narva teksfabriko liveris al li materialon por la „estona Germinal“, la pesimista laborista romano „Raudsed käed“ (Feraĵ manoj).

Dum la ŝanĝo de l' jarcentoj Vilde komencis sian grandan roman-trilogion pri la ribeloj de la kamparanoj en la mezo de la 19-a jarcento. Dum li en la unua romano „Mahtra sõda“ (Milito en Mahtra) kaj en la dua „Kui Anija mehed Tallinnas

käisid“ (Kiam la viroj de Anija venis al Tallinn) vidis ĉefe personajn vilaĝantragikojn en la senespera batalo kontraŭ la nobelaro, subtenata de la rusa carismo, la lasta libro „Prohvet Maltsvet“ (Profeto Maltsvet) fariĝis potenca historia priskribo, kies heroo estas la estona kamparana klaso el la tempo de la servuto.

La vigla fantazio, akra observemo, facile fluanta rakont-maniero kaj la stilo de Vilde, kiu precipe en liaj lastaj verkoj, ekzemple en la romano „Mäeküla piimamees“ (La laktisto de Mäeküla) fariĝis tre kompakta kaj kolorriĉa, faras lin senkon-testeble ĝuinda kaj arte konsiderinda verkisto. Rilate al la populareco li superas ĉiujn aliajn estonajn prozistojn kaj en sia tre ampleksa verkaro li spegulis multajn flankojn de la estona vivo.

Ankaŭ kiel teatra verkisto Vilde produktis rimarkindajn verkojn, speciale en la fako de la komedio. Lia komedio „Pisuhänd“, malgraŭ la multaj postaj sukcesintaj provoj verki realistajn komediojn, estas ĉiam ankoraŭ la plej bona verko de tiu fako, sprita, klare konstruita kaj kun interesaj, vivaj tipoj.

Vilde komencis kiel popola verkisto, kaj ankaŭ liaj postaj verkoj estas ĉiam ankoraŭ kompreneblaj por la popolo, sed la rafinita gusto kaj virtuoza vort-arto, kiu esprimiĝas en ili, ebligas al li, la patriarko kaj grandmajstro de la estona prozo, konkuri kun ĉiuj liaj pli junaj samtempuloj, pri kiuj temos en la sekvontaj partoj de la antologio.

Tradukis H. Seppik.

FABELOJ KAJ FOLKLORO

LA KREADO

Prapatro¹ loĝis en alta ĉielo; sub ĝia tegmento brilis bela suno. Kalev'ojn² li estis kreinta por uzi iliajn konsilon kaj forton. La plej aĝa el ili estis Vanemuine. Prapatro estis kreinta lin maljuna, kun grizaj haroj kaj barbo, kaj doninta al li la saĝecon de l' maljuneco; sed lia koro estis juna, kaj al li apartenis kapablo de poezio kaj kanto. Prapatro atentadis liajn saĝajn konsilojn. Kiam zorgoj sulkigis la frunton de Prapatro, Vanemuine ludis antaŭ li belsonan harpon kaj kantis ĉarmajn kantojn.

La dua estis Ilmarine, en plej bona vira aĝo, kun vireca forto; saĝo vidiĝis de lia frunto kaj profundaj pensoj el la okuloj. Al Ilmarine apartenis kapablo de artoj.

La tria estis Lämmeküne, vigla junulo, plena je ŝerchumoro, ĉiam ĝoja kaj preta por petolado.

La ceteraj estis malpli gravaj. Ili ĉiuj konsideris unu la aliajn kiel siajn fratojn, kaj Prapatro nomis ilin siaj infanoj. Ili loĝis en Kaljuve aŭ Kaljuvald³.

Foje Prapatro paŝis antaŭ la Kalev'ojn kaj diris: „Laŭ mia saĝeco mi decidis krei mondon.“ Mirante la Kalev'oj ekrigardis lin kaj diris: „Kion vi decidis laŭ via saĝeco, ne povas esti malbona.“

Dum ili dormis, Prapatro kreis la mondon, kaj kiam ili leviĝis, ili frotis la okulojn kaj mire rigardis tiun ĉi faritaĵon. Sed Prapatro estis laca de sia krelaboro kaj kuŝiĝis por ripozi. Tiam Ilmarine prenis pecon de plej bona ŝtalo, kurbigis ĝin, etendis ĝin tende super la tero kaj alfiksis al ĝi la brilantajn stelojn kaj la arĝentan lunon. El la vestiblo de Prapatro li prenis lumigilon kaj alfiksis ĝin en miriga maniero al la tendo, tiel ke ĝi mem leviĝas kaj subiras. Bonhumore Vanemuine prenis sian harpon, ekludis ĝojmuzikaĵon kaj saltis sur la teron,

KELKAJ NOTOJ PRI LA PRONONCADO EN LA ESTONA LINGVO

1. La akcento estas ĉiam sur la unua silabo.
2. La litero **i**, sekvanta vokalon, estas prononcata kiel la Esperanta **j**, **u**, sekvanta vokalon, kiel la Esperanta **ŭ**. Kunmetitaj vortoj prezentas escepton.
3. Du apudaj vokaloj servas por plilongigo de la vokalo.
4. La literojn **ä, õ, ü** oni prononcu kiel en la germana lingvo, la literon **ö** iom simile al la rusa „у“.
5. La litero **s** estas sono inter la Esperantaj **s** kaj **z**.
En ĉiuj aliaj okazoj la estonaj literoj estas prononcataj samkiel en Esperanto.

¹ La estonoj nomis sian ĉefdion Uku, Taara aŭ Vanaisa (Avo, Maljunpatri, Prapatro).

² Kalev — giganto.

³ Hejmlando de la Kalev'oj.

kaj la kantbirdoj sekvis lin. Kie ajn lia saltanta piedo tuŝetis la teron, ekaperis floroj, kaj kie li kantis, sidante sur ŝtono, el la tero elkreskadis arboj, kaj la kantbirdoj flugadis sur la branĉojn de la arboj kaj kantis kune kun li. Lämmeküne ĝojvagis en arbaroj kaj montoj.

Prapatro vekigis pro tiu ĉi bruo kaj ekmiris, ke la mondo fariĝis tute alia, ol li estis kreinta ĝin. Li diris al la Kalev'oj: „Tiel estas prave, infanoj! Mi kreis la mondon simpla, ne prilaborita; estas via afero ornami ĝin per beleco. Mi volas baldaŭ plenigi la mondon per diversaj bestoj, kaj tiam mi kreas homojn, kiuj regu la mondon. Sed la homon mi volas krei malforta, por ke li ne povu fanfaroni pri potenco. Vi devas amikiĝi kun la homoj, kaj miksu vin inter ilin, por ke naskiĝu gento, kiu ne cedu facile al malico. Malicon mi ne volas malaperigi; ĉar ĝi estas mezurilo de bono kaj instigilo al ĝi.“

Eĉ nun Vanemuine sendas siajn sendatojn sur la teron, por ke la homoj ne forgesu la kantadon; sed la koroj de la estonoj estas tro pezaj por senti ĝojon pro la gajaj melodioj; tamen ili fidis la promeson, ke Vanemuine revenos mem, kiam feliĉo ree regos sur la kampoj de Estonio.

Laŭ M. J. EISEN
tradukis Helmi Dresen.

LA ESTIĜO DE EMAJŬGI¹

Prapatro estis kreinta la mondon kaj sterninta ĉi tiun bluegan firmamenton kun la brilantaj steloj kaj lumeganta suno. Sur la tero kreskis kaj plimultiĝis vegetaĵoj, kaj bestoj sentis ĝojon pri la vivo. Sed la bestoj ne obeis Prapatron; ili komencis malami kaj persekuti unu la alian. Foje li kunvenigis ilin ĉiujn kaj diris al ili jene: „Mi kreis vin, por ke ĉiu sentu ĝojon pri la vivo, kaj vi komencas malami kaj mortigi unu la alian. Mi vidas, ke estas necese havigi al vi reĝon, kiu regu kaj flegu vin. Por lia akcepto vi devas fosi al li riveron, por ke li amuzu sin sur ĝiaj bordoj; sed la riveron vi fosu vere profunda kaj larĝa, por ke ĉiuj malgrandaj bestoj havu lokon en ĝi. Emaĵgi estu ĝia nomo. Nur ne disjetu la teron, sed amasigu ĝin, kaj mi kreskigos sur ĝi belan arbaron, kaj tie vivu via reĝo. Ankaŭ herbejoj kaj valoj troviĝu en ĝi, por ke

¹ Patrinarivero.

li tie estu ŝirmita kontraŭ vento, malbona vetero kaj suno. Mi vidas vin ĉi tie multnombre; ĉiu konas sian forton; rapide al laboro!“

Prapatro foriris de la ĉeestantoj, kaj ĉiuj iris tuj al laboro. Leporo kaj vulpo mezuris la riverlokon: la leporo saltis antaŭe, la vulpo postkuris, kaj ĝia vosto posttreniĝis, tiel montrante, kie troviĝu Emaĵgi. Talpo plugis la unuan sulkon, melo laboris en la profundo, lupo skrapis, urso portis, hirundo kaj aliaj birdoj ĉiuj laboris.

Kiam la rivero estis pretfosita, Prapatro venis por rigardi la laboron. Li estis kontenta pri ĉio. Li laŭdis ĉiun laborinton. „Talpo kaj urso, vi, ŝajne, plej diligente laboris, ĉar vi estas tute malpuraj; bone, ĉi tiuj malpuraj vestoj restu por vi memor-aje honorvestoj; vi, lupo, multe laboris per la nazo kaj piedoj, — vi do havu nigrajn nazon kaj piedojn. Sed kie estas la kankro? Ordinare ĝi estas fervorulo, kaj ĝi havas multe da manoj; ĉu ĝi dormis?“ La kankro estis ĵus elrampinta el la koto kaj ofendiĝis, ke Prapatro ne rimarkis ĝin; malkontente ĝi vokis: „Maljunulo, kie estas viaj okuloj, ke vi ne vidis min? Ili estas ĉe vi, ŝajne, malantaŭe!“ — „Vi arogantulo,“ estis la respondo, „viaj propraj okuloj troviĝu de nun malantaŭe.“ Kiam Prapatro finis ĉi tiun punadon, li ekvidas dandon, kiu flugas de branĉo al branĉo, briligas sian belan kostumon en la sunlumo kaj fajfas senzorgan kanton. „Danda oriole,“ li vokas, „ĉu vi havas nenion alian por fari, ol ornami vin?“ — „Maljunulo,“ respondis ĝi, „la laboro estas malpura; mi ne volas difekti mian orkolore flavan jakon, nek malpurigi mian arĝent-koloran pantalonon, — kion vi mem dirus pri ĉi tio?“ — „Dandaĉo!“ ekkrias la maljunulo zorgoplene, „de nun vi havu nigran pantalonon, kaj pune vi neniam rajtas kvietigi la soifon el rivero, sed vi devas trinki akvogutojn de sur folioj kaj vi devas gajajn kantojn fajfi nur, kiam la aliaj bestoj kaŝas sin kaj timas la alproksimiĝantan fulmotondron.“

La rivero estis nun preta. Prapatro enverŝis el sia orpelo la akvon, vivigis ĝin per sia spiro kaj difinis, kiudirekten fluu la akvo.

Ĉi tio estis la estiĝo de Emaĵgi kaj ĉi tio okazis dum ĝia fosado.

Laŭ M. J. EISEN
trad. Agnes Nii.

KOIT¹ KAJ HĀMARIK²

Ĉu vi konas la lampon en la vestiblo de Prapatro? Nun ĝi estas malleviĝinta kaj tie, kie ĝi malleviĝis, strioj brilas sur la ĉielo, kaj lumrebrilo jam penetras orienten, kie ĝi baldaŭ devos en sia tuta belo saluti la tutan naturon. Ĉu vi konas la manon, kiu akceptas kaj sendas al ripozo la sunon, kiam ĝi estas fininta sian vojaĝon? Ĉu vi konas la manon, kiu rebruligas la estingiĝintan sunon kaj igas ĝin komenci novan vojaĝon sub la ĉiela tendo?

Prapatro havis du fidelajn geservistojn de tiu gento, al kiuj estis donita eterna juneco, kaj kiam la lampo la unuan vesperon estis fininta sian vojaĝon, Prapatro diris al Hāmarik: „Al via zorgo, filineto, mi donas la malleviĝintan sunon. Estingu ĝin kaj gardu ĝin zorge, por ke ĝi ne kaŭzu malbonon.“ Kaj kiam la sekvantat matenon la suno estis rekomencanta sian novan vojaĝon, Prapatro diris al Koit: „Via ofico, fileto, estu rebruligi la lampon kaj prepari ĝin por nova vojaĝo.“ — Fidele ambaŭ plenumadis sian devon, kaj neniun tagon la lampo mankis sur la ĉiela firmamento, kaj kiam ĝi vintre iras apud la rando de l' ĉielo, ĝi estingiĝas vespere pli frue kaj komencas matene pli malfrue sian vojaĝon; kaj kiam ĝi printempe vekas florojn kaj kanton kaj somere maturigas per siaj varmegaj radioj la grenon, al ĝi estas donita nur mallonga ripoztempo, kaj Hāmarik transdonas la estingiĝanton rekte al Koit, kiu ĝin tuj rebruligas por nova vivo.

Alvenis la bela sezono, kiam floroj floras kaj aromas, kaj birdoj kaj homoj plenigis la kampon sub la tendo de Ilmarine per kantoj. Ambaŭ rigardis unu al alia tro profunde en la brunkolorajn okulojn, kaj kiam la estingiĝanta suno estis transdonata de Hāmarik al Koit, ili premis reciproke la manojn, kaj la lipoj de ambaŭ kuntusiĝis. —

Sed unu okulo, kiu neniam endormiĝas, rimarkis tion, kio sekrete okazis dum silenta meznokto. La sekvantat tagon la Maljunulo invitis ilin ambaŭ al si kaj diris: „Mi estas kontenta pri via laborado kaj deziras, ke vi iĝu plene feliĉaj. Geedziĝu do kaj plenumu vian oficon estontece kiel geedzoj!“ Kaj ambaŭ respondis samtempe: „Prapatro, ne difektu nian ĝojon! Permesu al ni por ĉiam resti gefiantoj, ĉar ni trovis nian feliĉon en la fianĉeco, kie la amo estas ĉiam juna kaj nova.“

¹ Matenruĝo.

² Vesperuĝo.

Kaj Prapatro plenumis ilian peton kaj benis ilian entreprenon. Nur unu fojon ĉiujare ili sin renkontas dum kvar semajnoj meznokte, kaj kiam Hāmarik metas la estingiĝintan sunon en la manojn de l' amato, ambaŭ post tio premas reciproke la manojn kaj kisas unu la alian, kaj la vangoj de Hāmarik ruĝas kaj rebrilas rozkoloro sur la ĉielo, ĝis Koit rebruligas la lumigilon kaj flava lumo ĉe la ĉielrando anoncas la releviĝon de l' suno. Prapatro ĉiam ankoraŭ ornamas por la renkontfesto la kampojn per plej belaj floroj kaj najtingaloj vokas ŝerce al Hāmarik, tro longe ripozanta sur la brusto de Koit: „Laisk tŭdruk! Laisk tŭdruk! Ŭo pik!“

Laŭ FR. FÄHLMANN

trad. A. Saul.

LUPO KAJ VULPO DUM EDZIĜOFESTO

Lupo kaj vulpo estis iam irintaj al edziĝofesto sen scio de la mastro. Ili estis ambaŭ sub la festena manĝotablo, manĝis tie ostojn kaj panpecetojn, falantajn de la tablo. La lupo eĉ sukcesis kaŝe trinki bieron kaj fine ebriiĝis. Tiam ĝi ekdeziris kanti, demandis permeson de la vulpo: „Kamarado, mi ekkantos.“ La vulpo diris: „Ne kantu, oni nin batos!“ La lupo duafoje ree demandis permeson de la vulpo. La vulpo ja malkonsilis tion, sed la lupo havis tre grandan kantdeziron kaj ankoraŭ triafoje demandis permeson de la vulpo, ĝi deziris nepre kanti. Tiam la vulpo diris: „Se vi havas tiel grandan deziron, kantu do, ni vidos, kiel grandan honoron tio havigos al vi.“ Tiam la lupo leviĝis sur la tablon kaj ekkantis. Kiam la gastoj ekaŭdis, ke la lupo jam kantas, ili pel-incitis la hundojn, lasis ilin ataki ĝin, kaj ankaŭ mem batis ĝin per bastonoj. Kiam la vulpo ekvidis, ke la hundoj mord-atakas la lupon, ĝi ekkuris en la ĉambron, enŝovis la kapon en kremujon, tiel ke la kapo kovriĝis per kremoj, kaj foriris tiam. Kiam ĝi en la arbaro ree renkontis la lupon, ĉi tiu plendis al la vulpo, ke oni multe batis ĝin. La vulpo diris: „Kvankam vi estis multe batita, tamen mi ankoraŭ multe pli, mia kapo ja ekputris pro batado.“ La lupo volis ankoraŭ daŭrigi la vojon, sed la vulpo diris: „Mi ne kapablos kuniri, se vi ne prenos min sur vian dorson.“ Tiam la lupo prenis la vulpon sur sian

¹ Sonimito al najtingala kanto. Laŭvorta traduko: „Maldiligenta knabino! Maldiligenta knabino! La nokto estas longa!“

dorson, por porti ĝin, kaj ekiris kun la vulpo surdorse. La vulpo tiam ekkantis: „Malsanulo portas sanulon, malsanulo portas sanulon!“ La lupo demandis tiam: „Kion vi, amiketo, nun kantas?“ La vulpo respondis: „La malsana kapo babilaĉas, amiketo, kiu scias, kion ĝi parolas.“

Laŭ ROSENPLÄNTER
trad. Hilda Dresden.

BELOKANTO

Kompilis el setuaj¹ popolkantoj: D-ro J. HURT.

Bel' veturis laŭ rivero,
Kanto laŭ kamparo larĝa,
per ĉevalo prizorgita
kaj per sled', el kverk' farita.
En la sled' edzino svelta,
vortoj per kribril' sur sino,
kantoj per faden' je kolo.

Bel' observis, Bel' aŭskultis,
kiu ĝin do renkontvenos,
renkontvenos, renkontmarŝos?
Renkontvenis aro knaba,
granda grup' de ĉapeluloj.
Ili jene ekdemandis,
ekdemandis, ekesploris:
„Kien iras vi, Beleto,
kien kuras vi, Kanteto?
Ĉu vi, Belo, nin vizitos,
ĉu vi, Danco, nin deziras?“

Belo buŝe ekparolis,
Bel' komprenis, Bel' respondis:
„Vin ja mi, Belo, ne vizitos,
vin ja mi, Danco, ne deziras;
mi ne volas inter fraŭlojn,
min ne allogas aro knaba;
oni neas knaban belon,
ne deziras knaban dancon.“

¹ Estonoj en la sud-orienta Estonio, loĝintaj sub pure rusa administracio, pro najbareco de la rusoj parte influataj de ili, alprenintaj grek-ortodoksan konfesion, ĝenerale pli primitivaj, tamen originalaj, laŭ etnografia, folkloraj kaj lingva (dialektaj) vidpunktoj.

knaboj havas lignan langon,
kverkajn ili havas kantojn.
Se vi iros plugi kampon,
portos pezan la plugilon,
tie belon vi forgesos,
kanton el la kap' eligos.“

Bel' veturis laŭ rivero,
Kanto laŭ kamparo larĝa,
per ĉevalo prizorgita
kaj per sled', el kverk' farita.
En la sled' edzino svelta,
vortoj per kribril' sur sino,
kantoj per faden' je kolo.

Bel' observis, Bel' aŭskultis,
kiu ĝin do renkontvenos,
renkontvenos, renkontmarŝos?
Renkontvenis ar' edzina,
granda grup' de tukulinoj.
Ili jene ekdemandis,
ekdemandis, ekesploris:
„Kien iras vi, Beleto,
kien kuras vi, Kanteto?
Ĉu vi, Belo, nin vizitos,
ĉu vi, Danco, nin deziras?“

Belo buŝe ekparolis,
Bel' komprenis, Bel' respondis:
„Vin ja mi, Belo, ne vizitos,
vin ja mi, Danco, ne deziras;
mi ne iros al edzinoj,
nek en la vicon de virinoj,
nek al la ar' de tukulinoj;
oni neas vian belon,
ne deziras vian dancon,
ne laŭdadas vian ludon.
Goj' via naĝis Narva-landon,
rido rapidis Luiga-landon,
sur pomarbon plaĉe belan,
sur ĉarmetan ĉerizarbon.
Vi la belon ja forgesos,
kanton el la kap' eligos:
havos idojn vi malgrandajn,

kriegemajn kokidetojn,
iros vi luli la infanojn,
endormigi la etulojn,
plu vi ne povos kanton kanti,
plu vi ne povos ĝojon ĝui, —
tial la belon vi forgesos,
kanton el la kap' eligos.“

Bel' veturis laŭ rivero,
Kanto laŭ kamparo larĝa,
per ĉevalo prizorgita
kaj per sled', el kverk' farita.
En la sled' edzino svelta,
vortoj per kribril' sur sino,
kantoj per faden' je kolo.

Bel' observis, Bel' aŭskultis,
kiu ĝin do renkontvenos,
renkontvenos, renkontmarŝos?
Renkontvenis ar' knabina,
granda grup' de kronulinoj.
Ili jene ekdemandis,
ekdemandis, ekesploris:
„Kien iras vi, Beleto,
kien kuras vi, Kanteto?
Ĉu vi, Belo, nin vizitos,
Ĉu vi, Danco, nin deziras?“

Belo buŝe ekparolis,
Bel' komprenis, Bel' respondis:
„Certe mi, Belo, vin vizitos,
certe mi, Danco, vin deziras;
iras mi al junulinoj,
en la kunon de knabinoj;
oni volas vian dancon,
vian plaĉan petoladon,
vian ĝojan belĝuadon.
Vi ja la belon ne forgesos,
kanton el la kap' ne pelos:
bel' knabinon antaŭkuris,
ŝerco ŝin ridante sekvis,
mem ŝi meze turniĝadis,
en intero ŝi iradis, —
tial vi belon ne forgesos,

kanton el la kap' ne pelos.
Kiel luno en la nuboj,
suno sur la rand' de l' nesto,
tiel en la bel' knabinoj,
infaninoj inter kantoj.“

Venis Bel' al junulinoj,
Kant' en kunon de knabinoj,
venis pro sopir' ilia,
venis pro vokad' ilia.

Trad. Henriko Seppik.

INFANECO DE KANTISTO

El: SAARESTE, Nr. 1.

Kiam mi malgranda estis,
kiel floro mi ja kreskis:
panjo portadis la lulilon
sur la kampon en trankvilon.
Kante lulis min kukolo,
fajfis birdoj kun fervoro.
Multe la kukol' kukuis,
kaj la birdoj kante bruais.
Mi aŭskultis kaj atentis,
atentadis kaj silentis.
Skribis ĉion sur papero,
notis zorge por memoro.

Trad. Hilda Dresen.

LA POTENCO DE L' KANTO

El: HURT, Vana Kannel, Nr. 162 A.

Se mi komencas kantegadi,
kantegadi, kukuadi,
mi, malgranda, versojn verŝi,
mi, etul', rakontojn ruli, —
min ne povas brido bridi,
brido bridi, ĉenoj ĝeni,
nek haltigi nuboj helaĵ,
nek ĉesigi la ĉielo.

Se mi komencas kantegadi,
 kantegadi, kukuadi,
 mi, birdeto, belvoĉadi,
 mi, trilanto, triumfadi,
 la vilaĝ' ne povus dormi,
 la servistoj songon ĝui,
 la dungitoj duondormi,
 la edzinoj ekdormeti,
 la knabinoj ekkusiĝi,
 venus sur vojon vilaĝanoj,
 bienuloj al barilo,
 geriĉuloj sur grenejon,
 kabanuloj sur kampetojn,
 senhavuloj sur sterkaĵon
 por aŭskulti miajn vortojn,
 kantojn de kuraĝa knabo.

Trad. A. R. Saul.

TRIUMFADO DE LA KANTO

El: VESKE, Eesti Rahvalaulud II, Nr. 1.

Sonu, sonu, universo,
 voĉu, voĉu, vasta valo,
 rebruadu, bela bosko,
 rekantadu vi, kverkaro,
 revokadu, verdarbaro,
 retondradu, trabarbaro,
 mian virofortan voĉon,
 mian kuraĝigan kanton,
 mian triumfantan trilon,
 mian verve viglan vokon.

Kie mia voĉ' aŭdiĝas,
 tie bosko tuj breĉiĝas,
 arboj mem kunamasiĝas,
 trunkoj tie mem trabiĝas,
 lignon al ni liveradas
 kaj hejtaĵon hejmen portas
 sen aplik' de vira forto
 kaj sen helpo de hakilo.

Trad. A. R. Saul.

BUŝOJ KANTAS, KOROJ KREVAS

El: VESKE, Eesti Rahvalaulud I, Nr. 7.

Kiu aŭdas nin kantadi,
 kantetadi, kukuadi,
 tiu diras, ke ni ĝojas,
 ke ni pro feliĉ' festenas,
 pro triumfaj tagoj trilas.

Mi kantadas tra kor-krevoj,
 pepas tra pezegaj pensoj,
 trilas tra turmentoj tedaj.
 Buŝoj kantas, koroj krevas,
 larm-ondar' okulojn ombras,
 plenda plor' palpebrojn premas,
 vangojn varma larm' vualas.
 Koroj konas kruelajojn,
 vangoj vanajn veajn vokojn,
 brustoj ploroplenajn penojn.

Trad. A. R. Saul.

KANTU, BUŜETO

El: VESKE I, Nr. 2.

Kantu, cantu vi, buŝeto,
 vigle voku, birdbeketo,
 ridetadu, ruĝbereto,
 ĝojegadu, ho, koreto!
 Iam vi ja maljuniĝos,
 senviviĝos, silentiĝos,
 por eterne entombiĝos,
 en la tero vi troviĝos,
 sola en la sablo kuŝos,
 ĉerktabuloj vin ĉirkaŭos.

Kiu donos do trinkaĵon,
 apetitan anseraĵon,
 portos tomben pork-rostaĵon,
 ŝovos sablen ov-fritaĵon,
 al mortinto malt-trinkaĵon?
 Talpo donos la trinkaĵon,
 apetitan anseraĵon,
 portos tomben pork-rostaĵon,
 ŝovos sablen ov-fritaĵon,
 al mortinto malt-trinkaĵon.

Trad. Hilda Dresden.

PATRINA ZORGO

Kiam pagi por la penoj
de patrino mia bona,
por la dolĉa lakto panja,
la portado en la brakoj?
Mia delikatulino,
koramata patrineto,
kiel vi min edukadis,
edukadis, karesadis,
eklevinte, saltigadis,
mallevinte, ludigadis,
ĉe la buŝo dormigadis,
en la brakoj balancadis.
Ame en la antaŭtuko
vi min portis sur la kampon,
kie vi min delikate
inter garbojn eksidigis,
protektante kontraŭ vento,
kontraŭ pluvo senpripensa.
Kiam pagi por la penoj
de patrino mia bona,
por la dolĉa lakto panja,
la portado en la brakoj?

Trad. Villem Vaher.

TAMEN DEVAS SKLAVO NAĜI

El: AAVIK, Nr. 85.

Se eĉ falas fer' fajrvarma,
eĉ ŝutiĝas hajl' hidrarga,
gutas eĉ pluvego plumba, —
tamen devas sklavo naĝi,
tamen mizerul' sin movi,
orfo ondojn trafenetri,
dungitul' danĝeron sperti.
Mi laboras ne laŭdate,
mi penadas ne pagate.

Trad. A. R. Saul.

BELA SAJNAS ĜI DE FORE

El: AAVIK, Nr. 27.

Bela saĝnas ĝi de fore,
plaĉas ĝi de malproksime.
Kiu konas ĝian koron,
kiu montros ĝiajn morojn?
Eble ranoj en ĝi rampas,
insektar' interne flugas,
en la ventro vermoj vagas,
serpentar' en la stomako,
larvoj en lieno ĝia.

Trad. A. R. Saul.

VI NE FIDU FRAŬLAN FLATON

El: VESKE, Eesti Rahvalaulud I, Nr. 16.

Vi ne fidu fraŭlan flaton,
fraŭlan flaton, fraŭlajn frazojn,
dungitulajn dolĉajn dirojn
kaj mielmienon mastran!

Knab' kreigiĝis por perfidi,
por perfidi, por promesi,
por knabinojn kapti jure,
por ke trompturmentojn spertu
la anim' inferabisme,
en inferkaldron' la korpo;
li promesas vere varbi,
efektive edzinigi;
li vin trompos, li sin turnos
al alia amatino,
al najbara mastridino, —
li krevigis knabinkoron
li profanis puranimon.

Trad. A. R. Saul.

KIU KONAS VIROKORON

El: VESKE II, Nr. 58.

Kial oni min allogis,
Kial trans vastaĵojn vokis?
Parolante, ke piceoj,
Aveluoj or-abundas,
Pinoj je mielo plenas.
Mi ekvivis, mi ekvidis,
La piceoj pingle pikis,
Aveluoj hajl-abundis,
Pinoj je rezino plenis.

• Ho, ne konas mi, knabino,
Mi ne konas virokoron:
Eble krabrojn ĝi enhavas,
Skarabetoj en ĝi svarmas,
Burdoj sub la basko nestas;
Viro blonda, pugno peza,
Neblondulo, koro nigra,
Viro vigla, man' malmola.

Trad. Hilda Dresen.

JEN MIRINDAĴO!

El: VESKE I, Nr. 80.

Mirindaĵo, mirindaĵo,
Jen mirakla mirindaĵo!
En vilaĝo Nău mi vidis:
Du virinoj malpacadis.
Havis Ann hokegon, Kai kroĉilon,
Mai en mano manpesilon,
Leenu longan kuleregon.
Vekto akvon vigle portis,
Kaj volvilo kuiradis,
Porko panopaston knedis,
Kaj virin' fosaĉis kampon;
Laborestro hunde hurlis,
Porkobruston broĉo beligis,
Vartis bovin' infanon vindante,
Safo ŝirmite ovumadis.

Trad. Hilda Dresen.

EL „KALEVIPOEG”¹⁴

(III-a kanto 435—540.)

Kune la Kalevidoj karaj
Nun triope triumfadis,
Ridetante rapidiris,
Laŭ vastegaj valoj vagis,
Laŭ paŝtejoj pacaj paŝis,
Laŭ marĉetoj muskaj marŝis;
Kreskis survoje kvar arbaroj,
Kvar gracie belaj boskoj.
Estis jen pompa picearo
Kaj klerega kverkarbaro,
Belaspekta betularo,
Larmabunda alnarbaro.

Estas la pompa picearo
Tiu de l' popolaj princoj;
Estas la klera kverkarbaro
La propraj² de Taara² praa;
Estas la bela betularo
Tiu de la belulinoj;
Larmabunda alnarbaro
Estas la arbar' plena
De la orfoj ofenditaj.

La plej aĝa frato forta
En la princa picearo
Kusŝidiĝis sub kovraĵo
De la pompa picearo;
Sonorile kant' eksonis,
Fortflugile ĝi ekfluis:
La foliarbar' ekfloris,
Vigle per verdaĵ' sin vestis,
Sur la konifer' ekkreskis
La pikemaj pingloj pintaj,
La piceofruktoj plaĉaj
Ravoriĉe ekruĝetis,
Kverkon li per glanoj garnis,
Per ament' betulon benis,
Sorĉis kante por somero
Freŝajn florojn sur la arbojn,

¹ Kalevido.

² Cefdio de la estonoj.

Por ke sun' sukigu ilin,
 Por ke lun' lumigu ilin;
 Pro la kanto boskoj bruis,
 Tra la vastaĵoj voĉo vibris,
 Marĉoj muĝe ekmurmuris:
 Reĝfilinoj fabellandaj
 Pro la vir' alloga larmis.

Dua frato, la fortulo,
 En la bela betularo
 Sub betulo eksidiĝis;
 Sonorile kant' eksonis,
 Fortflugile ĝi ekfluis,
 Tondre tra aer' ekstrems;
 Pro la kant' ekfloris floroj,
 Bele krevis burĝonetoj,
 Kantis grenon li sur kampon,
 Pomojn puncajn sur pomujojn,
 Nuksojn sur la avelujojn,
 Fruktojn sur la ĉerizujojn,
 Fragojn freŝajn sub filikojn,
 Bluberetojn sur marĉmuskon,
 Vakciniojn sur vastaĵojn,
 Kamemorojn en kaŝlokojn
 Kaj sorparojn sur sorparbojn.
 Pro la kanto boskoj bruis,
 Tra la vastaĵoj voĉo vibris,
 Arbetoj alarmiĝis,
 Marĉoj muĝe ekmurmuris.
 La niksinoj, virgulinoj,
 Pro la vir' alloga larmis.

Tria frato, la fortulo,
 En la klera kverkarbaro,
 En la patra praarbaro
 Sub saĝega kverk' eksidis:
 Sonorile kant' eksonis,
 Fortflugile ĝi ekfluis,
 Tondre tra aer' ekstrems,
 Fajroflame ĝi ekflagri!
 Kantis birdojn li en boskon,
 Arbobirdojn en alnaron,
 Plaĉajn en la picearon,
 Prudentegajn en pinaron

Kaj kleregajn en kverkaron.
 Kantis sur la arbosuprojn
 La kukolojn por kantadi,
 La kolombojn por kveradi;
 Kantis turdojn sur tremolojn,
 Nestobirdojn en bosketojn,
 Alaŭdetojn en aeron,
 Hirundetojn en sunhelon;
 Kantis cignojn sur la ondojn,
 Anasetojn sur la akvon,
 Anseretojn sur riverojn;
 Kantis noktan najtingalon
 Por vivigi la vesperojn,
 Por ravigi matenruĝon
 Per flutado fajre flama.
 Pro la kanto maro muĝis,
 Raŭke rokoj resonadis,
 Arbosuproj alteriĝis,
 Montopintoj kunpuŝiĝis,
 Nuboj kun krakado krevis, —
 La ĉielo aŭskultadis.
 Solfilino de l' feino,
 La elfinoj enarbaraj,
 La niksinoj orhararaj
 Pro la vir' alloga larmis:
 Se ĉi viron ni ekvarbus,
 Se li nia edzo estus.

Trad. Hilda Dresen.



KRISTJAN JAAK PETERSON
(1801—1822)

KANTISTO

Kvazaŭ falus de rok'
En kvietan valon
Ondoj riveraj
Brue kaj ŝaŭmegante,
Kvazaŭ krakus forte
Sub la nuboj malhelaj
Tondro dum fulma bril':
Tiel la belaj kantoj
Fluas fajre sen halto.

La amata kantisto ja
Kvazaŭ lumofonto
Staras inter gefratoj siaj.
Tondro ekkrakas —
Mutigaŭ arbar':
Jen la kantisto nun
Forte ekkantas kun
Voĉ' emociplena.
Kaj la popoloj,
Silentante kvazaŭ
Rokoj, aŭskultas lin.

Trad. Hilda Dresen.

LUNO

Ĉu en la norda vent'
Per la kantofonto
Ne freŝigas sin la kor'
Eĉ de mia popolo?

Se en neĝa la nordo
En interroka malvarma val'
Bele ne povas flori
Ĉarma mirto kun hela flor',
Kial lingvo de ni,
Kiu kvazaŭ river' sen bru',
Sen konsci' pri sia bel',
En orbrilo de l' bluĉiel'
Tra herbejo glitadas
Pace en trankvila flu'
Kaj eĉ kun majesta bru',
Sen konsci' pri sia fort'
Muĝi povas ja kvazaŭ mar'
Dum tondro ĉiela;

Kial lingvo de ni
Eterniĝon al si
En kantoflam', flagranta
Ĝis ĉiel', ne penu akiri do?

Kaj prikantas mi
 Vin, ho, steloj arĝentaj,
 Rigardante
 Supren al la ĉielo,
 Al la patruj' malproksima;
 Noktoreĝo lun',
 Prikantas mi vin,
 Leviĝantan el nuba sin',
 Kvazaŭ pala, gracia flor'
 El ekkrevinta ĵus burĝon'
 Supren al la bluĉiel',
 De kie la steloj
 Falas malsupren nun
 En la nebulon,
 En la densan mallumon.

Tiel same en nebul'
 Estas ŝvebanta homanim',
 Kiam Dion en la senlim'
 Per sia penso ĝi serĉas.

Trad. Hilda Dresen.



**Dr. FRIEDRICH REINHOLD
 KREUTZWALD**
 (1803—1882)

AL LIBERECO

El „KANTOJ DE VIRU-KANTISTO“.

Sekrete io en la brusto sonis,
 De kiam ekfariĝis mi junul',
 Al miaj songoj ĝi flugilojn donis,
 Se por ripoz' fermiĝis la okul'.
 Dum mateniĝ' la pensojn ĝi jam spronis,
 Kaj post vekiĝ' sentiĝis kvazaŭ brul' —
 Kuraĝe ekplenigis koron penso:
 Ĉu al vizioj miaj manku senco!

Kaj ĉion, kion aŭdis la orelo
 Pri la estonaj tero kaj popol',
 Kaj kion poste brila stelĉielo
 Min igis ekkompreni sen parol',
 Pri tempo de l' servuto, pri kruelo,
 Pri la popol', ĝemanta sen konsol' —
 Mi ĉion tion sentis kaj ekdiris:
 Feliĉosun' por ĉiam ne subiris!

Silentaj noktohoroj, harpo kara,
 Al vi malkaŝis nur la pensojn kor'!
 Pri mia plendo arda kaj amara
 Mi nun konfesu dum ĉi tiu hor',
 Sed min subtenis la esper' bonfara
 Dum horoj de l' hezito kaj dolor'.
 Ho, liberec', vi kanti min inspiris,
 Ja vin mi ĉiam laŭdis kaj admiris!

Subiri sun' ankoraŭ ne sukcesis,
 Sed jam katenojn skuas la liber',
 Nelonge la feliĉo nin karesis,
 Kovriĝas per vesper-nebulo ter'.
 Ĉu vi, libero, tute nin forgesis,
 Ne pelos for mallumon de l' vesper'?
 Ho, al popol' estona ree venu,
 Spirito-malliberon de ĝi prenu!

Trad. Hilda Dresen.



LYDIA KOIDULA
 (1843—1886)

EFEMERA

Ĉarma flor', ĉarma flor',
 Ĉesu gracie floradi vi:
 Pasos for, pasos for
 Baldaŭ printempo kaj sunradi!
 Iam frostiĝos ja mia sin',
 Sed nun la floroj altiras min:
 Viv' efemera, salutas la kor'
 Vin nun per flor'.

Birda tril', birda tril'
 Certe longdaŭra ne estas ja!
 Frosta spir', frosta spir'
 Pri aŭtuniĝo atestas jam!
 Buŝon mutigu do iam mort',
 Sed nun mi kantas per tuta fort'
 Viv' efemera, salutas mi vin
 Kante sen fin'.

Ho, anim', ho, anim',
 Ardaĵn korbatojn subpremu vi!
 Venos fin', venos fin',
 Tempon ne povas reteni ni!
 Dolĉe sub tero ripozos mi:
 Sonu ankoraŭ nun ĝojkri'!
 Viv' efemera, ne flugis vi for,
 Kantu do, kor'!

Trad. Hilda Dresen.

ESTONA TER' KAJ ESTONA KORO

Koro, kiel vi ekbatas
 Forte en la brust' de mi,
 Se mi vian nomon nomas,
 Hejmolando Estoni'!
 Mi malbonon, bonon spertis,
 Sed ne venkis min dolor',
 Multon en la viv' mi perdis —
 Ne forgesos vin la kor'!

Mi ĉe via brusto spiris
 De l' unua vivmoment';
 Mi aeron vian ĝuis
 Dum ĝojkantis mia sent'.
 Vi ja larmojn miajn vidis,
 Mian zorgon aŭdis vi...
 Estoni', pri penoj, kantoj —
 Ja parolis mi al vi.

Ho, ne povas mi esprimi,
 Kiel amas vin la kor'!
 Mi en via sin' ripozi
 Volas post la mortohor'.

Patrinece tiam kovru
 Koron ardan de l' infan':
 Ter' estona, kor' estona,
 Vin disigi estus van'!

Trad. Hilda Dresen.

KIAL PLORAS VI, FLORETO?

Kial ploras vi, floreto,
 Larmojn kial verŝas vi?
 Ĉu turmenton, doloregon
 Vi eksentis tie ĉi?

Ĉu dum nokt' al vi rakontis
 Iam la estona ter'
 Pri pasintaj tempoj ĝojaj,
 Nun perditaj sen esper'?

Kapon levu, ho floreto,
 Venkis matenruĝ' en glori,
 Ĝi alsendos lumradiojn,
 Kaj sekiĝos via plor'!

Dum patrujon la florantan
 Brile supersutos ĝi,
 Flor', al ĝi esprimos tiam
 Nian koran dankon ni!

Trad. Helmi Dresen.



ANNA HAAVA
(1864)

MI POVAS

El „POEZIAĴOJ I“.

Ne timu, ho, karulo,
Mi ne ĝenados vin;
Almozpetadi amon
Ne volas la anim’.

Mi froste alrigardi
Vin povas kun fier’
Aŭ ombre preterpaŝi
Vin kvazaŭ kun sever’;

Mi povas ja remadi
Sen vi sur vivomar’,
Sed povas en la koro
Mi porti vin sen bar’.

Trad. Hilda Dresen.

SONĜIS MI

El „POEZIAĴOJ I“.

Pri miraklolanda bril’
Song’is mi,
Sorĉa sonis en trankvil’
Melodi’.

Ne sopiras plu mi ĝin
Sen mezur’;
Vok’ alia en anim’ —
Aŭdu nur:

Brilas lia nun okul’
En la kor’,
Sonas kanto de l’ karul’
En memor’.

Trad. Hilda Dresen.

HO, NE POVAS MI SILENTI

El „POEZIAĴOJ II“.

Ho, ne povas mi silenti,
Miajn kantojn peli for —
Pro silento kontraŭvola
Ja rompiĝus mia kor’.

Mallaŭtete mi kantados,
Milde ludos harpon mi,
Vin ne ĝenos, plejamoto,
Mia kantomelodi’.

Kiam harposonoj ardaĵ
Tamen atingados vin,
Tiam mem vi estos kulpa:
Kial ami igis min?

Trad. Hilda Dresen.

HO, NI ADMIRU!


El „ONDOJ“.

Aŭdu, ho karaj, vi ludas per fajra flam'!
Se ekbrulos nun koroj pro arda am',
Kion intencas fari vi?

Aŭdu, ho kara, ni ludas per fajra flam'!
Se ekbrulos nun koroj pro arda am',
Kion intencas fari ni?

Ho, ni admiru! — Kun vangoj ardantaj
Mire ni flustru ĉe flamoj flagrantaj,
Kiel ekbrulas la kor' pro am' . . .

Trad. Helmi Dresen.



KARL EDUARD SÖÖT

(1862)

OMBRO

El „HEJMO“.

Ni duope, ni duope laŭ ebena
La landvojo paŝis en silento plena.
Supre helis somernokta la ĉiel'.

Kaj vizaĝoj niaj ardis, batis koro.
Sur deklivo ekondadis en ĉi horo
Sekalkampo ĉe kruceto el granit'.

Plor' infana sonis . . . ĝi de l' tombo venis.
Je timiga tremo la kviet' ekplenis.
Preterrampis kampon ombro en malhel'.

Vi krucsignis. Kaj la ombro jen ekstrems,
Ĉe fosaĵ' malaperinte, ĝi ekĝemis.
Sed antaŭen ni rapidis sen hezit'.

Trad. Hilda Dresen.

ESTUS TEMPO!

El „HEJMO“.

Nigra ombro ŝvebas super valo,
Dense kovras la bienokorton,
Ĝi al nia kor' alportas morton.

Nigra ombro ŝvebas super valo...

Ĝin postlasis la servutotempo,
Ĝi dum sepcent jaroj nin turmentas,
En la koro ni ĝin sentas.

Ĝin postlasis la servutotempo.

Ombro nigra, nun jam estus tempo,
Por ke ĉesu plenpotenco via,
Ke ekvenku suno orradia.

Ombro nigra, nun jam estus tempo.

Trad. Hilda Dresen.

LA SEKALKAMPO

El „HEJMO“.

Premis varmo kaj trankvil' vespera
Sekalkampon, lacan pro turmento
De atendo, dum sufokaera,
Ebriga iĝis la silento.

Mateniĝis. Jen ventet' ekblovis,
La sekalon vekis ĝi rapidis.
Ĝi petoli, ludi provis:
La sekalo savon antaŭvidis.

Sun' ekbrilis. Ekleviĝis vento
Forta, ekondadis la sekalo...
Supreniĝis al la firmamento
Kvazaŭ danko la poleno-mar.

Trad. Hilda Dresen.

AUGUST KITZBERG

(1856—1927)

LUPHOMO

Kvinakta dramo

PERSONOJ:

Mastro de Tammaru.
Mastrino de Tammaru.
Margus, ilia filo.
Mari } iliaj adoptitaj filinoj.
Tiina }
Avino.
Jaanus, servisto.

Kvara akto

(Draŝejo. Dekstre malgranda pordo, kondukanta en la grensekiĝejon, apud ĝi krucpieda manĝotablo kaj malnovmodaj seĝoj. Maldekstre la lito de l' avino, apud ĝi benko, pli antaŭe lign-aksa radveturilo kun dikaj rad-rondoj (dumsomera dormejo de Margus). En la malantaŭa muro larĝe malfermita pordego, tra kiu eniĝas hela sunbrilo, aparte ĉarmigante la ordinare fulgozan kaj fumajitan ejon (de la plafono pendas pajleroj). Ekstere — perspektivo de somera pejzaĝo: kampoparceloj, arbaretoj, arbetaro.

Margus havas longajn, egale tonditajn harojn, ĉapelon, poŝhavan ĉemizon, kuntenatan sur la brusto de malgranda kupra broĉo, mallarĝan pantalonon, blankajn piedtukojn kaj rimenhavantajn piedvestojn — pastlojn¹. *Tiina* (brunulino) kaj *Mari* (blondulino) havas malkomfortajn diverskolorajn popol-vestojn. *Mari* havas arĝentan broĉon, kolornamajojn kaj brilajetkronon sur la haroj, *Tiina* havas sur la kapo florkronon — arĝentajn ornamajojn ŝi ne havas.)

Margus (apogas sin malĝoje al la fosto de la pordego, nenion aŭdas kaj vidas, sencele rigardante antaŭ sin).

Mastrino (venas el la domo, haltas, intencas kvazaŭ diri ion, sed rimarkinte, ke *Margus* nek vidas nek aŭdas ŝin, balancas la kapon kaj reiras malĝoje).

Mari (kun akvositeloj preterpaŝas la pordegon en la korto; ekvidinte *Margus*'on, ektimiĝas iom, malkuraĝe rigardas lin kaj foriras. *Margus* sidiĝas sur benkon apud la lito de l' avino kaj restas sidanta malgaje, apogante la kapon al la manoj).

¹ Speco de estona simpla leda senkalkanuma kamparansuo.

Jaanus (venas piedrene de alia direkto kun koljungaĵo sur la ŝultro kaj direktiloj en la mano, ekvidinte Margus'on, haltas ĉe la sojlo): Hodiaŭ oni ne bezonas iri por labori en la bieno — la maljuna mastro ŝajne parolis pri replugado de la nesemita kampo...

Margus (kvazaŭ vekigante): Kio? Kiu? Ha, jes!.. (rigardas aliflanken).

Jaanus (alproksimigante): Nia Tiina ankoraŭ ne estas reveninta? Jam la kvara tago...

Margus (ne respondas).

Jaanus: Pli frue, kiam ŝi agis same, — la trian tagon ŝi ĉiam revenis...

Margus (ĉagrenite forturnas la vizaĝon).

Jaanus: Obstinulino ŝi ja estas. Mi ja diris jam tiam, kiam la mastro ŝin restigis en la domo: ne faru! Tio ne kaŭzos bonon!

Margus (ĉagrenite): Nu, kiam malbonaĵon ĉi tio do estas kaŭzinta?

Jaanus: Nu jes, kion do mi scias. La junulino ja estas kvazaŭ fajrero. La panon ŝi kapablas perlabori kiel du homoj. Nur...

Margus (ne respondas).

Jaanus: ... ŝi ne povas bridi sin, pro ĉiu malpaceto forkuras en arbaron, kaj revenigas ŝin de tie nur malsatego...

Margus (senpacience forturnigante): He!

Jaanus (senkulpege): Mi ja nenion!.. Sed ĉi tio ja! Kiu do povas haltigi famon, se ĝi jam estas estiĝinta. Ĝi disvastiĝas



kvazaŭ kurfajro. La gemastroj ja pravas, ne permesante al vi edziĝi je ŝi!

Margus (sinretene, riproĉe): Ĉu do ankaŭ vi kredas malbonon pri Tiina? Vi ja konas ŝin!

Jaanus (malbonhumore): Kion signifas mia kredado!..

Margus: Ĉu do vi ne povas silentigi la homojn? Vi ja scias, ke — ŝi estas jam tia. Ŝi ne havas tian kvietan sklavan sangon, kian ni, — vi ja scias!

Jaanus: Ĉu mi scias aŭ ne, kiom helpos mia scio! Kvazaŭ mi estus pli saĝa ol aliaj, por ke mi povu silentigi ilin! (Estas forironta). Do ĉu mi iru por replugi la nesemitan kampon?

Margus (malafable): Do iru, se oni ordonis al vi. (Restas sidanta malgaje, kiel antaŭe. Jaanus for).

Avino (venas laŭpalpe el la grensekigejo¹ kaj direktas sin al sia lito, la manoj okaze ektuas Margus'on): Kiu — (palpas) ha, vi, fileto! Kion vi nun faras ĉi tie? Vi malĝojas? (mankaresas).

Margus (kviete): Nenion, avino!

Avino (kompatate): Nenion, jes! (sidiĝas malrapide sur la liton apud Margus). Nur — kvazaŭ mortinto estus en la domo!

Margus (turmentita, respondas nenion).

Avino: Dum vi ankoraŭ estis malgranda, Margus, kiam vi bezonis ion, aŭ kiam vi volis ion ekscii, kaj la aliaj ne havis por vi tempon, vi ĉiam venadis al mi!..

Margus (varme): Al vi ni ĉiuj ja venas, avino!

Avino (skuante la kapon): Ne, fileto, ne ĉiuj vi venas. Vi ne venas! Jam de longe vi havis nenion por diri al mi!

Margus (levetas la ŝultrojn, malĝoje): Kion mi diru al vi, avino, kion vi mem ne scias!

Avino: Jes! Avino plu ne havas okuletojn, katarakto metis kovraĵon sur ilin, sed avino vidas tamen! Eĉ pli bone ol antaŭe, ĉion, kio okazas kaj kiel ĉio estas! Avino kapablas rigardi ankaŭ en vian koron, fileto!

Margus (turmentite): Kial do ankoraŭ paroli pri tio kaj babili! Ankaŭ vi, avino, ne povas alimaniere. Ankaŭ vi kondamnas min, blinde, kiel ĉiuj aliaj!

Avino (levas la kapon, kvazaŭ ŝi volus kaj povus rigardi en la okulojn de Margus): Ne, Margus! Tion mi ne faras!

Margus (feliĉe ekscitite): Ĉu vere, avino! (Per ambaŭ manoj ĉirkaŭprenante la manojn de la avino kaj brilokule rigardante ŝin): Vi opi-

¹ En estonaj kamparaj domoj grensekigejo estas samtempe ankaŭ loĝejo, precipe laborĉambro.

niis alimaniere ol... la gepatroj kaj ĉiuj aliaj? (Vigle) Avino! (Mallevas la manojn kaj repaŝas) Mi ne kredas tion! Tio ja ne estas vero! Tio ja ne povas esti!

Avino: Ah, Margus! Ke vi ankoraŭ fidu al mi! Ke mi ĉiam ankoraŭ povu, premante vian manon en mian manon, per parolo kvietigi vian koron, kiel antaŭe, kiam vi estis ankoraŭ infano kaj kelkfoje plorante venis al mi! — Vi ne kondamnu la gepatrojn. Nenion ili faras blinde, kiel vi diras. Ilia rigardo estas klara, sango malvarmeta kaj menso sobra.

Margus (ege flamiĝante): Sobra menso? . . . Kion do vi nun volas? Vi mem ja alprenis Tiina'n en la domon kaj rilatis al ŝi kiel al via propra infano? Kaj nun! Nun, kiam mi jam de mia knabaĝo estas vivinta kune kun ŝi, nun . . . kiam Tiina estas kara al mi — (ĝemante) Avino, vi ne scias, kiom kara, — nun subite vi ŝin plu ne ŝatas. Kion do ŝi estas farinta al vi?

Avino: Ah, Margus! Mi ja scias! Ĉiujn ĝi iam ekkaptos! Kvazaŭ uragano! Tiam furiozas la sango kaj vidas feliĉon kaj malfeliĉon tie, kie — estas nenio malordinara. Ĉiuj ni, Margus, estas kreitaj por samo, por pluplanti, por naski infanojn. Jen ĉio!

Margus (kvazaŭ obstina infano): Avino, mi ne rezignos je Tiina! La babilaĵo pri luphomo? Tio estas ja teruraĵo!

Avino: Ni lasu tion! Sed — kion ni scias pri Tiina? Ĉu ni scias, kiu ŝi estas kaj de kie devenas? — Margus! Alaŭdo kaj blubirdo — ili ne estas paro. Kaj la gento de Tammaru? Margus, se vi volas kaj pacienas aŭskulti, mi rakontos al vi pri ĝi.

Margus (levetante la ŝultrojn, maltrankvile): Kaj — kio . . . Kion do ĉi tio nun . . . Kiel ĉi tio koncernas min . . . ?

Avino: Ĉu tio koncernas vin? Eble tamen, Margus? Jam dek generacioj de nia gento, Margus, estas loĝintaj ĉi tie en Tammaru, la kvin lastajn mi mem estas vidinta, kaj pri la ceteraj mi aŭdis de miaj avino kaj patrino . . .

Margus (estas malpacienca, sed respondas nenion).

Avino: Ĉu vi aŭdas?

Margus: Jes. Daŭrigu.

Avino: Mi opiniis, ke vi ne aŭdas . . . Nia gento havas blondajn harojn kaj blujajn okulojn; edzinojn oni ĉiam elektis el sia gento, — ne havas ni eĉ guteton da fremda sango en niaj angioj, ĝi estas — pura!

Margus: Fremda sango? Kie do ĉi tie la fremda? Ŝi ja estas kreskinta kaj maturiĝinta antaŭ viaj propraj okuloj!

Avino (ne lasas sin malhelpi kaj daŭrigas, kvazaŭ enprofundiĝinte en siajn rememorojn): Niaj filinoj kaj junedzinoj ne estis belaj, oni ne postulis, ke ili iru en la bienon! . . . ! Antaŭ kvar generacioj, kiam oni postulis iun (estas profunde emociita kaj ekrigardas malsupren) — tiu dronigis sin en rivero. Malantaŭ la muro de la tombejo, kiel mi ankoraŭ vidis kaj nun memoras, ĉiam ankoraŭ staris ŝia kruceto — ankaŭ la gepastoknaboj gardis la kruceton kaj ne piedpremis ĝin . . .

Margus (estas ankaŭ kortuŝita, faras konforman movon, sed respondas nenion).

Avino (kvazaŭ rigardante en malproksiman estintecon, daŭrigas): Ni estis flegmaj kaj malrapidemaj; ĉiam ni havis nur po du infanojn, se multe, po tri — sed kiam Dio jam frue ĉesigis la fekundecon — nur po unu! Al Dio ni servis kaj al la bieno servutis time kaj treme; gajeco kaj ĝojo de l' vivo estis por ni ŝlosita. Kiam ni kantis, la kantoj estis pezaj kaj malĝojaj! Sereitajn tempojn ni ne havis, la pasion ni ne konis — ni timis pri la novaj sklavetoj . . .

Margus (maltrankvile): Avino, kial vi pri ĉi tio al mi . . . (plende) Kial vi parolas pri ĉio ĉi! Tio ja nenion plibonigas!

Avino (starigante sin): Jes, kial do mi pri ĉi tio al vi! . . . Nur . . . kiel nia gento antaŭe vivis, kion ĝi opiniis pri la vivo kaj suferoj. De generacio al generacio, kiom ajn malbonaj ni estis — ni opiniis sanktaj la hereditajn morojn, ni estis kvietaj kaj trankvilaj kaj — penis venki nin mem. Sciante ĉi tion, vi do — kiam la koro kelkfoje doloras kaj estas krevonta, vi do pensu ankaŭ pri avino, patro kaj patrino, kiuj ankaŭ ja iam estis junaj, kiel vi nun, kaj — eble ankaŭ ne ĉiam akiris ĉion, pri kio deliris la koro! . . .

Margus (ĉiam pli kaj pli maltrankviliĝas): Ho avino, avino! Viaj vortoj traboras la koron interne!

Avino: Ni ĉiuj estas kreitaj por suferi, unu tiel, alia alimaniere. Sed — la tempo kuracas ĉiun vundon! Juna sango facile ekamas kaj facile — forgesas! (mankaresas) **Nenio, avino** ree penas esti pli saĝa ol vi, junuloj. Ŝi havas tempon por mediti! Kaj tiam ili ĉiuj venas —, (rigardas, kvazaŭ vidante viziojn) kiuj el nia gento vivis antaŭ ni kaj suferis por malfacileco de l' vivo kaj tiuj, kiuj estos post ni kaj ree suferos kaj . . . ili tiom klare, kvazaŭ palpeble per mano, videblas, longvice starante tie — (etendas la manon) kie — ha! — estas ja nenio

¹ Dum la servuteco ekzistis la tiel nomata „rajto de la unua nokto“, laŭ kiu junedzino la unuan nokton post sia edziĝo devis pasigi ĉe sia bienposedanto.

krom la zorgoj de avino! Pluraj, pluraj generacioj antaŭaj kaj pluraj postaj — (la etendita mano tremas) mi ne vidas tie fremdan sangon, ĉiuj havas flavajn harojn kaj blujn okulojn! Flavajn harojn kaj blujn okulojn! (Ŝi lasas fali la manon kaj penas — rigardante Margus'on — kvazaŭ elpremi larmon el la okuloj) — Sed vi ne tro atentu tion, Margus, ne atentu tion tro, ĝi estas nur vizio, kiun avino kelkfoje vidas! (mankaresas Margus'on foje kaj atendas, ke li respondu ion) Kiam la suno subiros, kiam ni estos maljunaj kaj grizaj, tiam... Ĉiuj suferoj estos forgesitaj kvazaŭ sonĝo!

Margus (ĉiam ankoraŭ rigardas timetiĝinte tien, kien montris la mano de la avino, tiam ĝemas kaj ree restas sidanta senmove).

Mari (venas el la grensekigejo, portante sur la tablon kulerojn kaj panon. Ŝi zorge rigardas Margus'on. Ĉar Margus ne movas sin, ŝi kuraĝas diri nenion kaj mallaŭte reiras).

Mastro (venas el la korto, kiam li ekvidas Margus'on, lia vizaĝo malsereniĝas. Faras kelkajn paŝojn kaj haltas meze de la draŝejo): Nu, ŝi ankoraŭ ne videblas?

Margus (ekmoviĝas, kvazaŭ li estus dironta akraĵon, sed forturnas la vizaĝon kaj silentas).

Mastro: Knabo, ĉu vi ne aŭdas, ke oni parolas kun vi?

Margus: Jes, mi aŭdas. Sed kion do mi devis respondi? Se vi demandas pri Tiina, vi mem scias same bone, ke ŝi ankoraŭ ne estas reveninta.

Mastro (pli al si mem): Prefere ŝi restu tie, kie ŝi estas!

Mastrino (venas, metas manĝujon sur la tablon): Venu nun por manĝi!

Mastro (al Margus, kiu ne moviĝas): Nu, kion do vi atendaĉas? Kvazaŭ mortinto! Kia do benaĵo perdiĝis por vi? (sidiĝas ĉe la tablo) Laŭaĝe jam viro, sed la menso estas buba. Se vi volas edziĝi — mi ne malpermesas. Mari atendas, aranĝu aŭtune la geedziĝon!

Mastrino: Jes, mi ankaŭ tion ne komprenas! Vi rajtas ja edziĝi nur je homo, havanta kristanan sangon en la koro! Ne forkuranta en arbaron!

(Jaanus venas el la korto kaj altablighas, same ankaŭ la avino kaj Mari. Ankaŭ Margus sidiĝas apud la patro. Malbona humoro, neniu diras eĉ unu vorton).

Jaanus: Laŭfame en Meelimäe lupu hieraŭ estas forrabinta ŝafidon el la ŝafaro.

Mastrino (kun kaŝita subintenco): Jen! Necesas diri ankaŭ al nia paŝtisto, ke li paŝtu la brutaron pli proksime al la hejmo! (Oni manĝas, kiel antaŭe, senvorte).

(De la sojlo enĉambrighas ombro. Tie staras Tiina — malsata kaj pala, la vestoj estas iom malordigitaj. Ŝi hontas kaj ne kuraĝas levi la rigardon).

Jaanus (kiel la unua ekvidas ŝin): Nia perdiĝintino!

Margus (ekstarighante, por kuri al Tiina renkonte, felice): Tiina! Fine vi tamen revenis...

Mastro (severe premante Margus'on sur la ŝeĝon): Ĉi tie restu! Kun ŝi parolos mi!

(Margus ne kuraĝas moviĝi, dum la mastro malrapide formetas la kuleron el la mano kaj iras renkonte al la venintino).

Mastro: De kie vi venas?

Tiina (pete ĉirkaŭrigardas, sed ne povas paroli).

Mastro (severege): De kie vi venas? Kie vi estis ĉi tiun tempon?

Tiina (malkuraĝe): En arbaro mi estis! Mi ja plu ne kuraĝis veni inter homojn! (Ekploras).

Mastro: En arbaro? En arbaro vagas lupoj! Kion vi faris en arbaro?

Avino (estas detablighinta kaj direktas sin al ŝia lito. Haltinte proksime al Tiina): Infanjo, per kio do vi nutriĝas, forkurinte en arbaron?

Mastrino (ĉe la manĝotablo): Vi ankoraŭ demandas tion? Nun arbaro estas ja plena je viando.

Tiina (plorante kiel antaŭe): Per kio mi nutriĝas? Per nenio, avino. En arbaro estas beroj, en arbaro estas rumeksoj kaj radikoj. (Pro emociigo ĵetiĝante surteren antaŭ la avino kaj ĉirkaŭbrakante ŝiajn genuojn) Vi, avino, vi ne rifuzas al mi vian amon! Jam sufiĉe mi estas surgenue ĝempreĝinta al Dio, sed li ne kompatas! Ree kaj ree venas la nebridebla kolero, kaj mi ne povas kontraŭstari al ĝi! Dum infaneco mi estis bona, kredu al mi, avino, mi estis bona! Sed kiam ili diris, ke mia patrino estas sorĉistino, kiam ili mortbatis ŝin, kiam ili per insultoj forpelis min de siaj pordoj, tiam! Tiam ĉi tiu kolero kontraŭ ĉiu maljusto pligrandiĝis en mia malgranda koro kvazaŭ malmolaĵo, kaj ĝi estas maturiĝinta kune kun mi, kaj mi ne povas kontraŭstari al ĝi. Mi ne povas kontraŭstari al ĝi, kredu, avino, mi ne povas!

Avino: Kaj en arbaron vi kuras, infanjo, kaj restas tie dum tagoj kaj noktoj!

Tiina (kun emociigo): Ho, avino! En arbaro estas tiom bone... kaŝi la vizaĝon en musko kaj plori... ĝis kiam la kolero — guteton post guteto foriĝas kaj la koro ree malpeziĝas. Tie mi kvazaŭ ne plu volus esti homo, mi volus esti en arbaro, esti libera, libera...

Margus (kun malfermitaj brakoj, sin ĵetante al Tiina): Tiina!

Mastro (retirante Margus'on je la brako kaj turniĝinte al Tiina, kolerege): Lufhomo!

Tiina (salte stariginte, kvazaŭ ekordite de serpento, ŝanceligante; avino delras): Ankaŭ vi diras tion ĉi! (Levas la manojn, kvazaŭ por preĝi — kaj tiam kovras la vizaĝon per ili) Dio kompatema!

Mastrino (ĉe la tablo): Vi ja mem ĉe Johanfajro konfesis vin luphomo, ĉiuj aŭdis! Kial do vi nun volas malkonfesi tion?

Tiina (kun manoj, etenditaj al la mastrino): Ho, patrino, ne riproĉu pro tio, kion neintence diris pro doloro kaj kolero mal-esperanta homo!

Mastro (kun dolora ĉagreniĝo): Neintence? Diru prefere, kiamaniere vi ensorĉis mian filon — kaj igis lin sekvi vin!

Tiina (kun vekiganta fiero): Ne estas mi ensorĉinta Margus'on, nek lin iginta sekvi min, tion scias Margus, tion scias Dio, tion scias vi. Kaj se Margus amas min — (ŝiaj okulaj ekflamas) tio estas pro lia propra volo! Kaj mi — povas nur fieri, ke mi estas gajninta la koron de bonulo kaj — esti sincere humila kaj dankema, ke mi ne estas tute sola kaj forgesita en la granda mondo de Dio...

Mastro (ne plu povas kvietigi sin, preskaŭ krie): Sorĉistino vi estas, kaj la rekompenco de sorĉistino vi iam ricevos, samkiel estis sorĉistino via patrino kaj ricevis sian rekompencon. For de sub mia tegmento, serpentido!

Tiina (kolerege): Kio?! Mi estas — sorĉistino, kaj sorĉistino estis mia patrino...? La korpon de mia patrino en la tero kaj la animeton inter beatuloj vi arogas — kalumnii? Mian patrino, kies infanon vi pro nura kompato prenis al vi, nutris kaj vestis ŝin!

Mastro (forturnigante): Estu malbenita ankaŭ tiu horo, kiam mi faris tion!

Tiina (kvietigante sin, komence malgaje, poste kolere): Ho, prefere vi estus povintaj restigi min viktimo de rabobestoj! Tiam frue estus finiĝinta ĉia doloro kaj sufero. La animo estus reirinta al la patrino kaj en la sinon de Dio. Panon vi estas doninta al la korpo, la animon vi lasis malsati. Vi nutris kaj vestis min, sed vi min ne amis. Al la korpo vi donis rifuĝejon, la animo restis sola, kaj ĝi serĉis animon! Ĝi serĉis vian animon dum dek longaj jaroj kaj ne trovis. Venenon vi estas verŝintaj en mian animon! Kaj nun, kiam mi venas por serĉi helpon kaj amon, al vi, kiuj devis esti miaj patro kaj patrino, nun! nun ankaŭ vi diras: luphomo! Tio pezu sur via animo! Ha!! Tiam eĉ en mia koro estas plu nek infanamo nek dankemo — ni estas kvitaj!

Margus (plende): Tiina!... Kiel vi rilatas al la gepatroj!

Tiina (kiel antaŭe): Ne estas ili por mi gepatroj! Kaj ankaŭ por vi ili ne estas patro kaj patrino, se ili nek amas nek

kompatas vin! (Pli trankvile) Margus! En la granda libro estas skribite: viro forlasos la patron kaj patrino kaj aliĝos al la edzino — (ekiras) — venu!

Margus (malfeliĉe): Kaj — kien? Vi mem pripensu — kien!

Mastrino (kvazaŭ moke): Kien li venu, de kie oni ne povas revenigi vin?

Margus: Kaj kiu nin geedzigos, kiu nin enskribos en la komunuman liston, se mankas la permeso de la bieno!

Tiina: Mi scias lokon, de kie nin neniu revenigos. En arbaro, malantaŭ marĉoj, kiujn eĉ gruo povas transiri nur fluge, estas monto, en la monto — fonto kaj kaverno. Kaj geedzigi? Dio geedzigos nin. Venu, se vi estas mia!

Mastro: Ha! Vane vi logas la knabon! Li havas prudenton en la kapo!

Tiina: Venu Margus!

Margus (estas senvorte malfeliĉa).

Tiina (malĝoje): Se vi ne venos, Margus, do — diru, ke vi ne venos!

Margus: Tio ne estas ja ebla! Tio estus ja frenezo! Ni devas trovi alian vojon, ni devas... (helpopete rigardas la patron kaj patrino, sed vidante iliajn ŝtonecajn vizaĝojn, eksilentas).

Tiina: Vi ne venos?

Margus (malfeliĉe svingas la manojn kaj silentas).

Tiina (al Margus, malespere): Eble eĉ vi kredas nun, ke mi estas — luphomo? Ho Dio! Mi freneziga! Mi ja ne scias tion! Eble mia patrino estis tia... kaj mi!... per la sango heredis tion de ŝi, kaj la veneno... (svingante la manojn) Ho Dio, mi ja ne scias tion! (ŝanceliĝas).

Mastrino (severe): Do vi ne uzu la nomon de Dio, se vi ne scias!

Tiina (kolere): Luphomo... Luphomo... estas ankaŭ besto de Dio!

Mastrino: Luphomo ne estas besto de Dio! Ne taŭgas ĝi pro loĝi inter homoj! Foriru!

Tiina: Se mi eĉ estas luphomo, tamen mi estas besto de Dio! Vi? Aĉuloj! Vi havas nek kuraĝon nek forton, nek amon nek fidon — nenion vi havas! Kaj juĝi vi volas? Vi?! Se mi estas lupo, inter lupoj estas mia loko, eble ĉe ili estas pli multe da justo kaj kompato! (Fiere paŝas al la pordo. Dum la iro ŝia kolero iĝas kortuŝo. Rerigardante sur la sojlo): Adiaŭ, Margus! (Plorante for).

Trad. Nikolai Karotam.



JUHAN LIIV
(1864—1913)

MATENO

Paŝtejon iras bovinar':
til tal! nigriĝas jen bovin',
til tal! resonas nun sen fin'
sur la herbej' kaj en arbar'.

Jam sonas malproksime bru'
nun de l' trumpeto: tu, tu, tu!
Herbejo floras ĉe la pont',
arbar' vidiĝas ĉe la mont',
kaj la landvojo sin
jen perdas en arbara sin' —
okulo plu ne vidas ĝin.

De l' muelejo la najbar'
nun reveturas ĉe l' arbar'.
Li fumas.

Helas sur la kap'
de l' muelisto blanka ĉap'.
Sur kampo paŝas kamparan',
en humon nigran el la man'
jen vidu! semoj falas jam.

Trad. Hilda Dresen.

FALIS FOLIAR'

Ekondadis la akvar',
ondan falis foliar':
ondo estis cindrogrizaj,
la ĉielo plumbogriza,
cindrogriza la aŭtun'.

Tio konformis al la kor',
plena je sentoj cindrogrizaj,
la ĉielo plumbogriza,
cindrogriza la aŭtun'.

Trad. Hilda Dresen.

MIGRANTO

Senlabora hejmen venis
mi de l' urbo. Neĝblovad'.
Lacaj la piedoj. Neĝis.
Kaj turmentis min malsat'.

Mankas vojo, lumradio;
jam malfrua hor'.
Tamen jen, briletas lumo
tie en izol'!

Frapas mi. Permes' afabla —
mi eniras kun plezur'.
Freŝan panon elfornigas
la knabin' — pripensu nur!

Varma ej', aromo dolĉa —
kaj malsat' . . . „Ĉu volas vi,
viro fremda, varman panon?“
Grandan pecon donis ŝi.

Pecon da varmega pano!
Ĝue mi ekmanĝis ĝin!
Varma pan' kaj varma koro,
silentema la mastrin'.

„Vi de kie, kien iros?
Ĉu edzinon havas vi?“
— Mi de tie, tien iros,
nur migranto estas mi. —

„Ĉu gepatroj viaj vivas?
Ĉu gefratojn havas vi?“
— Sola mi! Jen ver' amara,
mortis tuta famili'. —

„Tibi-tibi, tibi-tibi —
la plej granda estas kok' —
kvar kokidojn mi posedas,
vekis ilin la parol' . . .“

Trad. Hilda Dresen.

SONORO

En la infana malgranda kor'
mallaŭte sonadis jam kant-sonor'.

Kaj kiam fariĝis mi juna vir',
sonore ekŝvelis en mi sopir'.

Nun premas min la sonorotrem',
kaj mia koro rompiĝas kun ĝem'.

Sonoras la koro en malliber',
malvasta ja iĝis por ĝi la ter'.

Trad. Hilda Dresen.

ORDINARA RAKONTO

El „DEK RAKONTOJ“.

Ĉiuj rakontoj komenciĝas per tio, ke ie okazas io eksterordinara, ke ie okazos io aŭ ke ie jam okazis io, pri kio restis eksterordinaraj aferoj.

En tiu ĉi rakonto estas nenio eksterordinara. Ĝi ne havas ion alian por rakonti, ol nur pri la malriĉa Punasoo Mari.

Kaj dum la vivo de iu Punasoo Mari efektive okazis nenio eksterordinara, nek en la komenco nek en la fino. Kiel ŝi vivis kaj ekzistis, tiel ankaŭ multaj aliaj estas vivintaj. La krucetoj, kovrantaj la tombejon, unuj hodiaŭ starigitaj, aliaj jam putrintaj, triaj duone renversiĝintaj, kvaraj teren falintaj — ili ĉiuj rakontas pri Mari'oj, kiuj iam naskiĝis, vivis kaj mortis, samkiel Punasoo Mari.

Kiam ŝi estis duonjara, ŝia patrino mortis, kaj kiam ŝi rampante falis de sur la sojlo kaj kontuzis sian frunton, la edzino de la paŝtisto prenis ŝin por eduki. Tie ŝi sidadis sur la planko, volvite en peltpecon, ĝis kiam ŝi komencis iradi.

La patro estis mortinta jam antaŭ ŝia naskiĝo.

Post kiam ŝi estis paŝtinta la porkojn de la vilaĝo kaj kreskinta ankoraŭ proksimume ses jarojn, ŝi ekhavis grandan bonŝancon: ŝi iĝis edzino de bieneta mastro. Se en la vilaĝo la mastrinoj serĉis plaĉan desegnon por siaj ŝtofoj, ili prenis tian de Mari; se la mastrinoj volis montri imitindan ekzemplon al siaj servantinoj, ili nomadis Mari'n; kaj se oni sopiris iam riĉiĝi kaj feliĉiĝi, oni deziris esti simila al Mari; kaj kie almozulo eĉ noktomeze trovis dormejon, tio estis Punasoo.

Punasoo estis la nomo de la bieneto.

Kiam la edzo de Mari mortis, ŝi havis kvin filojn. La plej aĝa ĝoje kantadis sur la paŝtejo, la plej juna kuŝis en la lulilo.

La interuloj ĉiuj kriadis ankoraŭ, ofte samtempe.

Mari tranĉis al unu panon, vestis la piedojn de la alia, antaŭmetis manĝotukon al la tria, mezuris semgrenon al la servistoj, zorgis pri tio, ke estu pagata ĉiujare la kreditkasa sumo, ŝuldata al ĝi, kvankam la edzo jam ĉe la unua pago por la bieneto estis elspezinta sian lastan rublon.

Kelkfoje oni diradis ankaŭ, ke Mari estas ofte severa al la infanoj. Sed provu oni mem obeigi knabojn, provu oni kaj diru tiam! Plie, se vi havus kvinon da ili. Jen ŝulaĉo estas uzita kiel pafarka ŝnuro, jen radŝpinilaj ŝnuroj distranĉitaj por

lignoĉevala kondukilo, jen iu estas vizitinta napobedon, jen la baneja tegmento estas piedrumpita. Kien ajn oni rigardas, Ĉie necesas batoj.

Sed Mari finedukis la filojn kaj, ĉar la tempo estis tia, ke estis permesite ĉiamaniere liberigi sin de la militservo, Mari faris la unuan filon mastro, la duan helpmastro, la trian variol-inokulisto, la kvaran ies adopta filo, la kvinan vilaĝinstruisto.

Ĉiuj restis por si „mem“, kaj si bezonis nenies helpo ĉe tio, samkiel si antaŭe dum la edukado al neniuj plendis pri ili.

La filoj kreskis kiel abioj, la patrino kurbiĝis altere. La patrino ne postulis de ili ian dankon, al la filoj eĉ ne enpensigis proponi ĝin. Eĉ tiam ankoraŭ la patrino donadis saketojn kaj paketojn al la filoj, kiam ili jam mem havis propran mastrumadon. Si al neniuj diris: „Pagu por ili!“

Sed tiam komenciĝis por Mari malfacilaj tagoj. Kvar filoj mortis dum unu jaro. Ilin ĉiujn si akompanis al la tombejo. Kion si hejme faris, kiu tion vidis — sed si kuris al neniuj en la vilaĝo por plori.

Kiam fulmo ekbruligis sian domon, kie la plej aĝa filo mastrumis, Mari estis la sola, kiun oni savis el la fajro. La konstruaĵoj ĉiuj forbrulis.

La nova mastro akceptis Mari'n en sian kabanon.

Kiam si nun, kun bastoneto en la mano, dimanĉe supreniras per malfirmaj paŝoj la preĝejan monteton por ĉeesti la diservon, oni diras al si:

„Petu do de la komunuma malriĉulkaso monon por vi. Vi ja rajtas ricevi.“

Tiam Mari trankvile alrigardas ilin kaj diras:

„Dum miaj fingroj trikmoviĝas ĉe la ŝtrumpo, mi tion ne bezonas.“

„Kiu do donas al vi ion?“

„Jen la mastrino eĉ hieraŭ donis al mi buleton da pano kaj poteton da lakto. Kaj kiom mi, maljuna homo, bezonas!“

Jen la rakonto pri Punasoo Mari.

Trad. H. Sakaria.

SUR PEIPSI!

El „DEK RAKONTOJ“.

... „Ni iru, Rein!“ Jaak rigardas ĉielen — al li estis malfacile diri ĉi tion.

Lia kunulo alrigardas lin demande — ne pro tio, kion li diris — li mem estis dironta la samon al li, — sed la rigardo al la kunulo konsolas lin.

„Ni dronos, Jaak.“

„Se ni dronos, ni dronu je nomo de Dio, Rein.“

Kaj ree la viroj okulmezuras la vastan glaciejon. La vojo estas signita, ili ambaŭ estas bravaj irantoj, ili atingos vespere la hejmon.

„Mi iros, Jaak.“

„Mi ankaŭ!“

„Ni dronu aŭ ne, Jaak.“

„Vivo aŭ morto, Rein. Mia edzino restis hejme tia — ŝi eble mortos pro tio, kaj mi ne vidos ŝin plu, se mi atendas la glacirompiĝon.“

Jaak kaj Rein fervore ekkomencas la vojaĝon, tenante sin je la manoj. Forta sudvento blovas deflanke, kaj grandega nubo kovras la ĉielon, sed iliaj koroj estas kuraĝaj, la artikoj fortaj, kaj la distanco inter ili kaj la bordo rapide pligrandiĝas. Ĉio ŝajnas sukcesi bone. La malserena vetero ne timigas ilin, tagmeze ili estos jam supozeble en la mezo de la lago. La glacio ja estas akvoza, sed ankoraŭ nenie fendiginta.

Nun ekneĝas floke. La vento muĝas pli forte kaj ĵetas neĝon al la vizaĝoj de la viroj. Ili apenaŭ kapablas rimarki la vojsignojn, la vergojn. La viroj iom ekkonsterniĝas, tamen kuraĝe paŝas antaŭen. Konsiderante la tempon, ili estas jam trapasintaj pli ol duonon de la lago, sed tro malfacile estas marŝi pro la forta vento. Ĝi skuas iliajn vestojn, ŝiras iliajn baskojn, kvazaŭ ĝi estus kolera, ke oni ne cedas al ĝia potenco.

Jen — kio tio estas — malproksime io bruas! Kvazaŭ paralizitaj, Jaak kaj Rein ekaŭskultas — efektive malproksime de la venta flanko bruas — akvo! La glacio de la lago estas rompiĝanta. La viroj ja ankoraŭ ne vidas ĝian rompiĝadon, sed al ili estas konata tio, kio okazas tie malproksime: la akvo saŭmadas, la glaciopecoj dancadas kaj, krakante, la ondoj derompas pecon post peco — terure, terure!

¹ Granda lago en Estonio.

„Ni ne estas saveblaj, Jaak!“ ekkrias Rein, demetas la ĉapon, ekpreĝas Patro-nian. — „Antaŭen, Jaak!“ li ekkrias tiam.

La viroj rapidas, la bruado plifortiĝas. La glacio ĝemegas kaj tremadas sub la piedoj. „Antaŭen, antaŭen, rapide, rapide!“

Momenton la viroj haltas. Oni demetas la zonojn, kunligas, kaj kiam la konjektita longeco ne estas atingita, oni distranĉas la pansakojn je strioj, tordas kaj alligas ilin. Ambaŭ volvas po unu finaĵon ĉirkaŭ siajn manojn. Se unu enfalos, la alia povos lin eltiri — ne estas plu eble, ke la glacio restos longe ne rompiĝanta. Ĉio ĉi okazas rapidege. Ili promesas reciproke prizorgi siajn edzinon kaj infanojn, tio estas, se unu el ili saviĝos. Antaŭen, antaŭen! La bruado plilaŭtiĝas, la vento iĝas vera uragano, flokneĝegas kvazaŭ el sako — ho Dio, ho Dio!

„Mi donacos al la preĝejo kandelabron, se mi saviĝos,“ ekkrias Rein. „Ho Dio, ho Dio!“

Jaak respondas nenion, sed en sia koro li promesas neniam plu batadi sian edzinon, se Dio ankoraŭ savos lin, neniam aspergi la vendotan linon por trompi la komerciston, neniam en la herbejo de la najbaro nokte paŝti la ĉevalon, neniam dormeti en la preĝejo dum prediko, neniam miksi grenventumajon en la grenon, donotan por komunuma grenejo — nenion, neniam fari ion similan.

Se iu fidela pastro estus povinta rigardi en tiu ĉi momento en iliajn korojn, kiel li estus ĝojinta!

„Rapide, rapide, ho Dio, ho Dio!“

„Ho Dio, ho Jezuo!“

„Se ni havus ankoraŭ unu horon da tempo, ni saviĝus. Jam klare estas aŭdebla la krakado de la glacio — se ni havus ankoraŭ unu horon da tempo! La tero ne povas plu esti malproksime. Rapide, rapide! . . .“

La akvo ŝprucadas de sub la botoj, estas jam tiom multe da ĝi sur la glacio. Jam — ho, jam nigras la turo de la preĝejo de Lohusoo, sed jam videblas ankaŭ la akvo!

Ankoraŭ proksimume kvin verstoj . . .

La glacio tremegas, ĝemas, fendoj eniĝas. Se ni havus ankoraŭ duonhoron da tempo — ho Dio!

Versto . . .

La glacio fleksiĝas sub la piedoj — klare sentiĝas, ke ĝi estas mola kiel kaĉo, sed ankoraŭ ĝi kunteniĝas — ununura forta ondo, tiam ĝi povas esti rompiĝinta. Ununura vorto estas sur la lipoj de la viroj, ununura: Dio.

Duono da versto . . . De unu glacipeco sur alian saltadas la viroj, pli ol unufoje ili estas eltirintaj unu la alian el la akvo, ankoraŭ estas luktantaj vivo kaj morto.

Ankoraŭ — ?

„Ha, diablo, tero!“ Rein ekkrias, ĝis la genuoj en la akvo, kien li estis falinta de sur glacipeco, — „Jaak, tero, diablo, la piedoj estas jam sur la fundo!“ — — — — —

„Kandelingo estas kandelingo“, pensas Rein kaj donacas anstataŭ kandelabro malgrandan kandelington.

Kiam Jaak post semajno iras por forporti linon al la komercisto, li per verg-ligaĵo aspergas ĉiun faskon da ĝi: „La impostoj estas grandaj — por komercisto unu-du rubloj pli aŭ malpli signifas neniom.“

Trad. E. Lübek.



JAKOB LIIV
(1859)

KORO DE POETO

El „KANTOJ“.

Animo juna, se pro kanto vi ekbrulas,
Brilege pura estu via sent',
Bruligas ĉie fajron vi per la talent',
La koroj vian kanton respegulas.

Oferon grandan la talento ja postulas, —
La koro virte kresku en silent';
Alie kanton vian brua vent'
En la dezerton sen kompat' forrulas.

Ja ĉiu harposon' de via kanto
Atestas pri senkulpa via kor'
Kaj al la mondo konigadas ĝin.

Kaj por ke povu esti vi gvidanto
Per via kant' al ĉiu homanim'...
Per via koro sin mezuru ĉies kor'.

Trad. Hilda Dresen.

RANOJ

El „KANTOJ“.

Sopiris ranoj je defend',
Al Taara' iris kun ĉi plend',
Ke regu en la marĉo leĝ',
Ke ilin gardu bona reĝ'.

„Por ke ne ŝarĝu vin impost',
Por ke malgranda estu kost',
La reĝo estu lignoblok',
Ĉar bona estas ĝi apog'.“

Eksonis kvake jena kri':
„Ne volas tian reĝon ni!
Senviva blok' ne gardos nin,
Malsaĝa estas ĝi sen fin'.“

Kaj iĝis tiam laŭ deklar'
La gruo reĝo de l' ranar'.
Regadas nun bonege ĝi,
Mangante ilin kun pasi'.

Trad. Hilda Dresen.

¹ Ĉefdio de la estonoj.

ERNST PETERSON

(1868)

HELPU!

El la kolekto „ABSCESOJ“.

4.

... Eta lada lampo lumigis la kabanen ĉambron, kie loĝis la familio de Toomas Kiisk. La kabano iam efektive estis estinta banejo, nun neniu estis lavinta sin tie krom la familio de Toomas. Ĉar la domo iam estis konstruita sen ŝtona fundamento, la malsupraj traboj estis tute putrintaj kaj eniĝintaj unu en alian, pro kio la domo videble malaltiĝis, tiel ke oni estis devigita eniri nur tute kurbiĝinte.

Ekstere la kabaneto havis tute kadukan aspekton. Ĝi kvazaŭ plendis pri sia mizereco, kiel maljunulo, kiun konsumas reŭmatismo, kies membroj estas kuntiritaj, dorso ĝiba kaj gamboj kurbaj. Ĝian tegmenton konsistigis disŝiriginta, elstariĝinta diversaga pajlo, tiel ke ĝi kelkloke estis griza, blanka, nigra. Sur la eĝon estis metitaj ŝtonoj, tabuloj kaj ŝtipaĉoj, por ke la vento ne forblovu la lastajn pajlorestaĵojn. En la tegmento estis multloke videblaj tegmentstangoj kiel ripoj de malgrasiĝinta ĉevalo.

Des pli mizera estis la domo ene.

Kvar muroj, en angulo granda plata

forno — ĉiuj tiel brile-nigraj kiel cirumitaj botoj. Apud muro eta tablo, en angulo malnova ŝranko, sen seruro, kun pendanta pordo, ĉi tie kaj tie pendaĉas vestoj de sur enmurigitaj najloj kaj de sur lignaj hokoj — jen la tuta ornamaĵo kaj havaĵo de la domo. Malgranda lada lampeto, lumiganta la ĉambron kaj pleniganta ĝin per flavelgriza malvigliganta nebulo, fumigante sur la apenaŭ kelkfuta fenestro, aspektigis la domon ankoraŭ pli malgaja kaj saturis ĝian malfreŝan aeron per fortaodoro de petrolo.

En ĉi sufokaera domo vivis jam kelkajn jarojn Toomas Kiisk kun sia edzino Juula kaj kvar infanoj — Sassa, Toodi, Robi kaj Leeni, el kiuj la plej aĝa estis dekdujara, la plej juna apenaŭ dujara. Toomas estis en Oheliku jam pli ol kvin jarojn, farmopagis al la mastro jen mone jen labore, kaj vintre li laboris kelkfoje aliloke, kiam li nur havis tempon.

Toomas estis tre laborema kaj tutforte penis nutri sian familion; sed unu malbonan eon havis Toomas — li iufoje drinkis, kaj tiam li estis kolerema kaj malpacema.

Sed la edzino Juula estis malsanema homo, ŝi iradis kurbiginte kaj malrapide: ŝi estis difektinta sin dum la lasta gravedeco. Tio kaŭzis, ke Juula plu ne povis multe kunhelpi je vivsubteno de la familio, ŝi nur vartis la infanojn kaj pretigis la manĝaĵojn.

Sed la infanvartado kaj kuirado kaŭzis al Juula plej multe da malfeliĉo, estu la afero kiom ajn malbona, tamen ĝi estis vera.

Rilate al la infanoj Juula estis senenergia kaj cedema. Kvankam ŝi mem ne konsciis tion, ili superis ŝin.

„Ho Dio, Dio, la viroj estas efektive malpacemaj!“ plendis Juula ĉiam, kiam ŝi iufoje ne sukcesis obeigi la filojn.

Sed kiam la infanoj ŝin kolerigis, ŝi kulpigis pri ĉio Toomas-on, de kiu laŭ ŝi la infanoj lernas ĉian malsaĝaĵon. Se okaze Juula punis ilin iufoje, la infanoj kuris al la patro, kaj tiu diris: „Jen, satano, ŝi volis vin bati! Atendu, atendu, ŝi jam ricevos!“ — Sed la okuloj de la knaboj brilis nur, kiam la patro eldiris similan arogaĵon. Sed fine la afero iĝis tia, ke la knaboj, pliaĝigante, komencis antaŭe insulti kaj poste bati la patrinon, ĉar la patro mem estis ĉi-rilate bona ekzemplo.

Sed ĉi ĉio ne pensigis Juula'n tion, kiam la pretigado de manĝaĵo. La interrilatoj kun la infanoj estis bonaj, kvankam iufoje okazis malpacoj, sed kiel ŝi pretigu manĝaĵon, se mankis el kio fari ĝin. Aŭtune Juula ankoraŭ havis ion, sed kiam pasis Kristnasko, kiam la bovino ĉesis doni lakton, tiam la mizero estis granda. Sed la mizero iĝis ankoraŭ pli granda, kiam Toomas iufoje ne iris labori, manĝis hejme kaj poste iris



ien kaj forestis dum kelkaj semajnoj. Tiam la mizero iĝis tia, ke Juula iris al la bieno al la gemastroj de Oheliku por pruntepreni.

Tia malfeliĉo trafis Juula'n ankaŭ nun. Dum Kristnasko ĉio manĝebla estis konsumita. Toomas estis tuj post Novjaro ironta al laboro. Juula iris al la bienanoj kaj prunteprenis je konto de la someraj laboroj farunon por baki unufoje panon. Kvankam la mastro Madis estis dirinta, ke li ne povas doni, ĉar Toomas ne volas labori por li, sed iras aliloken por pri-labori linon, sed kiam Juula insistis ekpetis, tiam la mastro permesis, sed li admonis Juula'n, ke ŝi ne estras Toomas'on.

„Ho Dio, kion mi faru, mi devas atenti, ke mi mem ne estu batota,“ ĝemis Juula, kaj ŝiaj okuloj brilis pro larmoj. „Ĉu ĉio ĉi estis necesa!“

Juula bakis la panon. Unun ŝi kundonis al Toomas, alian ŝi donis al la filo en la lernejon, kaj du panoj restis hejme por kvar homoj.

Toomas promesis baldaŭ post Epifanio veni hejmen kaj alporti monon, sed jam pasis preskaŭ semajno de post Epifanio — kaj Toomas ĉiam ankoraŭ ne estis veninta. Juula penis esti ŝparema, signis per krucoj sur la pano la ĉiutagan porcion, sed vane! La pano estis malaperanta nerimarkeble. Ŝi provis kuiri pansupon kun maltaĵo, sed la infanoj manĝis tiam ankoraŭ pli multe.

Juula koleriĝis, kiam ŝi vidis, kiel la infanoj neniigas la nutraĵon.

„Di-sinjoro,“ riproĉis ŝi sabate vespere, kiam la nutraĵo estis tute finiĝonta, „kvazaŭ malsatuloj! Nu, manĝegu, manĝegu, baldaŭ estos nenio por manĝi!“

„Patrino, donu iom por manĝi, patrino, donu panon!“ kriis Toodi kaj Robi; Leeni estis iom pli silenta.

„Ne estas!“ diris la patrino, „patro aŭ Sassa venos hejmen, tiam vi ricevos!“

„Donu tuj pano-on,“ kriis la pliaĝa Toodi, kiu estis tre malbona kaj malpacema knabo.

„Fermu vian buŝaĉon!“ depuŝis lin la patrino, kiam Toodi alkruciĝis al ŝia mano, „deiru do iom, sovaĝulo; vi manĝas la okulojn for el la kapo kvazaŭ korvo. De kie mi prenu panon?“

La knabo koleriĝis, ke la patrino depuŝis lin, li purigis per maniko sian nazon, kiu gutis la tutan vintron.

„Panon donu, panon donu!“ — li subite ekploretis, kolere pugnobotante la patrinon.

La patrino ekkaptis la knabon je orelo kaj skuis ĝin.

La knabo ekkriis laŭtvoĉe, ambaŭmane tenante la oreleon: „Patrino, vi, diablo, elŝiris mian orelo-on!“

„Fermu vian buŝaĉon!“ ektondris la patrino, „kvazaŭ lupidoj: de kie mi prenu panon? Jen, prenu, manĝu la lastan pecon!“ Kaj la patrino ĵetis la panfinaĵon al la knabo.

Ĉi tiu ja eksilentis, sed la du malpligrandaj nun ekploregis: „Patrino, mi volas panon — denove-e-e!“ plendkriis Robi, kaj Leeni ploris tiel, ke la larmoj fluus malsupren laŭ la vangoj.

„Dio!“ plendis la patrino, kiu, batalante kontraŭ la infanoj, sentis sian forton tute elĉerpiĝinta. „Ke tiu Sassa ĉiam ankoraŭ ne venas!“ — kaj ŝi eliris por rigardi, ĉu la edzo aŭ la filo venas.

La plejaĝa filo Aleksander¹ ne estis ankoraŭ reveninta el la lernejo, kvankam jam estis mallume. La patrino supozis, ke eble Sassa¹ malsaniĝis. Tiam ŝi pensis ankoraŭ, ke la filo, venante hejmen el la lernejo, alportos panon. Ŝi estis instruita al la filo, ke, se la aliaj restigas krustojn, li kolektu ilin kaj alportu hejmen en la sako. Ili estus taŭgaj por la bovino, sed dum la nuna mizero ili estus povintaj taŭgi ankaŭ por alia celo. Sed la knabo ne venis!

En la kabano la infanoj ne ĉesis kriegi.

„Di-sinjoro!“ ĝemis Juula, „neniu edziniĝu, precipe se oni estas malriĉa!“ Nenio krom mizero kaj mizero kaj precipe, kiam oni malsaniĝas!“

Ŝi ja estis doninta al la infanoj belajn nomojn, por ke ĉi tio helpu — Aleksander, Teodor, Robert, Helene — ili ĉiuj estis destinitaj por doni al la infanoj ion bonan, sed ĉi ĉio ne okazis.

Kaj Juula eĉ ne penis instrui la infanojn. Ke ekzemplo estas instruo, estis al ŝi same malklara kiel tio, ĉu konvenas ordoni al infano porti hejmen restintajn panfinaĵojn aŭ ne. Ili estis ja forĵetitaj de la aliaj kaj restigitaj. — Kaj kiam Juula estis havinta tempon por klarigi ĉi ĉion al si? Ŝi estis edukiginta same kiel ŝiaj infanoj. Pri sia korpo ŝi estis devigita zorgi de mateno ĝis vespero.

Kaj tiam venis Toomas.

Sed la vivo ankoraŭ pli malfaciligis. Apenaŭ infano estis naskita, kiam Juula devis ree eklabori sur la kampo, komence kunportante kun si unu, poste du kaj fine tri infanojn, kiuj terure malhelpis ŝin ĉe la laboro, malŝparis ŝian tempon kaj mortlacigis ŝin. Juula bone komprenis, ke la infanoj estas por ŝi puno, sed ne beno, kaj ofte, kiam unu el ili estis malsaneta,

¹ Sassa — mallongigo de Aleksander.

ŝi pensis: „Pardonu Dio la pekojn, sed...“ — ŝi interrompis la frazon kaj preĝis, kvazaŭ ne konsciante „Patro nia“.

La vivo estis preninta multon de
drinkeman kaj malpaceman edzon, kvar malbonajn infanojn kaj
porciaman internan malsanon.

La malvarmo ekstera tremigis siajn malvarmajn
ojn, ŝi volis iri en la ĉambrojn, sed estis tiom abomene eniri
tien: la infanoj daŭrigis kriiĉi laŭtvoĉe.

Antaŭ ŝiaj okuloj je la distanco de proksimume kvaron-versto sur la pli alta montodorso nigris la silueto de la bieno Oheliku, kie estis videbla briletanta lumeto. Juula ĝemis. Nek ŝi povis, nek malamo estis en ĉi tiu ĝemo, kvankam Juula kun siaj fratoj estis en sama vilaĝo. Ŝi estis ankoraŭ longe starinta ekstere, sed la malvarmo igis ŝin eniri.

„Hej! lupoj venas!“ ŝi kriis subite, ĵetfermante malantaŭ si la pordon. „Bite eksilentis; sed vidante neniun postsignon

La infanoj subite eksilentis; sed vidante neniun postsignon de timo sur la vizaĝo de la patrino fulmobrilis pro kolero; ŝia

La pala vizaĝo de la patrino fulmobrilis pro kolero; ŝia pacienceco finiĝis. Ŝi sentis, ke la infanoj estas ŝiaj turmentantoj, kaj subite ŝi orelabatis Tood'n, kiu pleje kriegis.

La knabo kvazaŭ senkonsciigis pro la bato, poste li ekre-
jetis la kapon kaj kvazaŭ eta kato atakis la patrinon.
„Diablo, diablo, diablo...” li kriis kaj pugnobatis la
patrinon.
„Si demanoi!” ekaŭdigis subite basa kolera

„Bonan vesperon, ĉi-domanoj!“ ekaŭdiĝis subite basa kolera
voĉo en la krio kaj bruoj. Anton¹ eniris.

„Kian militon do vi havas ĉi tie?“ li demandis. „Mi venis viziti ankaŭ vian familion. Vi ja interbatadas?“

La infanoj silentigis. Ankaŭ la patrino estis iom embarasita; tiam ŝi resalutis kaj diris: „La forto de mi, malfortunulo, ankaŭ plu ne sufiĉas! Ili elŝiris la okulojn! Veraj idoj de Toomas! Ĉi tiu Toodi estas kvazaŭ aglo! Mem apenaŭ okjara, sed bategas maturulon!“

„Nu, Toodi!“ riprochis Anton, „oni vergos vin!“

"Vin mem oni vergos!" grumblis Toodi kolere.

„Jen knabo!“ mokis Anton, „ĉu do vi min efektive vergos?“

Kaj li demandis la patrinon: „Pri kiuj gravajoj do vi disputis ĉi tie?“

¹ Servisto en la bieno Oheliku.

„Kiaj gravajoj! Neniaj. Sed la knaboj estas malsataj. Toomas forestas, pano ne ekzistas, ili malpacas pro la lasta panfinaĵo!“

Anton ekpensis. Li ekmemoris eble ion el sia vivo. Ĝi estis estinta same malriĉa kaj mizera kiel tiu de Juula. Tute juna li perdis sian patronon kaj en la aĝo de dek tri jaroj — la patron, kiam li jam estis vizitinta la parohlernejon dum unu kaj duono da vintroj. De tiam li estis servinta fremdulojn, esperinta je pli bonaj tagoj, sed ne vidinta ilin. Je lia zorgo estis la malgrandaj frato kaj fratinino, por kies vivsubteno li uzis sian tutan forton. La vivozorgoj estis influantaj ankaŭ lin, tamen iom alimaniere ol Juula'n. Denature vigla, li komencis baldaŭ kompreni sian ĉirkaŭon kaj rimarkis baldaŭ, ke la vivo ne estas bagatelo. Ĉar en sia frue maturiĝinta cerbo li kreis al si mondkoncepton, kiu igis la aliajn, precipe Oheliku Madis'on opini ilin malagrabla, malbona. Anton rimarkis tion, kaj lin ĝojigis, ke li tamen povas iel rekompenci al la mondo la bonon, kiun li estis ricevinta de ĝi. Oheliku Madis kun sia grasa pia vizaĝo estis ĉiam malsimpatia al Anton, precipe liaj ĝemoj pri aliaj, celantaj lian propran profiton. La pieco de Madis estis abomena al Anton, ĉar li krom vortoj nenion vidis pri la pieco de Madis. Kaj tial li penis, kiam li nur povis, mokinciti sian mastron... Madis ne ĉiam atentis ĉi tion, sed opiniis sia sankta devo montri al tia pereanta mandano la ĝustan vojon, kio tamen multe amuzis kaj bonhumorigis Anton'on.

„Ĉu Madis plu ne donas?“ demandis Anton post la plendo de Juula.

„Li eble donus ankaŭ, sed al mi estas malagrabla tien iri! Malnova ŝuldo estas ankoraŭ pagenda! Ho, Dio!“ daŭrigis la virino, „vi, Antonio, ne edziĝu! Tio donos al vi nenion krom mizero! Labori oni ne povas; Toomas drinkas! Mi ankaŭ provis ŝpini por najbarino Anu! Ho, Di-patro, sensukcese! Tio granda doloro en la koro, treure! Mi kuŝiĝus, sed ĵen la korvoj!“ Patrino, mi volas ĉi tion, patrino, mi volas tion! Ho, Dio! Mi por nenio plu taŭgas!“

Kaj brilaj larmoj ruliĝis laŭ la vangoj de Juula.

„Patrino, mi denove volas panon!“ grumbliis Robi kaj al-
rigardis la patrinnon.

Nun Anton plu ne kapablis elteni. Li sciis tre bone, kio estas mizero. Li estis post bano vestinta sin per sia nova vesto, kiun li surhavis lastdimanĉe ĉe la preĝejo. En ties poŝo li havis duonrublon da mono. Ne longe luktinte kun si mem, li enigis

la manon en la vestopoŝon, kaj kvazaŭ honteme li etendis la monon al Juula.

„Prenu, jen estas 50 kopekoj; alportu de la mastrino al vi farunon kaj pretigu farunsupon, por ke la infanoj povu manĝi.“

„Ne, mi ĝin ne prenos,“ kontraŭstaris Juula, „ho, kiam mi povos repagi al vi tiom da mono!“ Sed ĉi tion ŝi diris pli pro kutimo, ol pro veremo.

„Prenu, prenu,“ persvadis Anton, „Dio repagos.“

„Ho, dankegon, bonulo!“ respondis Juula, kaj laŭ ŝia malgrasiginta vizaĝo glitis freŝa rido, tia rido, kiu atestas, ke oni kuraĝas ankoraŭ vivi, ankoraŭ esperi, ankoraŭ atendi.

„Infanoj, estu nun silentaj, mi iros al la bieno kaj petos vendi al mi farunon, poste ni bruligos fajron kaj kuiras farunajon, tiam ni satmanĝos kaj enlitiĝos!“

Tia diro ridigis ankaŭ la infanojn. „Mi povas ja dume resti ĉi tie!“ opiniis Anton.

Juula foriris.

... La kabanmastrino envenis. Ŝi salutis malkuraĝe, ekvidante en la varma ĉambro la satan familion, kiu ŝajne diskutis pri io grava. Al ŝi estis malagrabla malhelpi ilin en la interparolado.

Post la saluto ŝi eksilentis, restis ĉe la pordo, kvazaŭ volante tuj eliri, sed tamen ŝi ne povis tion fari. En la ĉambro neniu volis ekparoli. La mastro pensis: „Pri la lupo rakonto kaj la lupo renkonte!“ kaj demandis, post kiam neniu ekparolis: „Kian novajon havas la kabanmastrino?“

Juula kvazaŭ hontis diri, tiam ŝi respondis konfuzite: „Mi volus iom paroli kun la gemastroj.“

„Do parolu!“ kuraĝigis Madis, dum li forigis per la mano varman ŝviton de la frunto kaj deŝiris ĝin je la pantalono.

Juula ne volis komenci.

„Ĉu ia sekreto?“ demandis la mastrino.

„Kian sekreton mi havu?“ diris Juula kun amara rido, „mizero ne permesas honti: mi petus de la gemastroj iom da faruno! Toomas ne estas ankoraŭ hejme, kaj la infanoj volas manĝi, la bovino ankoraŭ ne donas lakton.“

Oheliku Anu ekrigardis Madis'on, kvazaŭ volante rememorigi lin pri io. La vizaĝo de Madis iĝis larĝega kaj serioza, tiam li diris per pli abrupta voĉo ol ordinare: „Ĉu tiu faruno, kiun vi ricevis post Kristnasko, estas jam trakorpigita?“ Kaj por konfirmi ĉi tiun fakton, li aldiris: „Nu, vi havas efektive tubegojn en la korpo!“

Juula sentis turmenton, aŭdante tian maldecan parolon, tamen ŝi devis toleri tion: mizero ne permesas honti.

„Kiom do vi nun volas ricevi?“ demandis la mastrino.

„Tiom, kiom oni ricevas por kvindek kopekoj,“ demandis Juula.

„Do por mono?“ esplordemandis Madis scivole, kaj lia voĉo iom pligajigis. „Sed la malnova ŝuldo?“ li demandis denove severe.

„Estus bone, se la mastro prokrastus,“ parolis Juula, kio en ŝia lingvo devis signifi peton.

„Prokrastu, prokrastu?“ malkontentis Madis, „kiom mi prokrastu? Vi ĉiam prunteprenas kaj prunteprenas, manĝas tiom, ke la buŝoj ŝaŭmas, dormas kaj maldiligentas hejme! Mi devas labori, penegi! Mi ne scias, kiel ordigi ĉion! Trian fojon mi jam ŝvitas, kiam vi ankoraŭ dormas. Tio ne taŭgas, se tiel, havigu al vi ĝis la Georga tago novan loĝejon!“ — Kaj same severe li demandis: „Kie estas Toomas?“

„Toomas iris al Laiapära por kombi linon!“

„De kie vi do prenis la monon?“

„Mi havis ankoraŭ ŝparaĵon,“ respondis Juula.

* * *

„Kiom da faruno mi do donu, la kabanmastrino eble volas ion ankoraŭ fari?“ demandas la mastrino la edzon.

La edzo pensis, ree viŝante sian frunton:

„Mi opinias, ke tute ne valoras doni, kaj la kvindek kopekojn donu ankaŭ kiel pagon de la antaŭa ŝuldo!“

„Ho, kara mastro!“ ekpetis Juula, retenante la larmojn, kontraŭvole eliĝantajn, „la infanoj havas nenion por manĝi! Mi ĉion repagos, mi faros laĉojn aŭ por bastŝuoj aŭ por pastloj¹, se volas la mastrino, sed donu tamen! Mi irus al Aru, sed la konscienco ne permesas, vi opinius, ke havante monon, mi portas de aliloke, sed prunteprenas ĉi tie!“

„Nu, kiom do oni ricevas por kvindek kopekoj?“ kalkulis Madis, kiu ankaŭ ekcedis, pli pro honto antaŭ Vokikeps², ol pro bonvolo, „ĉetveriko³ kostas nun 9 rublojn, lofo⁴ — tri, kvaronlofo 75 kopekojn! Do donu al ŝi iom pli ol okonon da lofo! Kaj la mono?“ li demandis, etendante la manon.

¹ Speco de estona senkalkanuma kamparana leda ŝuo.

² Nomo de komunuma maljunulo-almozulo en tiu vilaĝo, subtenata de ĉiuj bienposedantoj laŭvice.

³ Rusa mezuro.

⁴ Mezuro, uzita nur en baltaj ŝtatoj.

„Jen la mono!“ diris Juula kaj metis la duonrublon sur la tablon antaŭ Madis'on.

Anu kaj Juula eliris el la ĉambro.

Tuj post kiam Juula estis reveninta hejmen, oni surfajrigis kaldronon por boligi sekalfarunan supon. Ho, kiel nun la etularo helpis la patrino! Toodi dehakitis per hakilo maldikajn splitojn de seka ŝtupo por pligrandigi la fajron kaj rapidigi la boligon! Baldaŭ la kabano plenigis je fumo, kiu eligis sian akvegrikan langon tra surporda fendo, de kie ĝi bele kaj egalspirale suprenigis al la tegmentrand.

En la sama tempo ankaŭ Sassa revenis hejmen el la lernejo. Li tre koleris kaj, eĉ ne salutinte kaj dirinte nenium vorton, li ŝetis la malplenan pansakon sur la ĉefenestran tablon, kraĉis kaj brue falkuŝigis sin sur la liton.

La eta Robi kuris al Sassa kaj ekkriis:

„Sassa, Sassa, ni pletigas falusupon!“ —

„Foriru!“ Sassa diris kolere kaj depuŝis Robi'n.

La patrino kolere alrigardis Sassa'n. Sed kiam ŝi tiu daŭrigis tie kuŝi kiel mortinto, ŝi demandis per kunsentema voĉo:

„Ĉu vi malsanas?“

Sassa respondis nenion.

Post iom da tempo la patrino iris al Sassa, surmetis la manon sur lian frunton kaj demandis ankoraŭ pli ame: „Ĉu via kapo doloras?“

La eta Leeni demandis ankaŭ: „Ĉu la kapo de Sassa doloras?“ Toodi kaj Robi tute ne havis plu tempon por rigardi Sassa'n: ili estis okupitaj ĉe la kaldrono.

„Ne demandu!“ tradentigis responde Sassa kaj ekinsultis, „mi tiom koleras, ke mi lin, aĉulon, manĝus sen salo!“

„Kio okazis al vi?“ demandis ree la patrino, ne tre atentante tion, ke la filo scipovas tiel bele esprimi sin.

„Mi diris al vi: ne demandu! Silentu kaj donu ion por manĝi!“ ordonis Sassa kvazaŭ maturulo, kiu pasigis jam longan penplenan vivon. Pro tia maturula parolo la patro ĉiam laŭdis lin, kaj Sassa penis ankaŭ uzi dum la parolado insultajn kaj aliajn vortojn de maturuloj.

La patrino ĉesis demandi la filon. Sed ĝuste ĉi tion Sassa ne povis elteni kaj, kvazaŭ parolante al si mem, li ekinsultis: „Nu, li estas ĉevalo, efektive! Kvazaŭ la maljuna kastrita ĉevalo de la gemastroj. Kaj ĉi tiu do estu nomata instruisto?! Kvazaŭ freneza,“ kaj Sassa finis ree per blasfemo sian rakonton.

„Kion li faris al vi?“ subite demandis Juula, kies voĉo montris, ke ŝi poras la filon.

„Li turmentas kvazaŭ negron, satano!“ daŭrigis la knabaĉo, ne malhelpate de la patrino. „Diabla aĉulo, mi — ŝtelisto?! La tutan semajnon torturas onin kvazaŭ ekzekutisto! Mem iras al Tomilga. Mi atendas, atendas: jam mallumiĝas; neniu! Fine li venas. Li, sonĝo de kastroĉevalo, estis forgesinta, ke mi staras en la angulo! Li envenas: „Ho, Sassi!“ diras la aĉulo: „vi ĉiam ankoraŭ ĉi tie! Iru nun hejmen: lunde ni likvidos la aferon!“ Sed tion mi diras: mi plu ne vizitos la lernejon, eĉ se vi mortbatus min!“ Kaj la knabo ekploris spiteme.

La patrino aŭskultis. Ŝia koro ekbatis. Ŝi sentis klare, ke oni agis maljuste al la knabo, alie li ne estus parolinta tiel.

„Patrino, Sassa ploras!“ diris Leeni. Ankaŭ Toodi kaj Robi ekaŭskultis.

„Vi ja estus povinta bati lian buŝaĉon!“ instruis Toodi apude. Sassa daŭrigis plori.

„Ne kriaĉu, Sassa!“ kuraĝigis la patrino, „mem vi estas plenkreska, kiel vi krias?! Rakontu, kiel tio okazis. La patro baldaŭ venos hejmen, tiam ni rakontu al li; la patro jam montros, kio tio estas: tute senkaŭze ĉikani infanon de malriĉuloj. Rakontu nur ĉion malkaŝe.“

Kiam Sassa vidis, kiel la patrino kunsentas lian doloron — alimaniere tio eĉ ne povis esti: la patrino sciis tre bone, kiel oni traktas en la mondo la malriĉulojn kaj iliajn infanojn, — tiam Sassa ĉion malkaŝis, kiel malaperis subtilsekala pano de Lehtmetisa Anni, kiel la knaboj lin mokincitis, kiel la instruisto opiniis lin ŝtelinto, kiel li kontraŭparolis, staris en la angulo, kiel la instruisto lin spionis, spionigis la knabojn, kaj kio fine okazis sabate.

„Kaj kie estas la krustoj, kiujn vi kolektis?“ demandis la patrino.

„Ĉe la instruisto! Li manĝaĉas ilin nun!“

„Jen envuloj,“ opiniis la patrino, „eĉ pankrusteton oni ne rajtas preni! Dio scias, kio fine okazos? — la tero estas posedaĵo de la mastroj, la beroj kaj la birdoj apartenas al la sinjoroj, la pankrustoj, kiujn faligas la infanoj — ili apartenas al la instruisto — fine oni devas bestigi: fosu per la nazo la teron, aŭtune oni vin ankoraŭ bone manĝigos, kaj tiam surtabliĝu! — Do, kiu prenis la panon de Anni?“ la patrino demandis fine.

„Juku el la bieno, la favorato de Oheliku-onklo!“ ridaĉis Sassa. „Li ĝin manĝis, sed ĉu iu miaspeca rajtas diri! Sed kiam mi maturiĝos, mi jam montros al li, satano, kie estas nordvento.“

Malantaŭ la pordo aŭdiĝis bruo. — Sassa haltis — kaj eniris Toomas, kun sako surŝultre.

„Patro venis!“ kriis Toodi kaj Robi kune, ankaŭ la eta Leeni kriis: „Patro venas!“

La patro venis hejmen kaj alportis panon kaj alian nutr-ajon, sed li ŝajnis esti tute ebria. Ĉi tion Juula rimarkis jam de malproksime: la vizaĝo de Toomas ardis kiel fajro-rozo, la paŝoj estis malregulaj, la parolo lispas, kaj la okuloj brilegis, malice ridetante.

Tien, kien Sassa estis ĵetinta sian pansakon, ĵetis ankaŭ Toomas sian portafon, parolante dum tio nenium vorton. Li ĉirkaŭrigardis en la kabano kaj, kiam li trovis ĉion sur sia loko, li sidigis ĉe la tablo sur tabureton.

Ankaŭ Juula diris nenium vorton, sed ŝajnigis sin okupita ĉe la fajrujo.

La infanoj estis jam kutimintaj al la kapricoj de la patro: ili sciis tre bone, ke, kiam la patro, revenante hejmen, aspektis ridetanta, li ne havis bonan humoron. Ili evitis la patron; la vizaĝo de Leeni serioziĝis, ŝi rigardis fojlon la patron kaj tiam ekkaptis la jupon de la patrino.

Toomas tusetis. Juula ekrigardis Toomas'on: tia tuseti ne signifis bonon. Poste ŝi ĝemis por si mem: „Ho Di-sinjoro!“

„Nu-u!“ estis la unua vorto, kiun Toomas diris; sed ĉi tio sonis tiom moka, tiom malsate. „Ĉu tiel do oni akceptas la patron? Infanoj, venu saluti vian patron!“

Neniu el la infanoj moviĝis de la loko.

Ili jam sciis, ke la patro similokaze preskaŭ turmentas ilin per salutado, dum alio-kaze ĝi neniam estis necesa.

Sed ĉi tiu malobeado de la infanoj kaŭzis ĉiam hejman malpacon. Toomas ekpostulis perforte, la infanoj ekkriis, kaj Toomas iĝis des pli kolera.

„Juula! venu ĉi tien!“ ordonis la edzo kolere.

„Kion vi volas?“ la edzino demandis per plenda malkontenta voĉo, per tia voĉo, en kiu sonis tedi.

„Venu ĉi tien!“

„Ĉielo, eĉ manĝaĵon li ne lasas pretigi, kvazaŭ freneza!“ Kaj Juula restis kun ĉiuj siaj infanoj ĉe la kaldrono.

La kontraŭstaro de Juula ekscitegis Toomas'on. Li sciis tre bone, ke la edzino konas liajn humorojn kaj ankaŭ iliajn sekvojn kaj tamen malobeas al li, al li, kiu junule estis belega unuaranga fraŭlo, kiu estus povinta ricevi multe pli bonan edzinon ol Juula, ĉu filinon de iu bienhavana aŭ, edziĝante, ekvivi en iu bieno kiel estonta mastro. — Kaj ĉu Juula ne rimarkis, ke li drinkas ĝuste pro Juula? — Kaj nun ĉi tiu Juula ĉagrenas lin, neniom estimas lin, ne akceptas lin; ĉi tiun Toomas'on,

opiniantan sin tute brava viro, kiun mastroj volonte invitas al linkombado. Nur Juula ŝajne ne konas lian valoron. Ĉi tio kolerigis Toomas'on.

„Mi diras, venu ĉi tien!“ Li kriis per sovaĝa voĉo.

„Kial do vi blekegas?“

„Ĉi tien!“ ekkriegis Toomas, kaj liaj okuloj brilegis kiel tiuj de kolera kato.

Juula restis sur sia loko.

„Mi volas provi, ĉu oni en mia hejmo obeas min ankoraŭ kiel edzon aŭ ne? Mi diras al vi ankoraŭ foje: Juula, venu ĉi tien!“

„Di-sinjoro!“ ĝemis Juula, „kvazaŭ freneza. Vivas plurajn semajnojn ekster la hejmo, tiam venas hejmen kvazaŭ sovaĝa besto: blekegas, krias, batas! Patro, Filo, Sankta Kruco, vi vere freneziĝas!“

„Ho vi, satano!“ insultis Toomas, saltleviĝante, „do mia propra edzino ne obeas min! Diru al mi, diablo, kion la pastro diris, kiam vi edziniĝis je mi?“ — Kaj li mem respondis: „Edzinoj, obeu viajn edzojn en ĉio. Ĉu vi aŭdas: en ĉio, kiel vian sinjoron, — ĉu vi komprenas: vian — sinjoron? — Ĉar la edzinoj subiĝas al sia edzo? — Kaj nun vi ne obeas?! Mi volas provi?!“

„Kion vi provos, bestaĉo!“ admonis Juula kaj firme staris surloke, „sed li ja diris al vi ankaŭ: — Edzoj, amu viajn edzinojn kaj ne koleru je ili!“

„Ĉu kontraŭparoli!“ frapegis Toomas per la piedoj la plankon kaj ekatakis Juula'n. Li ekkaptis ŝiajn harojn, kaj inter la batoj li kriis, piedbatante: „Do instrui sian edzon antaŭ siaj infanoj, do instrui? Sed ĉu vi ne scias, ke la edzinoj devas silenti, ĉar al vi ne estas permesate instrui kaj estri la edzojn, kiel diras la Sankta Skribo: „sed vi devas esti subuloj kaj ne regi la edzojn, ĉar ne la viro ŝtelis la pomon, sed la virino!“ Li batis ŝian kapon, dorson, ĉion, dum li mem blekegis: „Tian ostulinon la edzo amu, mem kvazaŭ stangaro? Jen obeado, jen subiĝado?“

Juula eltenis la batojn preskaŭ silente. Ŝi estis kutiminta al ili; nur mallaŭte kaj honte ŝi plendis dum ĉiu bato: „Jen, jen kion frenezulo faras, frenezulo faras!“

La infanoj kriis, kvazaŭ radŝirataj.

Toomas ne sukcesis ankoraŭ kuŝigi Juula'n, kio ĉiam ordinaro okazis — kiam Sassa desaltis de la lito, ekkaptis la postkolon de la patro kaj tiris lin tiom forte, ke li surgenuiĝis kaj forprenis la manojn for de la edzino.

Ĉi tiun momenton profitis Juula, kaj kvazaŭ persekutata sovaĝa besto ŝi elkuris el la kabano.

Toomas komence estis tute senkonscia kaj konsternita pro ĉi tiu okazajo; sed kiam li rigardis malantaŭen kaj ekvidis tie Sassa'n, li ankoraŭ pli koleriĝis. Kvankam ebria kaj laca, li rapide stariĝis kaj ekkaptis la knabon. Ega luktado komenciĝis inter la knabo kaj la patro. La aliaj infanoj kriis kvazaŭ freneze. La patro ĉiel penegis teni la filon, sed la ebriaj manoj ne scipovis teni tiom viglan estaĵon: Sassa barakte liberigis sin kaj post momento estis ankaŭ ekster la kabano. — Ĉi-momente Toomas estis kaptinta la lignan tabureton, kaj tutforte li post-jetis ĝin al Sassa.

La pli etaj daŭrigis kii — Toomas estis tute laca pro la granda baraktado. Kolere li ĉirkaŭrigardis, sed kiam li vidis tie nenion krom la infanoj, li duone kliniĝis al la infanoj, malfermegis la buŝon kaj ekkriis same tutvoĉe kiel la infanoj, skuante sian kapon.

La infanoj konsterniĝis kaj eksilentis. Toomas stariĝis kaj falsidiĝis lace sur la saman tabureton apud la ĉefenestra tablo.

Pro la ekscitiĝo kaj la batalo kun la filo li estis tute laca. Ankoraŭ pli influis lin tio, ke Sassa tiel traktis lin. Li ekopiniis, ke Juula kaŝe incitas la infanojn kontraŭ li.

„Li gardu sin,“ li murmuris por si, „kaj sian haŭton! Jam bati min, faligi la patron?“

Li rigardis la infanojn. Ili estis silentiĝintaj kaj kolektiĝintaj ĉe la fajrujo kaj staris tie time kaj konsternite.

La malespero kaj timo de la infanoj influis kvietige la koleron de Toomas. Li vidis, kiel la infanoj timas lin, tremas pro lia potenco. Same estus devinta konduti Juula, se ŝi estus volinta indulgi lin, sed Juula neniam faris tion: ŝi kontraŭparolis aŭ ĝemis tiel, ke Toomas koleriĝis.

La malfeliĉaj vizaĝoj kaj malesperaj okuloj de la infanoj plimildigis Toomas'on.

„Kion kuiras al vi tie tiu ĉi Juula?“ li demandis pli kviete.

„Falunsupon!“ respondis Robi kaj purigis la nazon. Toomas prenis la sakon de sur la tablo kaj serĉis tie ion. „Venu ĉi tien kaj mansalutu la patron!“ li diris jam trete afable.

Sed kiam li vidis, ke la infanoj daŭrigas lin timi, li diris pli malafable: „Nu, venu do, venu! Mi ja ne manĝos vin!“ — kaj montris bulkon en la sako.

Honte kaj duontime paŝis la infanoj al la patro.

„Nu, Leeni, mansalutu!“ ordonis la patro.

Leeni honte metis la fingron en la buŝon. „Elprenu, bona infano, la fingron el la buŝo!“ instruis la patro, eltiris la fingron de la filino el la buŝo kaj diris: „Jen kopekan bulkon.“

Ĉi tio kuraĝigis la knabojn kaj, ne atendinte la ordonon de Toomas mansaluti lin, ili etendis siajn manplatojn por tio. Kiam Toomas ekvidis la atendantan Toodi antaŭ si, li diris: „Aŭskultu, knabo, purigu antaŭe vian nazon, nur tiam vi povos ricevi bulkon!“

Kiam ĉiuj estis ricevintaj la bulkojn kaj ekmanĝintaj ilin, Toomas prenis el la brustpoŝo botelplenon da brando kaj komencis ĝin senkorkigi. Sed la korko estis tiom eniĝinta la botelkolon, ke estis neeble eltiri ĝin. Fine Toomas trovis sur la planko ligneton, enigis per tio la korkon kaj trinkis kelkajn buŝplenetojn.

La brando efikis. Toomas iĝis ĉiam pli malvigla. Komence li ĉagreniĝis, ke la infanoj ne obeas, minacas mortigi Sassa'n kaj la patrino, se ili eniros. Sed kiam Sassa kaj la patrino ĉiam ankoraŭ ne aperis, li pligajiĝis: li vidis, ke la patrino kaj la filo lin efektive timas.

Toomas drinkis plu! Li prenis la infanojn sur siajn genuojn kaj komencis rakonti al ili diversajn ebrulajn rakontojn.

„Ĉu vi ankaŭ batos la patron, maturiĝinte?“ li demandis la infanojn, apenaŭ malfermante la okulojn.

„Ne!“ respondis Robi.

„Kial vi ne batos Toomas'on?“ demandis la patro.

„Toomas mortigos!“ respondis Robi.

Ĉi tiu respondo plaĉis al Toomas. Li promesis aĉeti al Robi bienegon, kunpreni lin en drinkejon kaj proponis al la infanoj brandon, kiun ili ankaŭ gustumis.

Kiam la infanoj estis finmanĝintaj la bulkojn, ili deglitis unu post la alia for de la genuoj de la patro kaj enlitiĝis en la angulo, kie ili ankaŭ baldaŭ ekdormis.

Toomas sidis ankoraŭ longe ĉe la tablo kaj drinkis.

Kvazaŭ profeto, havanta viziojn, li direktis siajn grizajn okulojn al la plafono, batis tiam kolere per la pugno la tablon kaj murmuris por si, dum la kapo ĉiam malleviĝadis. Versajne lia kolero ne tute foriĝis. Iom post iom la levado de la kapo de Toomas, simila de malproksime al trinkado de kokino, iĝis ĉiam pli malofita, kaj ĉiufoje lia dormema kapo malleviĝis pli kaj pli, kaj fine li ekdormis, ronkante, kun mallevita kapo.

Trad. J. Törn.

JAKOB MÄNDMETS

(1871—1931)

LA DISHAKITA GALEASO

El la novelaro „MARO“.

1.

Kiel pri ekscitanta novaĵo oni paroladis en la vilaĝo pri la konstruado de galeaso, sed tio ĉi enviigis nenium. Kial do ne, konstruu Nasva Laas galeason, rimedojn li ja havas, kaj tio estos ja honoro kaj gloro por la tuta marbordo.



Tie ĉi je distanco de kelkaj verstoj neniu posedas galeason, dum ĉe la marbordo de Panga troviĝas pluraj velŝipetoj, kaj kelkaj viroj posedas eĉ ŝipojn.

Baldaŭ oni ankaŭ venigis al Nasva famkonatan boatkonstruiston el Pika-neeme, kaj la konstruado de la galeaso komenciĝis.

Estis nur unu viro, kies koron tiu ĉi sciigo dolore pikis kvazaŭ per akra harpuneto. Tiu ĉi viro estis nomata Laene Andres, mastro de bieneto, troviĝanta ekstere de la vilaĝo, ĉe la fino de la duoninsulo.

La sciigo pri la konstruado de la galeaso persekutis lin konstante.

„Galeason Laas tute ne bezonas, sed li volas nur montri al mi, kion li povas,“ diris Andres al si mem. „Okazos en iu bela tago, ke li malkaŝe mokridos pri vi kaj ekkrios: Vi tion ne povas.“

Li penadis komence malreklami la konstruadon de la galeaso, kiel vanan entreprenon, sed baldaŭ li ekkomprenis: la vilaĝo simpatias al Laas. De tiam Andres evitis la aliajn, laŭeble kun neniu ekparolante pri tio.

Tio ĉi okazis antaŭ dek kvin jaroj, kiam Laas iam prenis la manon de Andres kiel la manon de sia amiko:

„Mi diros al vi.“

„Diru do!“

„Mi amas ŝin.“

„Kiun?“

„Ingel'on en Pühadekaare.“

„Kio do?“

„Sed mi ja ne havas eĉ parton de boato. Kion diros ŝia patro?“

„Tion mi ne scias,“ respondis Andres.

Sed kion povos diri pri tio la mastro de Pühadekaare? Kompreneble li eĉ scii ne volos pri tio, ĉar Laas vere ne posedas eĉ parton de boato. Li ne kapablas akiri ĝin al si, sed la mastro de Pühadekaare havas kelke da boatoj, bonajn kaptilojn, kaj dum la tuta jaro en lia tenejo are pendas sekigitaj fiŝoj.

Andres pensis.

Sed kial do mi ne ekhavis tian penson? Andres rigardis al sia domo, kies kalkumita kamentubo blankis en la sunlumo. Neniu en la vilaĝo havas tian domon. Kiam antaŭ kelkaj jaroj lia patro mortis, oni prave diris al li malkaŝe:

„Kial do vi ne povu bonvivi, la patro postlasis vin bonstata.“

Post la edziĝo je Ingel lia havaĵo povus konsiderinde pligrandiĝi.

Andres sentis, ke kovraĵo falas de liaj okuloj. Li ekkomprenis nun tion, kion li ĝis nun ne estis kompreninta.

Al la intimiĝo de Andres oni favore rilatis en Pühadekaare.

Estis iun dimanĉvesperon, kiam la junuloj en la drinkejo aĉetis bieron kaj vinon por la knabinoj.

Andres sidis ĉe tablo kaj ordonis al la drinkejmastro doni botelon da ruĝa vino. La sunradioj trafenetris la botelon, kaj en ilia lumo la fluidaĵo brilis helflame.

Vidante tion, oni aŭdis de kelkaj flankoj ripetatajn mirekriojn. Kial do tiu ĉi viro ne aĉetu, kiu havas bonajn kaptilojn, al kiu la patro heredis novajn boatojn, kaj kies du laboristoj fiŝkaptadas sur la maro! Oni ja ĉiam aŭdas henadon de ĉevalo de enlandanoj malantaŭ la pordego de Andres.

Kun ridanta mieno Andres verŝis per fiera manmovado la ruĝan vinon en la glason. Nun estis ja la plej bona momento montri al Ingel, kiom estimata li estas de la tuta vilaĝo, kaj kion oni opinias pri tiu, kiun ŝi — eble — eĉ nun amas.

„Aŭskultu, Laas, venu do pli proksimen.“

Laas venis al la tablo, ĉe kiu inter aliaj knabinoj sidis ankaŭ Ingel.

„Mi donos al vi tian vinon,“ diris Andres en la direkto al Laas, „kian vi dum la tuta vivo eĉ ne gustumis. Vi estas ja malriĉa — kaj ne povas aĉeti eĉ stofon da biero.“

La vizaĝo de Laas iom ekrugiĝis.

„Se tiu ĉi vino estas tiel kara al vi, ne estas bezone proponi ĝin. Vi povas restigi ĝin por vi mem.“

Laas volis deiri de la tablo.

„Haltu do,“ Andres vokis. „Por vi jam sufiĉas.“

„Trinku, se oni proponas,“ ekkriis unu el la junuloj. „Bona ĝi estas, kaj ĉu al Andres mankas mono?“

Malgraŭ sia volo la cedema junulo ne povis deiri de la tablo.

Andres verŝplenigis la glason per hele travidebla ruĝa vino kaj per tremanta mano etendis ĝin al la amiko.

„Ne, amiko,“ ekkriis Andres, detirante la glason de antaŭ la mano de Laas, etendinta ĝin por akcepto. „Mi ne povas instrui al vi trinki tiun ĉi vinon. Ĝi estas tro multekosta por vi. Sed flari vi tamen povos.“

Li ĵetis la vinon al Laas vizaĝen.

Lutita ridado aprobis la agon de Andres.

Diabla viro estas tiu ĉi Andres, jen kion li elpensas. Sed kial do li ne povu fari tion, se liaj poŝoj estas plenaj je mono? Laas haltis konsterniĝinte, ne povante tuj kolekti siajn pensojn. La rideho de la aliaj dolore tranĉis liajn orelojn.

Antaŭsentante malbonon kaj preparante sin por defendo, Andres elpaŝis de malantaŭ la tablo en la mezon de la ĉambro. Liaj rigardoj ĉirkaŭkuradis rapide, serĉante, kion li povus ekkapti por batalado.

La rido de la aliaj vekis Laas-on el lia konsterniĝo. Li ĵetis al Andres rigardon, esprimantan malamon kaj malestimon, tiam li returnis sin kaj eliris el la drinkejo.

Kvankam tiu ĉi ago de Andres malbonhumorigis kelkajn, ĉar Laas estis respektata de ili, sed la biero kaj la vino, aĉetataj de li, tuj forigis tiun ĉi respekton.

La geedziĝa festo de Andres kaj Ingel estis luksa kaj riĉa je partoprenantoj. Nur Laas forestis el la junuloj de la vilaĝo.

Kaj de tiam la vivovojoj de la viroj disiĝis.

Dum la daŭro de l' jaroj Laas kaj Andres estis intersanĝintaj siajn rolojn. Laas loĝis en unu fino de la vilaĝo en sia nova grandfenestra kaj tute kolorigita domo. Nun li estis tiu, kiu havis la plej bonajn fiŝkaptilojn en la vilaĝo, kaj la maro estis al li speciale malavara. La domo de Andres en alia parto de la vilaĝo estis tute ruiniginta dum la daŭro de l' jaroj, la kaptiloj malboniĝintaj, kaj nun la viro estis tiom malriĉa, ke li ne kapablis havigi al si eĉ novan boaton. La malriĉigon neniu estis rimarkinta, eĉ ne Andres mem, sed kiam ĉio estis jam malprosperanta, li ne kapablis plu haltigi tion.

Ĉiuj en la vilaĝo paroladis pri la konstruado de la galeaso, vigle rememorante ĉe tio la antaŭan malriĉecon de Laas. Sed kion li nun estas atinginta! Kaj estontece ankoraŭ! De ĉi tiu bordo oni povos per la galeaso sendi ŝtonojn al Tallinn, transporti lignon — ĉiukaze la perlaborado estos bona, kaj la havaĵo de Laas kreskos rapide.

Andres rigardis al Nasva. De mateno ĝis vespero ĉe la konstruantoj de la galeaso svarmis homamaso, dum filoj de malriĉaj vidvinoj kolektadis por si malgrandajn tabulpecetojn, kiujn oni hejme volonte de ili akceptis. Eĉ la vento disportadis laŭ la bordo malpezajn rabotajojn, kvazaŭ lanugojn.

2.

La galeaso estis finkonstruita.

Ĝia blanka korpo, moderne fleksita el glate rabotitaj tabuloj, estis zorgeme ŝmirata per gudro, varmegigita sur fajro.

La sekaj tabuloj sorbis avide la gudron, dum la maldika gudrotavolo donis al ĝi ruĝon de l' juneco, same kiel ĝin estigas sur la vangoj de la knabinoj la printempa suno.

Pompante per siaj belegaj formoj, la galeaso baldaŭ almlitis la koron de la bordanoj, kaj ili seninterrompe rigardadis ĝin dum la tuta tago kiel amatinon, je kiu la animo sopiras eĉ en sonĝoj.

Andres ne estis ankoraŭ vizitinta la galeason, sed des pli kolerigis lin la laŭdado de la aliaj.

Simplena marĉrivereto fariĝis lia animo, kaj klare li sentis, kiel la ĉagreno kvazaŭ malbonodora rustakvo, kolektiĝante tie, obtuze turmentas lin. Al li ŝajnis, ke li legas en la okuloj de la aliaj vortojn, kiuj senfine laŭdegas Laas'on kaj deziras al li feliĉon ankaŭ por la estonteco.

Kaj iam vi jetis vinon al tiu ĉi viro vizaĝen, por malhonorigi lin antaŭ la aliaj kaj precipe antaŭ tiu ĉi knabino, kiu estas nun via edzino.

Sed ankoraŭ pli multe: kiam vi hisos iam viajn disŝiriĝintajn velojn kaj glitos lace sur la ondoj, nur tiam vi ekvidos, kiel li ĝuste preterrapidegas per la galeaso tute antaŭ vi. Sed rigardu — sur la helverda akvosupraĵo al vi rapidege proksimiĝas ombro, kaj ĝi tute kovras vian boaton.

Eĉ la sunon ĝi povas kaŝi de vi.

Tio estas la larĝaj, neĝblankaj tolaj veloj de la galeaso de Laas, kiuj ombras vin. Ili estas ekstreme streĉitaj de la vento. Ankaŭ la venton li volas alproprigi al si de sur la marsupraĵo. Kaj viaj mizeraj veloj efektive malstreĉiĝas, kaj la boato ŝanceliĝas sur la ondoj, kiel viro, kies gambojn malfortigis forta vino.

Sed post la galeaso restas larĝa perlanta vojo, kaj la ondoj, kiujn estigas la rapida kurado de la nova veturilo, balancas vian boaton.

Ĉi ĉion Andres vidas dorme kaj maldorme.

Kion donas al li la hejmo? Maljuna surda servisto idiote vagas aŭ kuŝas maldiligente sur benko, sur retoj, malmoliĝintaj pro la dormado. Sola li ne kapablas laboradi, sed sian malkontentecon li tamen scipovas esprimi kaj iufoje eĉ promesas foriri.

La postpordego — tiu ĉi loko, kie antaŭe la ĉevaloj de kamparanoj skrapadis ĉe la fosto, estas jam delonge herbo-kovrita, kaj ĉi tiuj timemaj, ĉifonvestitaj infanoj estas liaj infanoj.

Forpasas la tago, li ne parolas. En la ĉambro estas malvaste kaj sufoke. Li iras eksteren, sed tie li nevole ekrigardas al Nasva. Eĉ nun aro da vilaĝanoj ĉirkaŭas la galeason.

Subite li eksentis sin sola, tute sola, eĉ tiu ĉi silentanta virino ŝajnis al li fremda. Li konstatas: en la vilaĝo estas neniu, simpatianta al li, estimanta lin kiel antaŭe.

Kiam li restis sola, kiam ĉiuj deflankiĝis de li?

Li ne sciis tion. Sed li estis sola.

Pluvigis nebule. Densa mallumo kovris peze la muĝantan akvon.

Andres venis laŭ la bordo en la direkto de la hejmo.

„Hodiaŭ nokte verŝajne neniu estos tie“, ekmemoritis Andres.

La vilaĝo dormis, kaj eĉ de la drinkejo ne estis aŭdata bruado de ebriaj bordanoj.

Se entute oni iam vidu la galeason — oni povus ĝuste nun preteriri ĝin.

Cu iri aŭ ne iri?

Andres turnis sin malsupren al la bordo kaj ekpaŝis sin-garde al Nasva. De la vasta maro densa nubo malleviĝis sur la vilaĝon. Jam pluvegis. Neniu estis videbla, ankaŭ la vilaj hundidoj estis kaŝintaj sin de la pluvego en hangaretoj, kie ili nun trankvile dormis. Monotona muĝado, miksitita kun pluv-susuro, kiu plenigis la mondon, ĉirkaŭis la solan iranton. La palisaro por sekigo de retoj estis kvazaŭ malgranda tombejo sur la sabla bordo kun siaj mallarĝaj, maldikaj krucoj, la muĝantaj ondoj kvazaŭ etendiĝis ĝis la tomboj.

Nun aŭdiĝis en la muĝado de la maro ies voĉoj, kiel obtuzaj paroladsono, kiel ekvokoj, kiel ekkriegoj. Kiom multajn eĉ li konis, kiuj estis foririntaj al la vasta maro, sed de tie ili ne revenis plu malgraŭ tio, ke la vidvinoj dum semajnoj atendadis ilin nokte ĉe lamplumo.

Nun ŝajnis, ke ili ĉiuj estas proksimiĝantaj al la bordo laŭ takto de la moviĝantaj remiloj.

Andres iomete ektimis kaj ne kuraĝis eĉ rigardi tien, kie la mallumo englutis liajn rigardojn je profundeco de kelkaj klaftoj.

Li paŝis mallaŭte, zorgante, ke la piedo, ektuŝante ŝtonon, ne kaŭzu ian atentigan kraketon.

Sed vana timo — nenio estis aŭdata krom la muĝado de la maro kaj la plaŭdado de la pluvo.

Andres haltis ĉe la renversita galeaso.

Ĝia fieraŝpekta korpo estis brile videbla tra la mallumo. La pluvgutoj kolektiĝadis sur ĝiaj flankoj je grandaj larmoj kaj ruliĝis malsupren laŭ la glataj, peĉnigre brilantaj tabuloj.

Furioza kolero kun inkuba forto ekpremis la gorgon de Andres.

„Jes, per tiu ĉi ilo li efektive povos veturadi kaj perlabori multege da mono“, diris Andres al si mem. „Estas li, kiu okupas la unuan lokon sur la ĉi-tiea bordo, kvankam li ne havis antaŭe eĉ parton de boato, kaj la aliaj tre multe ridis, kiam mi jetis al li la vinon vizaĝen.“

Li malamis tiun ĉi viron, sed tamen li sentis sin malforta kompare kun li. Laas estas nun tiu, pri kiu oni konstante paroladas en la vilaĝo, kaj kun ĉiu tago li gajnas al si pli grandan respekton.

La galeaso igis Andres'on halti, kaj malgraŭ la densa pluvo li plurfoje ĉirkaŭiris ĝin.

Lia piedo tuŝis iun malmolan objekton. Tio ĉi estis hakilo, kaŝita inter rabotajoj sub la boatrando. La rabotajoj deruliĝis flanken, kaj ekmontriĝis la brilanta klingo.

Andres levis la hakilon. Brila, akrega klingo!

„Diablo — por tio li ja konstruis la galeason, por montri al mi sian riĉecon — por venĝi al mi. Li fanfaronu kaj fierachu tiam ankoraŭ!“

En la brako de Andres kolektiĝis multege da forto. Kun ĝuo li svingis la pezan hakilon.

Paralizite, malleviĝis lia brako. „Ne — tion ne faras bordano, tion li ne faras. Bordano ne frakasas galeason!“

Malproksime sur vojo malantaŭ la vilaĝo aŭdiĝis veturila bruo.

„Nu, diablo — li ne bezonas ĝin. Ĝin li konstruis spite al mi! Li ne malriĉiĝos, sed lian fieracon tio iomete malpliigos.“

Denove li sentis, ke lia brako fortiĝas. Forta bato, kaj la akrega hakilo disuigis unu tabulon en la flanko de la galeaso.

Ambaŭ partoj de la tabulo, fleksitaj antaŭ nelonge, dissaltis, elŝirante najlojn el la arkoj.

Freneza kolero ebrigiis Andres'on. Li batadis ankoraŭ plurfoje, ne atentante, kien faladis la akra hakilo.

Nur tiam foriĝis la freneza, ebriga furiozo, kiam la belege formita korpo de la galeaso estis tute difektita.

Malbele alrigardis lin la grandaj zigzag-randaj truoj. Lia korpo ektermis, kaj, jetinte la hakilon, li ekkuris. Li kuris de la marbordo al la erikejo malantaŭ la vilaĝo, ĉirkaŭ kampetoj, ĉirkaŭitaj de ŝtonbariloj, al vojo, kondukanta hejmen.

Sed ankaŭ de tie li devis forkuri, ĉar iu veturis al li renkonte. Andres direktis sin flanken, kuris denove laŭ la erikejo, pene transkuregante malaltajn juniperojn, ĝis kiam li fine atingis la hejmapordegon.

En la vilaĝo estis trankvilé kiel antaŭe, sed pli timige, eĉ minace sonis la ondmuĝado.

3.

Ingel sidis sur la litrando kaj vindis infanon. Sur tablo ĉe la lito lumis ruĝfajra ladlampo.

„Kie vi estis ĝis la noktomezo?“ demandis la edzino kun kutima riproĉo. Ŝi sciis, ke tiu ĉi rimarko kolerigos la edzon, sed ŝi ne kapablis ne diri tion.

„Kial tio koncernu vin?“ la edzo kolere ekkriis kaj en la malseka vestaĵo peze kuŝiĝis sur malmolan benkon.

Li ne povis ekdormi. Estis io en la koro, kio kaŭzis tie turmenton, dolore pikis, sed de kio li ne kapablis liberigi sin.

Ĉiam la galeaso, ĉiam ree la galeaso. Jen li vidis ĝian beleegan korpon, jen la saman frakasita. Tiel alternis la bildoj laŭvice.

Li, laŭdevena maristo, dishakis marveturilon. Neniu tago pasas dum somero, kiam boato ne portas lin sur la ondoj, kaj nun li hakas ĝian korpon per hakilo. Kiel malnobla estas tia esprimo de kolero. Iam okazis, ke li sur boatfundo eĉ saviĝis de l' morto. Maldikaj tabuloj, mirinde maldikaj, kaj la samaj tenas lin super la profundaĵo. Nun li dishakas ĉi tiujn tabulojn per akra hakilo.

Malnobla, malnobla estas tia ago.

Sed kio do? Laas enmetigos novajn tabulojn, rimedojn por tio li havas; ĉi tiu okazaĵo eble malpliigos iom lian fierecon. Li vidu, ke li tute ne estas tiel respektata, kiel li eble supozas. Li do suspektu lin. Tiam li komprenos, ke li havas ankoraŭ sufiĉan forton por malami.

Sed aĉa kaj malnobla estas tia venĝo. Noktomeze vi ŝteliras al krimo, same kiel ŝtelisto. Ne, ankoraŭ pli malnobla, multe pli malnobla. La boato estas sankta. La malnoviĝintan boaton oni altiras sur la bordon, oni submetas al ĝi ŝtipojn kaj restigas ĝin tie, ĝis kiam ĝi estos putrinta, kaj la tempo estos disportinta ĝiajn restaĵojn.

Kun la boato estas intime ligita unu parto de la vivo, la boato kaj ĝia posedanto estas nedisigeblaj, kaj kune ili partoprenas la batalojn.

Kaj li dishakas la boaton.

Abomene!

Andres fermis la okulojn, kovris la kapon per la baskoj de la surtuto. Sed malgraŭ ĉio li ne povis ekdormi.

Li sopiris je dormo.

La infaneto ekkrietis kaj trenvoĉe esploris. La patrino leviĝis, trankviligis kaj trinkigis la infanon.

„Pro diablo — oni ne povas eĉ dormi pro ili,“ Andres diris kolere kaj kaŝis sian kapon kun ankoraŭ pli granda zorgo en la vestaĵo. Li opiniis, ke li efektive estus ekdorminta, se la infano ne estus vekinta lin.

Lulate, la infano baldaŭ ekdormis.

Ree la galeaso. Sed nun ĝi estis nedifektita, kaj Andres elveturis per ĝi. En la vasta maro leviĝis uragano, kaj subite

la akvaro iĝis nigra, kaj la ĉielo malheliĝis. Andres remis tute forte. Strange — tio ĉi eĉ ne estis akvo, sed fluida peĉo. Li forte povis antaŭenigi. Tiam li rimarkis la nigran fluidaĵon enne fluanta de la dekstra boatlanko. Li elĵetadis ĝin, sed ĝi la ĝluigis al la manoj kaj rapide leviĝis en la boato. Serĉante la truon, li etendis la manon, tra la boatlanko la mano eniĝis en la ondojn. Granda estis la truo, la boato eĉ ne havis flankon, la fundojn ĝi ne havis. Iu ekkaptis lian manon, plumbo-peze iu ekpendis je ĝi kaj tiradis lin malsupren. Tio estis Kalda Mart, kaj timige li rigardis Andres'on per siaj malplenaj orbitoj. Li provis savi sin, sed li pliprofundigis en la fluidan fandan peĉon.

Longe kaj tutforte Ingel skuis la edzon, antaŭ ol tiu ĉi liberigis de la inkuba sonĝo.

„Kio do okazis al vi?“ diris la edzino. „Vi kriis tiel terure, kaj nun vi neniel vekiĝas.“

La krio estis vekinta ankaŭ la infanojn, kaj la pli grandaj, tremante pro timo, penis kaŝi sin sub la litkovrilo.

Andres sentis timon kaj vidis eĉ nun ankoraŭ la kavajn orbitojn de Mart. La ĉambro eble estis tiu tombo, kie li dronis en mallumo kaj nun senĉese estas rapide malsupreniĝanta.

Sufoka varmego premis lian buŝon kvazaŭ dika mola kuseno.

Li leviĝis kaj per ŝanceliĝantaj paŝoj eliris en la korton.

Malforta matenruĝo desegnis helan rozkoloran strion sur la oriantan horizonton. La forta pluvo estis ĉesinta, la vento dispelinta la nubojn. Plurloke vidiĝis de inter la nuboj plumbo-grizaj ĉielmakuloj.

La ondoj brilis en la malforta matenruĝo.

Oni povis jam vidi ĉion sur la marbordo. Subite li rimarkis la malproksime vidiĝantan galeason. Lia koro ekstremitis, ŝajnis, kvazaŭ malvarma vento estus subite rigidiginta lian sangon.

Se çio çi — çio do estus songo!

4.

La sekvantan matenon la plej grava novaĵo estis la sciigo pri la dishako de la galeaso. Ŝi miradis, supozadis, oni eĉ ne kredis, ĉar tiu ĉi krimo estis tro senhonta. Jam frumatene oni kolektiĝis ĉirkaŭ la galeaso, svarmis tie kaj, timiĝante, rigardadis — kun samaj sentoj, kiaj plenis la homon, kiam li proksimiĝas al viktimo de mortiginto.

Jen tie ĝi staris — la flankoj malbele dishakitaj. Gutoj eĉ nun ankoraŭ pendis ĉe la randoj de la dispecigitaj tabuloj, kvazaŭ rigidiĝintaj sangogutoj.

Kiu do estas farinta tion? Tiun demandon neniu povis respondi. La hakilo kuŝis apud la galeaso, kaj sur la ŝtonkovrita bordsupraĵo estis restinta neniu postsigno.

Tio estas jam la dua tiespeca krimo sur ĉi tiu bordo. Tio okazis jam unu generacion antaŭe, kiam foje ĉe la albordiĝejo estis dishakita fiŝkaptista boato. Tion estis farinta iu juna drinkulo, sed tiu viru laŭdevene ne estis ja bordano, sed vagulo, alveninta el enlando.

Kiu do estis ĉi-okaze la alveninto, kiu ne sciis, kian valoron la boato havas por la bordano? Oni konis nenion tian: kiu do povis levi la manon kun hakilo?

Neniu povis diveni tion. Nenion alian kapablis fari la bordanoj, ol are ĉirkaŭi la galeason kun malĝojaj mienoj kaj kun kordoloro plendi pri la malnobla ago.

La tutan vilaĝon premis la peza krimo, kaj la homoj eĉ ne kuraĝis rigardi — unu en la okulojn de alia.

Laas alvenis al la bordo, la kutime afabla vizaĝo estis tute malserena. La vilaĝanoj salutis lin, malkuraĝe flankeniĝante. Oni ne scipovis diri al tiu ĉi bona homo eĉ konsolajn vortojn.

„Aŭskultu, Laas,“ ekparolis Kivi Rein, kriplapieda bordano, kaj, lamante, alproksimiĝis je kelkaj paŝoj al Laas. „Vi ja scias – mi estas naskiĝinta en ĉi tiu vilaĝo, maturiĝinta kaj maljuniĝinta. Sed tion miaj okuloj ankoraŭ ne estas vidintaj, ke bordano dehakas per hakiilo boattflankon. Mi ne kredus tion, se mi ne vidus tion per miaj propraj okuloj. Ĉu vi scias, mi estas pensinta pri ĉiuj homoj, ankaŭ pri la malsaĝaj knab-aĉoj, sed kredu – nenium mi kuraĝus nun montri per la fingro. Mi ne kredas, ke tiel kapablis aĝi iu bordano.“

„Nu, bone“, diris Laas, ne alrigardante la maljunulon. „Dishakita ĝi estas, tion vi ja vidas. Sed mi miaflanke ne kredas tion, ke iu estus alveninta de malproksime por dishaki mian galeason. Kaj mi mem ankaŭ ne estas farinta tion.“

Laas estis prava, ĉar pli malproksime li estis respektata eble ankoraŭ pli, ol en la hejma vilaĝo.

Iu venis de la drinkejo kaj rakontis tre ekscitite: La krimulon oni estas vidinta. Onidire iu kamparano estis vidinta, ĉar li estis kurinta nokte al li ĝuste renkonte.

Sed por kio tio utilas? La kamparano ja ne rekonis lin nokte. Ankoraŭ oni sciis, ke iu virino estis aŭdinta nokte batojn de la direkto de la bordo. Tiam verŝajne estis farata la abomena krimo.

Sed ankaŭ tio neniom utilas. La batoj ne diras, kiu estas la krimulo.

„Ankaŭ mi devus iri tien,“ diris Andres al si mem, vidante grandan homamason ĉe la galeaso. „Sed por kio — antaŭe mi ne estas estinta tie, kaj ankaŭ nun mi ne bezonas iri tien. Mi volus vidi la viron, kiu kuraĝos al mi diri tion.“

Antaŭvespere Andres iris al la bordo, kie li komencis pretigi por sia boato novan remiltenilon. Malrapide lamante, alproksimiĝadis Kivi Rein laŭ la borda akvolimo.

„Ĉu vi hodiaŭ vespere tute ne iros por fiŝkapti?“ demandis Rein.

„Ne, mi estas iom malsana, kaj la boato ankaŭ ne estas en ordo.“

„Ĉu vi jam estis ĉe la galeaso de Nasva por rigardi ĝin?“ Rein demandis subite.

„Ne. Kial do mi iru tien?“

„Vi do eĉ ne scias.“

„Mi aŭdis, la infanoj rakontis, sed mi opiniis tion ŝerco.“

„Tio estas diabla ago. Vi estas verŝajne la sola homo en la vilaĝo, kiu ne estis tie por vidi ĝin.“

„Ankaŭ antaŭe mi ne estas vizitinta ĝin.“

„Mi scias tion. Sed jen mi diras, tiu ĉi viro ne longe bonfartos, se li efektive estas bordano. Longe li eĉ ne povos resti honto kaj malhonoro por la bordo. Tion vi jam ekvidos.“

La malbenvortoj trafis Andres'on kiel vipobatoj.

„Ĉu vi scias,“ daŭrigis la maljunulo, „mi estas pensinta pri ĉiuj vilaĝanoj unuope. Sciuj, ankaŭ pri vi mi pensis, ĉar vi ambaŭ ja ne interrilatas. Sed kiun oni povas opinii kulpata pri tia abomenaĵo? Tio ĉi ja ankoraŭ ne malriĉigos Laas'on, sed sciuj, malhonoro tio estas por la tuta marbordo.“

Post tio Rein rakontis ankoraŭ pri la dishakita galeaso, poste ili ekparolis pri fiŝkaptado, kaj fine li parolis pri la du junuloj, kiuj antaŭ unu semajno dronis ĉe la bordo de Sausti. Kiam li havis nenion plu por rakonti, li adiaŭis kaj ekiris lame al la vilaĝo.

Andres restis longe sur la bordo, kaj ĉiam ankoraŭ li aŭdis la malbenadon de la maljuna bordano.

Vespere la malriĉa vidvino Liisu venis al Lahe Andres. La hejmo de tiu ĉi virino estis fakte en ĉiu bieno, kaj oni aŭskultadis ŝin volonte, kiam ŝi rakontadis la vilaĝsekretojn, rilate kiujn ŝi estis perfekte kompetenta. Eĉ manĝon oni donis al ŝi pro la interesa babilado, ankaŭ vestojn.

Hodiaŭ vespere Liisu havis multon por paroli pri la dishakita galeaso. Ŝi sciis precize, de kiu Laas estis aĉetinta la tabulojn, de kie alportinta la kiltrabojn, kiom tio kostis. Andres nomis ŝin moke kompetentulino, ĉar la rakonto de la maljunulino ne plaĉis al li.

„Se tiu ĉi faro eĉ ne malkaŝigos en tiu ĉi mondo, Dio ja tamen ne lasos ĝin senpuna. Li, kompatindulo, tute ne povas imagi, kie lin atingos la puno de la ĉielpatro.“

Kelkfoje Andres estis ekkronta al la maljunulino, ke ŝi eksilentu, sed por tio mankis nun kaŭzo.

La infanoj kolektiĝis ĉirkaŭ Liisu, kaj ŝi prenis la mezaĝan knabeton inter siajn brakojn, metante la manon kvazaŭ benante sur la kapon de la infano, kaj diris malgaje:

„Jen, malgranda Villu, kiel malbonaj la homoj estas. Novan galeason oni dishakas. Tion ĉiam kaŭzas tio, ke la homo cedas al malbono. Dio kompatema, ankaŭ tiu homo estis iam tia infano kiel vi. Eble li rigardis ankaŭ per same belaj, afablaj okuloj. Donu al vi la ĉielpatro ĉiam bonan menson kaj prudenton, por ke vi neniam dum la vivo faru tian malbonon.“

„Mi neniam iros por dishaki boaton,“ diris la knabo.

„Certe vi ne faros tion, ĉar vi iĝos brava maristo. Via patro ja ankaŭ estas maristo, li jam scipovos eduki vin honesta homo.“

„Mi ne komprenas, kial vi parolas tiel multe pri tiu ĉi galeaso,“ diris Andres. „Laas ja ne konstruis ĝin por vi.“

„Dio kompatema, kial do por mi? Sed tia faro ja estas honto por la tuta vilaĝo. Kion vi farus, se iu dum nokto dishakus vian boaton?“

„Kion mi farus? Kiamaniere do mi sciuj, kiu estas farinta tion?“

„Sed se vi sciuj?“

„Freneza homo, kiel mi povus scii tion. Ĉu Laas do sciuj?“

„Ĉu li sciuj aŭ ne, tion mi ne povas diveni. Sed mi opinias, ke li konjektas. Mi vizitis lin hodiaŭ. Li envenis kun iu kamparano en la ĉambron, kaj ili parolis pri la galeaso. Laas diris al la fremdulo, ke tion li ja povas imagi, sed li diros al neniu ion pri tio. Kiun Laas aludis, tion mi efektive ne scias.“

Andres ekstaris kaj rapide eliris el la ĉambro.

Ĉe favora vento la galeaso elveturis por longa marvojaĝo. La blankaj premstreĉitaj veloj ĵetis ombbron malproksimen sur la akvosupraĵon, kaj ĝia modera balanciĝado memorigis fieran marbirdon sur ondoj.

Samtempe ĝi forportis kun si ankaŭ la honton kaj ĉagrenon el la vilaĝo, ĉar nun oni ne paroladis plu pri la dishako de l' galeaso.

Andres estis la sola, kiu ne povis liberigi sin de la scio pri la krimo. Kiel fidela hundo sekvadis lin la malbeno de Rein kaj akompanis lin eĉ dum nokto surmare. Klarigante al si mem la malbelan agon kiel ŝercon, li ne atingis la sopiratan celon, kaj ĉe ĉiu sunleviĝo kaj malleviĝo renoviĝis la mordanta turmento kaj plilautiĝis la kondamnanta voĉo.

La fiŝkaptajo estis abunda en tiu ĉi aŭtuno. Ofte la retoj, eltirate el la akvo, similis neĝamasojn, kaj dum tutaj noktoj aŭdiĝis el la drinkejo la bruado de drinkantaj bordanoj. Eksterordinare multe da fiŝoj Laas ricevis, pri kio tamen neniu miris, ĉar liaj kaptiloj estis en modela ordo sur la tuta marbordo.

Foje en la komenco de l' aŭtuno Liisu vizitis la bieneton de Andres, kaj, serĉante konvenan sidlokon, ŝi entuziasme laŭdis la fiŝkaptajojn de Laas.

„Nun ĉiu povas vidi per propraj okuloj, kiel justa estas la ĉielpatro. La malprofiton, kaŭzitan al li printempe de malica homo, la maro kompensas al li kelkoble. Tiel grandan fiŝkaptajojn, kian Laas havis hodiaŭ matene, neniu estis vidinta en la vilaĝo. Tiu ĉi homo riĉiĝas ja okulvideble: la galeaso perlaboras bone, kaj li ricevas tiom da fiŝoj, ke li ne scias, kien meti ilin.“

„Vi ja ne mezuris liajn fiŝojn,“ Andres diris malkontente.

„Kial do mi, maljuna homo, mezuru ilin, tion ja ĉiuj vidas en la vilaĝo.“

„Mi ne komprenas, kial la kaptaĵo de Laas koncernu la aliajn. Mem li kaptas siajn fiŝojn, mem li ankaŭ manĝas ilin.“

„Ne parolu tiel, mastro. Laas ne estas egoisto, des malpli avarulo. Malriĉulon li ne ellasas malplenmane el la ĉambro.“

„Al mi li ne estas doninta ion eĉ por duonkopeko,“ Andres ekkriis, forgesante sin.

„Kara mastro,“ ridis la maljuna virino. „Vi ja ne bezonas — vi ja ne estas malriĉa. Via bieneto ja estas ĉiam la plej konata sur la marbordo. Sed — la ĉielpatro ja mem scias, kio okazos estonte.“

Andres leviĝis, surdorsigis la retojn kaj eliris el la ĉambro al la bordo. Kun ĉi virino estis neeble hodiaŭ paroli.

Ha, tiel — la fiŝkaptajo de Laas nur tial estas granda, ke oni printempe malutilis al li. Bone! Sed lia kaptaĵo estis relative malgranda, ĝis nun ne pli bona, ol dum aliaj aŭtunoj. Ĉu tio eble laŭ ilia opinio alude ne igis suspekti lin kiel krimulon?

Andres havis antaŭsenton, strangan senbazan antaŭsenton, kaj nome tio igis lin lasttempe timi aliajn homojn. Tiu ĉi ĉiam ree aperanta antaŭsento faris lian animon timema, ligis dum parolo la buŝon kaj flankenigis la rigardon.

Malkaŝe neniu estis dirinta al li ion eksterordinaran, sed li opiniis ke en ĉies buŝanguloj kaŝiĝas io por li.

Mikaeltaga vespero. Estante sur la bordo, Andres aŭdis el la direkto de la drinkejo bruon. Efektive ekzistis versajne en la vilaĝo neniu bordano, kiu ne estus irinta hodiaŭ vespere en la drinkejon.

La edzinoj prenis eĉ la infanojn sur la brakojn kaj amasiĝis inter la knabinoj ĉe la muro de l' drinkejo.

Muziko sonis, kaj, brubatante la plankon per ferumitaj botoj, la knaboj aliris la knabinojn, prenante ilin potence en la brakojn kaj turnadante ilin tiel forte, ke la kapoj ekturiniĝis.

Andres'on ĉirkaŭis sur la bordo malserena kaj malluma nokto. La sola stelo en la peĉnigra nokto estis la fajro de la lumturo en Rahulaidu, kiu jen hele briletis kaj tiam, ruĝiĝante, dronis por momento en la senfina mallumo.

Tra la ondmuĝado akre aŭdiĝis ekkrioj de junuloj el la direkto de la drinkejo.

Kiel viva flamo ekaperis en li dezirego je drinkejo. Pro kio la sinteno? Ĉu ne ĝuste per tio li estigas suspekton pri si?

Kiu estas vidinta — kiu povas diri tion? Li disbatos ties kapon, kiu kuraĝos malkaŝe diri al li ion similan, kaj tiam li volos vidi, ĉu ĉiu ne nomus lian agon justa. Ne, por la sindetenado ekzistas nenia kaŭzo.

Antaŭ la pordo de la drinkejo li haltis iom. Ene oni zumis kvazaŭ en abelujo. En la mano apenaŭ sufiĉis forto por malfermi la pordon.

Oni ekvenis el la ĉambro.

Andres rapide malfermis la pordon. Tio estis malbona momento. Interpuŝiĝante, ebriaj junuloj kuris eksteren. Iu albatis en la mallumo sian kapon dolore al la vizaĝo de Andres.

Oni ekbruligis alumeton.

La batinto estis servisto el Kivisalu, drinkulo. Sian junecon li estis pasiginta kiel ŝipano sur velŝipoj, sed nun li servis sur la bordo, ĉiujare ĉe alia mastro.

„Vi, hundbuŝego,“ Andres indignis, premante la vangon per la mano. „Vin oni devus bone bategi.“

La servisto repaŝis. Forte ebriiĝinta, li rigardis Andres'on dum momento kaj subite ekridegis.

„Ho — estas nenio — tio ĉi okazis senintence. Pro Dio, senintence. Sed ĉio ja ne okazas senintence. Mi diras — galeason mi neniam dishakus senintence. Pro Dio, neniam!“

La junuloj pluiris, kaj tra la nigra nokto aŭdiĝis ilia rido.

Andres returnis sin kaj forvenis de la drinkejo.

6.

Iunokte la frosto estis zorgeme kunfandinta la akvolimon kun la bordo, kaj frumatene la infanoj glitadis sur la glata glacio. Dum la unuaj tagoj la potenco de l' frosto ne etendis sin pli malproksimen ol la akvokavojo, kaj de la maro venis ŝaŭmantaj ondoj, facile disrompante la maldikan glacikovraĵon.

Malgraŭ la obstina kontraŭstaro de l' maro la glacirando estas tirata ĉiam pli malproksimen, kaj baldaŭ jam la tuta golfo estas sub klara, travidebla glacitavolo. Viroj iradas kun akraj hokoj sub la plandoj apud la kanoj kaj senkoloriĝintaj junkoj kaj serĉas, rigardante tra la vitrokla glacio, en la akvokavojo viglajn fiŝojn, mortigante ilin per lerta bato.

La vento kolektas sur la ebenaĵo la neĝerojn, balaas ilin laŭ la glacio per granda balailo, kaj baldaŭ leviĝas apud la sekaj susurantaj kanoj kaj la junkostopoj malakraj konturoj de neĝamasoj.

Ĉiam pli malproksimen penetras la glacikampo, kaj ĉiam pli fortege ĝi katenas la potencon giganton. Ankoraŭ kelkaj brilstelaj noktoj, ankoraŭ kelkaj tagoj da akra kaj tranĉa nord-orienta vento, kaj la akvo de la golfo defluos al la horizonto, kaj nun sonas de malproksime ĝia malklara muĝado.

La maro estas glaciĝinta.

La bordanoj sidas kune en siaj domoj, vivas per la rememoroj kaj per la havaĵo, kiun ili dum la somero akiris de l' maro. Tio do estas la tempo, kiam la maljunuloj transdonas al la infanoj siajn rememorojn, de generacio al generacio, kaj tiujn ĉi rememorojn oni zorgeme konservas kiel trezoron de la gento, en konvena tempo denove elprenante el la kaŝejo kaj transdonante ilin. Tio estas la vesperoj, dum kiuj la infanoj

estas edukataj anime veraj bordanoj, kiam la maro estas plektata en la fabelkronon, kaj por la tuta vivo en la animon estas plantata timo kaj amo al la maro. Tie prezentiĝas maro, kiel viva estaĵo, kiu havas siajn volojn kaj dezirojn, kiel aganto en rakontoj, kaj nur tre ruza kaj saĝa bordano kapablas agi alimaniere, ol deziras la maro.

La rakontoj trovas fruktodonan grundon, ĉar, rakontante, oni jetas la semon.

La glaciĝo de l' maro impresis Andres'on eksterordinare preme. La mallongaj tagoj iĝis longegaj. Netolerema kaj senpacienca li estis rilate al la infanoj, ĉar neniel li povis rigardi en iliajn klarajn blujajn okulojn. Li provis liberigi sin de la ŝarĝo, kiu kuŝis sur lia koro, sed ĝi fariĝis ankoraŭ pli prema. Ju pli multe li konsolis sin, des pli granda fariĝis la krimo en liaj okuloj, ju pli multe li trankviligis sian konsciencon, des pli furioza, minacenta hundo ĝi fariĝis.

Nun do li sciis, ke en la vilaĝo oni opinias lin la dishakinto de l' galeaso, kvankam sobre neniu estus dirinta tion al li. Sed tion li ŝajnas tamen sufiĉe klare rimarki, ke oni ne deziras volonte renkonti lin, kaj eĉ la maljuna Liisu neniam plu ekparolis pri la galeaso.

Li estis do leprulo, kiun oni evitas, pri kiu oni scias, ke li malhonorigis la vilaĝon, kaj kiu estis malbenita de la maljunuloj.

Neniu venis por forigi la malbenon.

Dum noktoj li ne povis dormi. La streĉita, malkvieta humoro forpelis la dormon kiel fortimigitan akvobirdon el la kanoj. Li malespere penis trankviligi sin, sed sen ia sukceso. En malluma nokto li rigardis lace, kun malfermitaj okuloj kaj serĉis en misteraj sonoj unuopajn vortojn.

Andres komprenis, ke li ne indas la nomon de bordano, ĉar mano de bordano neniam frakasas marveturilon. En li leviĝis sento, iganta lin malestimi sin. Kaj tiamaniere li restos malestimata dum la tuta vivo. Sed Laas, kontraŭe, estis okupinta en la vilaĝo la unuan lokon, kaj nur laŭde kaj respektate oni paroladis pri li.

Ekstere estis ventego. De l' maro aŭdiĝis krakado kaj kolera bruego. La bruo proksimiĝis. La bordanoj komprenis, ke la akvolinio proksimiĝas al la bordo. Ekstere akraj neĝeroj flugadis en la aero.

Hodiaŭ Andres'on premis peza inkubo. Eĉ ne unufoje dum la tago li liberiĝis de pezaj pensoj. Ili atakadis lin kiel

furiozaj hundoj, mordis lian koron per dentoj, kaj li ne havis rimedon por fortimigi ilin.

La edzino tre bone komprenis, ke peza ŝarĝo kuŝas sur la koro de la edzo, sed helpi lin ŝi ne povis. La edzo eĉ ne konfidis al ŝi tiom, ke ŝi estus scipovinta proponi al li sian helpon.

Sur nenies vizaĝo ŝvebis rideto, sur ĉies lipoj mortis la vortoj.

Andres sidis sur la retoj, metitaj sur la benkon, rigardis antaŭ sin kaj enspiris nerveme la varmegan fumon el mallongtuba pipo.

La infanoj dormis.

La edzino sidis ĉe la lampo, flikante vestojn. Neniun vorton ili parolis inter si. La silento estis inter la geedzoj kvazaŭ senponta abismo, kiun neniuj povas transiri.

Ektimigante, la edzino rigardis malantaŭen. La edzo staris malantaŭ ŝi, en la okuloj vidigis konfuza penso, kaj liaj vangomuskoloj tremis.

„Kion vi faras ĉi tie?“

Terur-ekscite sonis la voĉo de la edzo en la peza kaj prema silento. La edzino devis koncentri la pensojn por respondo.

„Kion mi faras? Vi ja mem vidas tion.“

„Mi vidas. Sed tion vi ankaŭ vidas, ke mi faras nenion. Sed mi eĉ ne volas fari ion.“

„Kion do vi havas por fari hodiaŭ vespere.“

„Vi ne komprenas,“ la edzo ekkriis kolere. „Mi volas hodiaŭ nenion fari, sed ankaŭ estonte mi nenion faros plu.“

La edzino flankenmetis la riparatan vestaĵon kaj alrigardis la edzon. Ŝi sentis ĉe tio tre bone, kiel ŝia koro batas kaj ekdoloras. Ŝi antaŭsentis ion malbonan, ion, kion ŝi eĉ parte ne komprenis.

„Kio do okazis al vi? Vi estas lasttempe ankaŭ al la infanoj severa. Ili eĉ timas vin.“

La mentonmuskoloj de Andres tremis. Li tutforte kunpremis la dentojn.

„Kio do okazis al vi?“

„Ha, al mi? Nu, mi diros al vi, kio okazis al mi. Mi ne volas plu esti ĉi tie.“

„Kien vi volus iri?“

„Tute for. Mi iros — mi ne revenos.“

La edzino denove prenis la nefinitan laboron.

„Aŭskultu, vi ne demandas. Ĉu vi scias, kiu dishakis la galeason de Laas? Demandu do — mi scias tion. Mi estis tiu. Tion scias la tuta vilaĝo. Vi, malsaĝulino, ne scias tion. Mi

estis tiu, kiu dishakis ĝin per hakilo. Mi faris tion, ĉar mi malamas Laas'on tutkore. Diru tion al ili, diru vi tion al li.“

„Kial do mi diru tion,“ la edzino respondis kaj iom flankenpaŝis. La sanga rigardo de l' edzo timigis ŝin.

„Nu, ili ja devas tamen scii, ke ilia opinio estas vera.“

„Ho, Dio, por kio do vi faris tion?“

„Mi diris, ke mi malamas lin. Mi malamas lin tial, ke li estas pli feliĉa ol mi. Li estis mia amiko, sed pro vi ni farigis malamikoj. Pro vi! Spite al mi li konstruis la galeason, kaj tial mi dishakis ĝin. Ili malbenis min, do plenumiĝu tio ĉi!“

Andres returnis sin.

„Kien vi iras?“ diris la edzino, samtempe ekkaptante lin je brako.

„Kial tio koncernu vin? Lasu min!“

Fortege li liberigis sin kaj forte puŝis flanken la edzinon.

Li eliris tra la pordo kaj malaperis en la marmugaĉo, plengiganta la malluman nokton.

La edzino rigardis al la fenestro. Ĉiam ankoraŭ ŝi vidis en la mallumo la palan vizaĝon de sia edzo...

De ekstere aŭdigis la spiregato de l' maro.

Trad. August Vellner.

EDUARD VILDE

(1865)

MILITO EN MAHTRA

Fragmento

— Pliajn draŝaĵojn aljetu, vi, maldiligentulaĉoj! Kia preĝtempo nun? Preĝu, kiom vi volas, en la inferon vi iros tamen kun via tuta maldiligenteco!

Li ja tute ne estas tiel kolera, ĉi tiu larĝmentona, forta, malaltstatura, nigra maljunulo tie en la polvnubo apud la fulga pordo. Li kriacas kaj insultas nur pro konveneco kaj ankaŭ tial, ke li ne konas alian rimedon por almenaŭ iom vigligi la malrapidemajn, laciĝintajn fantomajn figurojn tie en la pajlajo, kaj fine tial, ke oni severe postulos de li klarigon, se la laboro ne estos preta ĝustatempe. Kaj dum li brue riproĉas kaj insultas kaj serĉas ĉiam pli fortajn esprimojn, ĉirkaŭ lia larĝa buŝo tremetas kelkfoje kaŝa rideto, malrapide glitanta laŭ lia senbarba mentono malsupren en la densan vilan barbon, en la barbon, kiu ĉirkaŭas lian gorĝon kaj parton de la kolo kvazaŭ felta ringo. Ne, Vidiste Mart, la draŝinspektisto de la Vaitla-bieno, tute ne estas tiel kolera, kiel li penas esti per la buŝo, kaj, ĉar ĉiuj draŝantoj scias tion, ili lasus lin senĝene insulti, se ankaŭ la laborestro ne starus kun bastono en la draŝejo, kaj se ĉi tiu altkreska, malgrasa, malparolema nubopuŝisto ne estus ĉiam tiel malbonhumora, ke li anstataŭ la buŝo preferu uzas la bastonon, parolantan multe pli klaran lingvon, ol la insultema buŝo de Draŝo-Mart.

— Pliajn draŝaĵojn aljetu! Ne ŝtelu la nokton de la bien-sinjoro, kiel vi ŝteladas liajn tagojn! Kiu nutros vin, se vi ne nutros la sinjoron!

— Ni nutras lin kaj ankaŭ nin mem, — grumblas juna servutulo, viŝante la peĉ-nigran ŝviton de la vango.

— Nu jes, vi estas la ĝusta homo por nutri vin kaj aliajn! — komencas nun ankaŭ la laborestro per treniĝa, naza voĉo. — Ĝuste vi, la ĉefo de la mallaboremuloj! Kial vi rigardas tiel longe vian draŝilon? Vi volas verŝajne spire vivigi ĝin, por ke ĝi mem ekbatu?... Kaj vi, Triinu, jam ree vi ekkaŭras kiel ovumonta kokino! Jam ree viaj femuroj emas ripozi!

Atendu, mi ligigos vin al la tenilo kaj batigos la draŝaĵojn per via maldiligenta korpo!

Kaj li jam proksimiĝas kun sia timata salika bastono. Sed antaŭ la bastono de la laborestro Kaarel malaperas ĉio, havanta en si almenaŭ iom da vivo. Kiu restas, tiu pro laceco estas tiel rigida kaj indifereanta, ke al li eĉ ne enpensigas plu timi la baton.

Baldaŭ novaj draŝaj-amasoj kuŝas sur la tero, la draŝiloj estas ree prenataj for de la hokoj, kunigas la paroj, kaj daŭrigata estas la nokta labordanco sur la susuranta greno tra densa griza polvo, kaj kvazaŭ muziko ree aŭdiĝas la draŝila, eterna kaj al ĉiuj tiel konata kilk-kalk! kilk-kalk! kilk-kalk!

La draŝinspektistoj scias multe rakonti pri fantomoj. Noktaj ombroj trompas iliajn okulojn, noktaj sonoj iliajn orelojn. La nokto kaŝas sub sia nigra mantelo multe da misteraj fantomoj. Dormema, duondorma okulo povus opinii la tutan bildon, kiun prezentas nun la draŝejo, granda halucinajo. Malhele-griza ĝis karbe-nigra estas la tuta ejo. La sebkandeloj en la fulgaj lanternoj kun sia malgaja flava lumo estas la okuloj de la fantomoj. La radioj, pene penetrantaj de ili tra la polva ejo, paliĝas malproksimete ĉiam pli kaj pli kaj iĝas mortint-koloraj. Longaj, malrapidaj ombroj rampas laŭ la planko, suprengrimpas laŭ la muroj, levas siajn kapegojn ĝis la ĉevronoj. Ekstere hurlas aŭtuna vento, kvazaŭ volante aŭdigi la doloron kaj mizeron de l' mondo en komuna, potenca plorkanto, en granda malespera krio, sonanta ĝis la mond-rando. La draŝejpord-



egoj ploretas, la tegmento plendas kaj ĝemas, kaj la nuboj ŝutas larmojn malsupren rivere, kvazaŭ volante per superakvego kaŝi ĉion, levigantan de malsupre el la nigranta profundegaĵo kiel ploro kaj plendo en la spacon, por difekti la dian trankvilon kaj silenton.

Aro da fantomoj, spiritoj, mortintoj, moviĝantaj tie en la malklara polvnubo, inter kvar muroj, nigrantaj pro fulgo! Ili ne havas okulojn, ili ne havas buŝon, nazon aŭ orelojn; ili ankaŭ ne havas plu cerbon, kiu pensus; nek koron, kiu batus senteme. Ili estas laboriloj, kiel la du kunligitaj lignopecoj en ilia mano, kiun ili nomas draŝilo. Draŝilo kaj Mihkel — Mihkel kaj draŝilo; Liisu kaj draŝilo — draŝilo kaj Liisu — nenia diferenco, diru, kiel vi volas. Tiu ne havas pli multajn dezirojn ol ĉi tiu, tiu ne estas pli malsata kaj soifa ol ĉi tiu. Ĉar por konscii malsaton kaj soifon, necesa estas sentado — sed la draŝilo ne sentas kaj same Mihkel kaj Liisu.

La kvara draŝado en la semajno. Inter kvar draŝadoj ununokta ripozo. Du tagojn kaj du noktojn laŭvice malfacila laboro, tiam ununokta dormo, kaj ree du tagojn kaj noktojn laŭvice malfacila laboro. Kaj en la pansakoj grenventumaĵa pano.

Kilk-kalk! Kilk-kalk! Mac-poc! Mac-poc! Jam la battoj kelkie ekperdas sian sonoratan sonon, jam kelkiuj draŝil-duoj faladas tefen malforte kaj obtuze sonante. Kelkiu apogas, kiam la amaso estas draŝita, la dorson al la muro kaj restas staranta tie kiel lignoŝtipo. Neniu diras plu ian vorton al la alia, neniu rigardas plu la alian, ili ne vidas plu reciproke siajn vizaĝojn, ne rekonas reciproke siajn figurojn, ili sentas nur, ke ĉirkaŭ ili oni moviĝas, kaj ke ankaŭ ili mem moviĝas. Ĉio estas kvazaŭ en densa, netrapenetrebla nebulo, la voĉoj atingas iliajn orelojn kvazaŭ de malantaŭ malproksima, malproksima arbaro aŭ maro. Kelkies okuloj estas tute fermitaj, ili moviĝas nur laŭ la korpsento: aliaj rigardas antaŭ sin per vitrecaj, senesprimaj okuloj.

Du junaj kaj malfortaj uloj, knabo kaj knabino, unu el unu, alia el alia draŝgrupo, estas kaŝe sidiĝintaj dum la turnado de la draŝaĵo en malluman angulon. La laborestro, mem malspere luktanta kun la dormo, malfermas la okulojn, ĉirkaŭrigardas severe, ekvidas unun el la mallaborantoj, proksimiĝas al li sur piedpintoj kaj forte ekbatas la knabon. La dormanto vekiga, sed lia vizaĝo ne montras dolorsenton, li eĉ ne komprenas, kio okazis, kaj estas ree kliniĝonta. Nur la dua kaj tria bato malkuŝigas lin.

La knabino estas pli vigla kaj delikata: el ŝia buŝo eliĝas ĉe la unua bato malgranda „aj!“ kaj, antaŭ ol la sekvonta ektuŝas ŝin, ŝi estas jam ĉe la laboro.

— Vi, dormemuloj! Do ĉi tie estas via dormoĉambro! — grumbas la laborestro, dum liaj propraj okuloj estas fermiĝantaj kontraŭvole.

— Movu la manojn, movu la manojn! — admonas la draŝinspektisto, dum li rigardas el la pordego, rimarkante zorgoplene la ĉiam pli heliĝantan matenruĝon.

Per insulto kaj bastono oni enigis novan forton en la rigidiĝintajn membrojn de la vivaj kaj malvivaj laboriloj. Ree leviĝas kaj malleviĝas la manoj, ree klakas kaj brufrapas la draŝiloj, ree susuras la pajo, kaj ree bruete ŝutiĝas la greno sur la argilan plankon — bela ora greno, el kiu en la bieno oni faras tian subtilan blankan blutfarunon, tian purgrenan, dolĉan panon, panon, en kiu estas nek grenventumaĵero, nek branero.

Kiam la sunглоbo sur la horizonto ekflamiĝas, brilegante — la pluvo estas ĉesinta — tiam la draŝado estas finita, la kvara en ĉi tiu semajno, jam tioma dum la aŭtuno.

Kiel? Ĉu ili ne ĝojas, ke la laboro estas farita? Ĉu en ilia brusto ekĝermas neniu ero de tiu viviga, feliĉiga sento, kiun ĝuas la homo post finita kaj sukcesa laboro? Ho ne! Ili dormas starante kaj pro tio sentas nenion. Kaj due, ilia laboro ja ankoraŭ tute ne estas finita. Ilia laboro komenciĝas nur. Ĉi tiu brilanta fajroglobo tie sur la griza ĉielrando, kies oraj radioj nun kisas la vekigantan, refreŝigantan naturon — ĝi estas por ĉi tiuj noktaj laborfantomoj timiga signalfajro, ke jam novaj, same malfacilaj laboroj atendas ilin. Ankoraŭ dek du horoj da laboro, insultado, bastonado, grenventumaĵa pano, luktado kontraŭ dormo — nur tiam estos ripoztempo, la kara dolĉa sabatvespero...

Trad. Helmi Dresen.

LA LAKTISTO DE MÄEKÜLA

Fragmentoj

V.

Venante el la „kontoro“, Prillup ne kapablis aspektigi sian pudelsimilan vizaĝon konforme al siaj sentoj tiom longe, kiom la fenestroj de la biendomo de tro proksime postrigardis lin. Li tenis la sultrojn alte, la kapon mallevite kaj la longajn krurojn en ŝoviĝa irado. Nur post kelkcento da paŝoj li rigardis malantaŭen kaj ridis. Ekpaŝis tiam ree, rigardis ree malantaŭen kaj ridis ree. Tio okazis ankoraŭ trian fojon kaj pli senretene, kiam Prillup laŭ la rando de la avelujaro atingis la monteton, per kiu komenciĝis la altaĵo de Kruusimäe. Tiam li streĉis sian korpon tutlonge, serioze esplorrigardis dum longa tempo la domon, ruĝantan en la vesperruĝo, prepare grimacis kelkfoje, mordante la lipojn, kaj tiam aŭdigis tremante ion, strange similan al murmurado de erinaco. Kaj intertempe li elgorĝigis, ĉirkaŭbrakante konvulsie la lumbon:

— — Kurioze! — — Kurioze! — — Tion oni devas al ĉiuj rakonti!“

Prillup daŭrigis la paŝadon nur, post kiam li estis tute liberiginta de la ridatako, kaj irante li ĉirkaŭrigardis per malsekaj okuloj, ĉu ne vidiĝas iu, ĉe kiu komenci. Sed la vojo estis senhoma, antaŭe kaj malantaŭe. En la malpura haraĵo, etendiganta ĝis la vangostoj, restis postsigne de la granda ridado ankoraŭ longtempe ridvibrado, ĝis kiam iu nova penso forigis ĝin por kelka tempo.

— — Eble li trompis? — — Volis nur iom moki? — — Nu, ke tre juna por la maljunulaĉo? — — Kion ŝi respondos? — — Ĉu la urseto, kiam ŝi aŭdos — — ?

Li rigardis malsupren sur la pastlopintojn¹ kun flanken klinita kapo kaj rememorigis al si denove ĉion, kion li estis aŭdinta aŭ rimarkinta. Evidente li faris decidon, kiu fortimigis fulme aperintan penson, ĉar jam ree lia haroza vizaĝo gaje ekbrilis. Subite li enigis la fingrojn en la barbon, levis la malsekan tufon sub la nazon kaj sonspire flaradis — — „Hm — — hm — — diabla drinkaĵo. Mem kvazaŭ siropiĝo, sed jen, kiel rondturniĝas sub la koro!“ — Prillup estis en la kontoro trinkinta du bierglasojn da portvino kaj forgesinta viŝi la buŝon.

¹ Kamparana leda senkalkanuma piedvesto.

Dum li nun ridante iris malrapide al la pordego, kun la polekso de la dekstra mano rekte en la korkavo, kie la drinkaĵo de la mastro gaje rondturniĝadis, kaj kun firma decido en la kapo, freŝe rakonti al la unua renkontiĝonto la kuriozaĵon, aŭditan en la kontoro, por ke ankaŭ aliaj povu ridi, al li subite okazis io, kion li ne sciis klarigi al si. Li deiris de la vojo, kaj tie, kie tri izolaj krispaj pinoj kreskis sur sabla montdeklivo, tie liaj gamboj subite senfortiĝis, tiel ke li falis surdorsen tutlonge sur la vegetan herbajon.

Laktofarmo!

Prillup ekrigardis en la vesperruĝon, per larĝe malfermitaj okuloj, senmove kiel ŝtupo, kun la manoj kruce sub la kapo. La ĉielarkaĵo ardis ankoraŭ ĉiunuanco ruĝe kaj ĉiunuanco flave, iu nubmonteto meze de la arkaĵo, laŭforme kvazaŭ dukapa nigra blazonaĝlo, havis tiom brilajn konturojn, kvazaŭ birdo starus antaŭ malfermaĵo, de kie la brilo de l' ĉielregno lumigas ĝian dorson. Ankoraŭ aliaj ĉielbestoj alŝoviĝis de la sudo en la ardejon. Kelkaj similaj al teraj, kelkaj tute fremdaj, kaj ili ekflamis ĉe la randoj, atingante la aglon. Sed iom post iom la brilo malheliĝis, la koloroj ĉiam pli kaj pli malklariĝis, kaj la vizaĝo de Tōnu estis fine blumakula, kiel tiu de mortinto.

Sed li restis kuŝanta, ne movante sin. Laŭ la manoj kaj laŭ la kolo kuradis malgrandaj nigraj formikoj, ĉar lia kapo estis falinta proksimen al formikejo, kaj unu ĵus transkuris la barbon kaj la lipojn.

Fine tamen Prillup sentis tiklon, ekviŝis la vizaĝon de maldekstre kaj dekstre kaj sidiĝis. Tiam li svingis senpacience la manojn antaŭ la vizaĝo, kvazaŭ forpelante kulojn, kaj salte surpiediĝis. Kaj nun ree vigligis lian harozan vizaĝon io simila al la antaŭa ridado.

Sed kiam, realveninte la vojon, li ekvidis la maljunulon de Otsa iranta antaŭ si kun fasko da rastiltenilaj stangoj sur la ŝultro, li ne rapidis por atingi lin, kaj kiam Väike-Jüri-Krōöt renkontis lin sur la herbejo, Tōnu ankaŭ al ŝi havis nenion por rakonti. Li paŝis rekte al la pordego de Prillupi, tiel enpense, ke li preteriris la balancilon je distanco de unu klafto, ne rimarkante la salutojn de la knabinoj el Pajusi.

Ĉe la pordego lin renkontis la saltanta Kaaru, svingante ne nur la voston, sed la tutan duonkorpon; ĝi nudigis ridante siajn blankajn dentojn kaj bruspiris tutforte. Sed eĉ al ĝi la venanto havis nenion por rakonti, kaj la sola rekompenco estis, ke la mastro nur en la korto ekrigardis ĝin. Sed ĉi tiu daŭra alrigardado per larĝe malfermitaj okuloj kaj senmova starado

sentiĝis al Kaaru baldaŭ timigaj, tiel ke ĝi preferis malaperi en la krepusko, disŝutiĝanta en la tuta korto kvazaŭ densa cindropolvo, malakrigante la klarecon de l' konturoj kaj dikigante la figurojn.

Prillup volis jam turni sin al la domo, sed tiam li rimarkis tri grizajn figurojn sur la barilo apud la provizejo kaj iris tien. Kiel granda noktobirdo kun du idoj, unu ĉe unu, alia ĉe la alia flugilo, proksimaj unu al alia, sidis tie Mari¹ kun Juku² kaj Anni², kun bekoj, streĉitaj al la marĉo.

„Kian mirindaĵon do vi rigardadas?“ ridetas la patro.

„Ni aŭskultas, kiel la Tapu-anoj interparolas,“ Anni respondas flustre, „sed vi nur silentu!“

La maldensa varmeta aero estis efektive tiel senmove kvieti, ke de trans la marĉa ebenaĵo, de la deklivo, leviĝanta ĝis la alteco de Kruusimäe, sur kies malaltaĵo inter arbata zono nigris la vilaĝo Tapu, oni povis aŭdi homajn parolsonojn — tiel surprize, ridige klare, kvazaŭ la nevidataj parolantoj starus malantaŭ la proksima arbusto. Kvankam plejparte la interligo de la vortoj estis neklara, kvazaŭ de tempo al tempo oni kovrus ilin per kovrilo, sed aŭdiĝis ankaŭ kompreneblaj frazoj kaj vortoj, kiuj, kunigite kun la unuaj, impresis komike.

Sed la tri aŭskultantoj ial ne ridis, ĉies buŝoj kaj okuloj estis streĉ-atentaj kaj sensanĝe seriozaj, nur ke la infanoj kelkfoje alrigardis la patrinon lerneme.

Nun obtuze bruetis nevidebla veturilo, nevidebla ĉevalo bruspiris; iu tusis, kaj iu fajfis, ie blekis ŝafo, kaj ie ekbojis hundo — dube, ĉu sur la tero aŭ en la aero, ĉu efektive aŭ en sonĝo. Kaj se iufoje ĉio silentiĝis, ŝajnis, kvazaŭ ili aŭdus la pensojn de la aliaj kaj siajn proprajn. — „La manĝaĵo estas sur la tablo — ni manĝis jam,“ Mari diris, ne turnante la kapon.

„Ĉu vi do ankoraŭ ne venos?“

„Ni ja baldaŭ venos ankaŭ.“

„Nu, kia novaĵo tio estas — vi povos ja aliffoje ree —“

„Foriru do, patro — vi ĉion difektas al ni!“ diras Juku. —

Prillup estis jam en la lito, kiam ili venis, sed ankoraŭ maldorma. La infanoj restis en la ĉambro, ili dormis tie. Mari komencis ordigi la tablon en la ĉambro. Ĉu mi devas aŭ ne? Tönu ŝanceliĝis sub la litkovrilo.

La ĉambro silentiĝis, oni fermis la pordon, Mari grimpis en la liton. Nu, nun, Tönu pensis kaj jam ekridetis.

¹ La juna, dua edzino de Prillup.

² La infanoj de Prillup el la unua edzeco.

Sed subite li ekmemoris, kiel ili triope sidis sur la barilo kaj aŭskultadis la sonojn de l' vilaĝo Tapu: ia timo fermis lian buŝon. Li atendis, eble ŝi mem demandos, kion la maljunulo volis.

Sed Mari ne estas scivolema, li scias tion, kaj do li atendas sen espero. Li aŭdas ŝin oscedanta, ĝemanta kaj silentiĝanta — kun la varma dorso apud lia kokso. Kaj tiam komenciĝas samtakta, aŭdebla spirado, juna kaj dolĉa. Kaj Tönu kun sia kuriozaĵo, parolenda al ĉiuj, restas sola dum la tuta nokto. Li rulas ĝin de unu kapangulo al alia, ĝis kiam tagiĝas.

Kaj tiam li ellitiĝas kun firmiĝinta decido. Li intencas paroli, kiam estos konvena momento, kiam tiel ŝajnos, ke al la kuriozaĵo oni rilatas ne tute kiel al kuriozaĵo, sed al tia aĵo, kia ĝi estas: kuriozaĵo, se oni tion volas, sed ankaŭ ne kuriozaĵo, se oni alimaniere volas. Oni efektive povas ja ambaŭmaniere. Se ne, do ne — se jes, do jes! Kio do, se okazos tiel, sed ne alimaniere! Ĝi estu almenaŭ por rakonti. —

Kaj tiel li preterlasas la tagon, kiu ne estas konvena, kaj elektas la sekvantan, kiu ŝajnas konvena. Tio estos nome dimanĉo, tio estos ripoztago. Ripozinta homo estas prudenta homo.

Kaj kiam ili duope tagmanĝas — la infanoj jam manĝis kaj kuris al la balancilo — kaj kiam Mari estas fininta paroli pri la bovino, kiu printempe jam estis malsana kaj kiu ankoraŭ ne donas lakton, ĉar la sablo kaj la gruzo sur la paŝtejo ne taŭgas por manĝi, tiam Prillup ridetas kaj diras:

„Nu, se ni devas havi multe da lakto, faru nur, kion la bienposedanto deziras — tiam ni povos naĝi en lakto kaj ruliĝi en butero.“

Mari levas demande la okulojn, Prillup komencas murmure ridi.

„Jes, jes, tute vere, efektive — je la sankta nomo de Dio! — — Vendrede vespere — vi ja scias — — vi mem ja sciigis — —

„Nu, ke li estas fraŭlo — nek vizitas iun, nek okupas sin per pafiloj aŭ ĉevaloj — Eĉ hundon li ne posedas — ke la vesperoj estas longaj kaj enuaj — — nu, kio do tamen estus — Kaj li prenos la lakton for de Jaan kaj donos al ni —“

Mari estas serioza, ŝi rigardas iom strabe.

„La kontrakton li, bona homo, promesis tuj skribi, se nur vi (la dentoj de Tönu blankas inter la malpuraj lipharoj) — — se nur vi mem — — Kaj ankaŭ Kuru'n ni ricevos — —“

Mari prenas de sur la tablo antaŭ si manplenon da terpomŝeloj kaj ŝetas ilin en lian vizaĝon. Per la buŝo ŝi havas nenion por aldoni.

Per tio la kuriozaĵo estas finita. Unu-kaj alimaniere.

La pupiloj de Prillup malheliĝas, lia rigardo estingiĝas, en lia barbo pendas du grizaj ŝeloj.

„Vi versaĵne intencis hodiaŭ ringumi la tinon,“ la junedzino diras fine kaj leviĝas.

Ankaŭ Tōnu finas. „Jes, jes, mi ja baldaŭ ekriparos ĝin.“ Li viŝas la buŝon kaj forigas la ŝelojn el la barbo. „Diablo scias — estus necese ree veturi al la bordo por provizi sin per klupeoj! — nemaĉeblaj kaj salegaj ili estas, kaj eĉ ne estas ja multe da ili sur la fundo de la bareleto —“

„Sed ili ja estas nun malgrasaj.“

„Malgrasaj certe, sed freŝa fiŝo estas tamen freŝa fiŝo.“

Prillup paŝas al la pordo, kaj antaŭ la sojlo li forte streĉas sin. Lia koro estas subite mirinde malpeza. Kaj nun ridi lirlas el lia gorĝo, freŝiga kaj klara kiel fonta akvo.

„Li idiotiĝis! — Vi ja mem vidas, ke idiotiĝis! — Ne valoras, ke vi koleru pro la malsaĝulo —“

Mari trankvile okupas sin ĉe la tablo, kun la dorso al la foriranto. Sunstrio origas ŝian nukon, la haretoj moviĝas kaj ruĝas malforte.

„Kaj mi — jen, nur hodiaŭ — nur hodiaŭ ekparolaĉis — nur ial, ŝerce — nu kio do estas — ĉu tio gravas! — Mi ja ankaŭ diris rekte al li, ke, ĉu la sinjoro rajtas ankoraŭ en maljunaĝo — — Diabla fripono tia!“ Prillup finas kaj eliras.

Ekzistas nome momentoj, kiam ne valoras atendi respondon de Mari.

Sed kiam Prillup estas jam en la korto, aŭdeblas tra la malfermita fenestro senzorga kantzumado: „Glacia iĝis vintre mar’...“

De lundo oni falĉis sur la marĉo, la herbo estis malmola kiel drato, la tuta mondo resonis pro la akriĝado de la falĉiloj. Prillup falĉis larĝarke, ĉar la brakoj ne estis multe pli mal-longaj ol la kruroj, kaj sufiĉis forto kaj ankaŭ humoro. Estis ja agrabila sento pli frue fini sian laborparton ol iu alia kaj iri hejmen — la malalta suno ankoraŭ varmigas la dorson. Vere li sentis pro tio ĝuon nur ĉi-jare, kaj la aliaj viroj ridis, ke tuj videblas, ke Prillup surhavas ankoraŭ la edziĝĉemizon sur

¹ Speco de marfiŝetoj, uzataj kiel ĉefa nutraĵo de la kamparanoj, precipe bordanoj.

la korpo (la virinoj nome sur la bona herbejo nun ne ĉeestis, ili venis poste por kunrasti la falĉaĵon). Kaj Prillup ridis responde kaj fanfaronis pri la juneco de sia junedzino kaj mokis Väike-Jüri'n, kies edzino iĝis jam maljunaspekta. Al Prillup ŝajnis, kvazaŭ li neniam ankoraŭ estas estinta tiom kontenta pri sia vivo.

Sed post kelkaj tagoj la fervoro de Tōnu malpliĝis. Li akriĝis tro ofte la falĉilon, fumis tro ofte la pipon kaj faris tre multajn paŭzojn, kiuj havis nenian videblan celon: li nur rigardadis en la arbustojn kaj en la rivereton kaj gratis la nukon. Kaj vespere li tiel malrapide iris supren al Kruusimäe, kvazaŭ anstataŭ Mari li havis hejme edzinon — sulkan kiel Krõõt de Väike-Jüri. Kaj tiam ekestis vespero, kiam li ne iris rekte hejmen, sed ŝovis la falĉilon en arbuston sur la montdekklivo kaj ŝteliris apud bariloj kaj laŭ kamplimoj al la granda alterbejo, kie inter la bienaj kampoj kaj herbejo, de l' vojo rigardate — kontraŭ la bona paŝtejo, troviĝis la bieneto Kuru.

Prillup eĉ mem ne sciis, pro kio li venis ĉi tien, sed jen la piedoj alportis. Li ŝteliris, komence kaŝite de la arbeto — la vetero estis malserena, jam krepuskiĝis — inter la herbejo kaj la kampoj de Kuru, grimpis fine trans ŝtonbarilon al la paŝtejo kaj ekkusis tie sur iu monteto sub berberiso, de kie oni povis klare vidi al la korto de la bieneto. En la mano li ankoraŭ havis fasketon da suka hordeoherbo kaj kelkajn longajn verdajn sekaltrunketojn de la kampoj de Kuru.

En la bieneta korto oni vigle movadis sin: la mastrino venis el la ĉambro kun pansako, la filino el la provizejo kun laktbareleto, la filo juneta el la draŝejo kun porfojna retsako. Ĉi ĉiujn oni lokigis sur la veturilon, ŝarĝitan per laktbareloj, kiu haltis ĉe la pordego malantaŭ grize-bruna ĉevalo. La lokigado estis klopoda, ĉar krom la buterkesto kaj la laktbareloj la spacon plenigis ankoraŭ du bovidoj, kies kapoj kun grandaj senhelpe moviĝantaj oreloj estis videblaj el la pajlaĵo trans la malantaŭa veturilrando. Kaj tiam aperis Jaan mem kun sia moviĝanta kapo, kun blanka tuko ĉirkaŭ la kolo, vestita per nigraj botoj, kun urbvetura vipo en la mano. Li sursaltis malzorge, ekkriis ankoraŭ ion ordone trans la ŝultron, kaj la veturilo ekruĝiĝis susure laŭ la sabla vojo.

Frumatene li estos en la urbo, kaj la ŝarĝo iĝos mono. La lakto, la butero, la bovidoj — dum kelkaj horoj ĉi ĉio iĝos sursuranta papero kaj tintanta argento. Kaj ĉi tiu sorĉado ripetiĝas tri-kaj kvarfoje semajne. Kaj dume kreskas hejme nutraĵo por li mem kaj nutraĵo por la besto.

Prillup postrigardas la veturilon, kun sekaltrunketo en la buŝo, kun hordeoherbo en la mano. La pajlon li maĉetadis, la herbon li frotetadis. Pro ĉi tiu lasta liaj fingroj malsekiĝis, tiom sukaj estis la haretozaj folietoj, kaj la fortaodoro penetris en lian nazon. Li leviĝis nur, kiam la veturilo estis traveturinta la du kampo-pordegojn, kaj la ĉapo de Kuru Jaan skuiĝante malaperis malantaŭ la vojkurbiĝo.

Kelkajn tagojn poste la maldika kaj alta figuro de Prillup aperis en la malfermita fenestro de la laktoĉambro. Verdire oni tiel nomis du ĉambrojn, kunigitajn per intera pordo: en la malantaŭa acidiĝis lakto, en la antaŭa oni faris buteron. Ankaŭ nun la mastrino de Kuru funkciigadis la butermaŝinon en la antaŭa ĉambro, dum Jaan malantaŭe malplenis la tinon de varma lakto. La knabinaĝa filino verŝis lakton per stofa al li en la tinetojn, kaj li lokigis ilin laŭvice sur la vastajn bretojn, kiuj estis konstruitaj kvaretaĝe sur la muro. Sinjorino Reemet kaj la alportintoj de la tino estis jam foririntaj.

„Bonan tagon, kaj prosperon!“

Jaan ne rapidas saluti tiaulon. Li rekonas Prillup'on laŭ la voĉo, pro tio li ne turnas eĉ la kapon, sed iras tiel al la bretaro, kun ambaŭ malpuraj poleksoj ĝis la artikoj en la lakto. Nur revenante, li tuŝetas per duonrigardo la ombbron, aperintan en la fenestro.

„Saluton! — Liisu, donu la malplenaĵn!“

Tõnu apogas la ŝultron al la meza fosto de la fenestro, kaj liaj okuloj glitas laŭ la unu-kaj-duetaĝaj tinetvicoj. Lia haroza vizaĝo svate ridetas.

„Jen tie — vi ja havas sufiĉe kaj sufiĉe da tiu komercaĵo!“ Li flaras aŭdeble, kun streĉita nazo: „Eĉ tiom daodoro, ke ĝi sufokas.“

„Povus pli multe esti — povus ankoraŭ pli multe esti.“

„Ĉu la vendo tiel prosperas?“

„Kial do ne! Acida lakto, somere — kaj ankoraŭ tiu de Mäeküla!“

„Do oni aĉetas ĝin tiel volonte!“

Kuru levas la nazon kaj la okulojn. La unua estas ruĝa kaj senhaŭtiganta pro sunbruligado, kaj ĝia pinto estas mirinde akra, la ambaŭ aliaj brilas blue kaj estas malgrandaj kiel linfloroj.

„Ĉu vi do ne scias ankoraŭ, ke la lakto de Mäeküla estas fama?“

„Jen!“

„En la bazaro, dio mia: nur Mäeküla kaj Mäeküla! — De Mäeküla oni ricevas lakton kiel kaĉon, sed de aliaj nur acidan akvon! — La butikistoj kompreneble ankaŭ — — Ne tiom plene, Liisu!“

„Ĉu do la bovinoj de nia nobelaĉo havas tiel bonan lakton?“

„Bovinoj? — — Edzino, ĉu vi aŭdas — — li opinias, ke la bovinoj!“ Jaan ridetas trans tineton al la buterĉambro; la rideto estas strange acideta kiel ĉiam kaj preskaŭ fermas la bluokuletojn en la larĝa, glata vizaĝo.

„Tiel multe vi, vireto, scias pri la laktista afero!“

„Nu ne, la lakto devas esti sufiĉe acida kaj densa, tion oni ja mem scias.“ Prillup korektas, „kaj ne bovinoj acidigas, sed laktisto acidigas.“

„Tion ankaŭ ni opinias.“ Jaan portas la tineton sur sian lokon, viŝas per la ĉemizmaniko la striitan veŝton kaj revenas, fosante per la fingro en la nazo. „Sed la lakto ja ne estas la ĉefajo, se mankas la orkolora argileto!“

„Nu je-es, certe ankaŭ ĝi estas fama ĉe vi?“

„Oni plendi ne povas. En la urbo oni ja ankaŭ havas langon en la buŝo. Al gesinjoraj servistinoj estas severe ordonite: buteron kun rozo — buteron kun rozo — la funtaĵoj surhavi la rozon de Mäeküla! En ĝi, laŭdire, estas nek buterlakta, nek aliaj fremdaj gustoj. — — Viuu, kiam vi verŝos kremon el la granda ujo — atentu, ĉu tie ene ne estas iu muso, vostfinajo kvazaŭ estis videbla!“

Li ŝovas la poleksojn ree en la lakton kaj turnas sin al la bretaro. Lian virine abundan postajon kaj la mallongetaĵajn femurojn kovras treege larĝa, faldita pantalone. En la hejmo la laktisto de Mäeküla portas pastlojn.

„Sed vi diras, ke estas malmulte — ĉiam ankoraŭ malmulte“ — — La rigardo de Tõnu denove interese ĉirkaŭvagas laŭ la tinetvicoj kaj tuŝetas ankaŭ la kremujojn, videblajn tra la malfermita pordo, — — „do kion alian: la posedanto alhavigu ankoraŭ mamojn.“

Kuru ne respondas dum longeta tempo; li estas trovinta en kelkaj ĉemuraj tinetoj blatojn kaj kapte eligas ilin per la fingroj; la kadavrojn, kovritajn de densa lakto, li ĵetas, murmure insultante, al la kavoza argilplanko.

„Li alhavigu — — facile direble, li alhavigu, sed ĉu oni donas bovinojn en bazaro senpage! Tiam oni aĉetu mem kaj alportu al li donace.“

„Nu, oni ja parolis, ke li kreskigos pli multe da kampherbo kaj tiam alhavigos.“

„Je-es, kara, kial ne, se oni donos al li monon el la kreditkaso de Kuru Jaan!“ La acideta rideto, kiun Jaan direktas tra la pordo al la mastrino, estas ĉi-foje pli larĝa kaj nudigas liajn blankajn sanajn kamparanajn dentojn inter la bluetaj lipoj.

„Tiam oni povus ankaŭ konstrui novajn bovinejojn kaj ĉevalejojn kaj al la biendomo alkonstrui eĉ duan etaĝon — kial ne — kial ne!“

La interparolado estas malhelpata, ĉar en la servistara loĝejo, troviĝanta malantaŭ la intermuro, subite ekploris la „lasta“ de la melkistino, kvazaŭ oni pinĉus ĝin per varmega prenilo, kaj baldaŭ kelkaj antaŭlastaj kompateme kunhurlas. Tiam enmiksiĝas ankoraŭ akresona virina voĉo, kvazaŭ batoj de longa vipo.

Prillup volus nun observi la buterfaradon kaj aparte saluti la mastrinon de Kuru. Li ĉirkaŭpaŝis la domangulon, por pli libere enrigardi en la antaŭĉambro tra la alvoja fenestro, sed trovas ĝin fermita — verŝajne pro polvo, ĉar ĉi tie oni multe preterpaŝas. Li eĉ povus jam foriri — li estas laboranta malantaŭ la ĝardeno, transveturigante fojnamasojn, kaj malŝparas nun sian laborpaŭzon —, sed ŝajne domaĝas fari tion kaj ŝteliras de apud la branĉ- kaj torfamasoj al la domflanka fenestro.

La hurlado kaj kriado malantaŭ la intermuro estas silentiĝantaj. Tõnu kubute apogas sin kaj serĉas, kion diri.

„Sed se al vi iufoje dum varma tempo — ĝi estas ja tre malsala kaj sen salakvo — se al vi de tiuj funtaĵoj kun rozo, de tiu orkolora argilo“ — la nomo ŝajnas plaĉi al Tõnu — „se al vi iu kvadrata funtaĵo okaze restas, kion vi tiam faras?“

„Mi enterigas la mortinton.“

„Vi enterigas la mortinton — —?“

„Nu je-es, enterigas — do kion alian fari kun mortinto!“

La filino ĉi tie kaj la patrino tie ekridas. Ĉi tiu aperas sur la sojlo.

„Ne atentu — tio estas tia laktista esprimo. Oni enpremas en butertinetojn, kio restas, kaj vendas ĝin pli malmultekoste kiel kuirejbuteron.“

„Do tiel, do tiel —“ nun estas la vico de Prillup por ridi — „tablobutero estas tiel longe tablobutero, ĝis kiam ĝi troviĝas en tablobutera kesto; sed, metate en butertineton, ĝi iĝas tuj kuirejbutero — —“

Kaj la mallarĝaj, pintaj ŝultroj de Tõnu tremetas, lia haroza buŝo estas larĝe malfermita; la Kuruanoj ne memoras, ĉu ili iam estas aŭdintaj lin tiel gaje ridanta.

„Nu, sed — tio ja ne okazas ofte al ĉiu,“ oni aŭdas murmuranta responde al tio Jaan'on, kaptantan el la freŝlaktuloj la unuajn muŝojn, „enterigantoj estas ĉiam tiuj, kiuj ne scipovas gardi vivanton de la morto, kiel“ — kaj Kuru nomas kelkajn tiajn el la ĉirkaŭaĵo, inter kiuj tamen ne troviĝas la laktisto de Mäeküla.

Prillup liberiĝas de la ridatako, lia voĉo estas iom malvigliĝinta, kiam li daŭrigas post reordiga intertempo:

„Nu, sed la tritagaj bovidoj, kiujn vi tien veturigas — verŝajne malsekaj ankoraŭ — — vi verŝajne ja neniom profitas je ili.“

„Kial ne?“

„Nu, la buĉisto ja vidas —“

„Kion li vidas? Sur la frunto de la bovido ne estas ja skribite, ĉu ĝi estas tri- aŭ sestaga.“

„Nu, li ja palpas per la mano.“

„Jo li palpu, sed la nombron de tagoj li tamen ne ekscios! Survoje ili renkontas vin, ĉe la drinkejo marĉandas, plejparte ebrietaj — se nur vi mem scipovas paroli! Kaj la veturelspezoj kaj bot-uzado estos tamen kompensitaj — iom por buterfarbo oni povas ankoraŭ alkalkuli.“

„Nu, ĝin la buterfaristo bezonas verŝajne trete multe?“ Tõnu turnas sin nun kun ĝentila rideto al la mastrino, staranta ankoraŭ inter la pordfojtoj.

„Vintre, ne somere; onidire inter la aĉetantoj troviĝas jam malsatantoj de tro flava butero!“

Nun komenciĝas en la laktista familio malgrandaj mastrumaj klopodoj, kiuj igas ilin ĉiujn iri en la buterfarejon, kaj la gasto dum tiu tempo foriras.

Kiam Kuru Jaan rimarkas, ke la ombro estas malaperinta de la fenestro, li prenas longtenilan kuleron kaj faras antaŭe super la kremo kaj la butero kaj malantaŭe super la lakto tri sanktecajn krucsignojn.

„Oni ne povas fidi ĉies okulon — — Estus necese ne malfermi ankaŭ tiun ĉi fenestron — —“

Sed en la piedoj de la bienetfarmulo de Kruusimäe estas io, kio altiras ilin kun mistera forto al la bona laktofarmisto.

Kiam li la sekvantan dimanĉon venas de la preĝejo kaj estas preteriranta la pordegon de Kuru, li ne hezitas longe, sed eniras. Li estas iom drinkinta, kaj pro ĉi tiu vigligo tio,

kio jam dum jaroj apartigis lin kaj liaspeculojn de la farmulo de Kuru, malpliigas je vera bagatelo. Li ja ankaŭ scias pri kio paroli, por esti satata gasto por Jaan — tion ili ĉiuj scias en la komunumo, sed precipe en Kruusimäe.

La Kuruanoj tagmanĝas. La patro kaj la patrino sidas, la filo kaj la filino staras. La rakonto de la patro al la patrino ne estas ankoraŭ finita, kaj, ĉar la gasto estas iu el Kruusimäe, la patrino kiel aŭskultanto akceptas lian saluton, dum la patro kiel parolanto daŭrigas, ne haltante:

„Karulo mia, vi ankaŭ iom pripensu, kion vi eligas el la buŝo — malfermu do ankaŭ la okulojn kaj rigardu, antaŭ kiu vi staras! Kiu almozpetas aliajn, tiu ne antaŭenŝovu la ventron kaj ne arkigu la piedojn! Do kio, se jam ĉiu trogmordetanto rajtas riproĉi vin! Vi povas dekoble pravi, sed Dio estas kreinta buŝon al vi en la vizaĝon, sed ne buŝaĉon! — Je-es, mi ankaŭ estis iam avarulaĉo — estas vere, tion mi ja ne kaŝas — sed ne tio gravas, kio estis, sed kio estas! Sed vi, kara frato, atingis tian staton, ke vi eĉ ne bezonas iradi malantaŭ la domon, vi ja tamen ne havas ion por porti tien!“

Unue subpremite ekridas la filino, tiam subpremite ekridas la filo, sed la mastrino restas serioza. En ŝia ovala vizaĝo, de kies iama koloro ankoraŭ restis kelkaj makuloj de aŭtuna ruĝo, moviĝas nur unu sulketo inter la brovoj, dum ŝia okulo ekrigardas de la kulero iom al la pordo. Sed Prillup diras:

„Nu, jen! Al kiu malsaĝulo vi tiel malkaŝe diris la veron?“

La mastro de Kuru manĝas dum iom da tempo, kun acida rideto rakontas al la edzino la finon de la malpaciĝo kaj nur tiam sciigas trans la ŝultron al la gasto la nomon de la malsaĝulo, kiu ĉi-foje estas ne iu farmbientulo aŭ kabanano el Kruusimäe, sed iu bienposedanto en la ĉefa vilaĝo de la komunumeto, kaj ne la plej mizera inter la aliaj. Aŭdante tion, Prillup levetas la ŝultrojn, kaj en liaj vangharoj disiĝas duonkaŝita brilo.

„Je-es, vi ja estas sufiĉe kreskiginta por vi muskon — al vi estis tiel destinite, — kie do restu la orkolora argilo kaj la neĝkolora kaĉo!“

Jaan manĝas ree. Sur la tablo estas pizsupo kaj porkvando. Li tranĉas per poŝtranciĉilo la blankan tremetantan lardon kaj puŝas la pecegojn inter la tranĉilo kaj la polekso en la buŝon, kies ĉirkaŭaĵo jam larĝe brilas. De post la alveno de l' gasto la viando ŝajnas al li malordinare bongusta, ĉar lia ŝmacado estas rimarkeble plifortiĝinta kaj la mieno plidolĉiginta. Kaj ŝvitgutoj sur lia malgranda monronda kalvaĵo ridetas.

„Ho, kio estas“ — mem maĉante — „kaj D'o mem scias, al kiu li ion mem disdonas — sed tion, kio estas al mi fidita, mi ja mem ne formangos“ — duongeme — „do la infanoj iam trovas —“

„Venu pli proksimen, Tõnu, kaj sidiĝu sur benketon,“ interrompas la senŝonora voĉo de l' mastrino.

Kuru turnas sin kaj alrigardas kun brilanta mentono unuafoje tutvizaĝe la gaston.

„Nu, kial li tie sidiĝu — aliĝu prefere al ni kaj ekmanĝu! — Knabo, se vi estas jam sata, krucmetu la manojn kaj foriru en angulon — manĝotablo ne estas loko por oscedi kaj ŝmaci! — Nu, Tõnu — eble vi gustumus kaj kontentiĝus je tio, kion vi trovas sur la tablo.“

„Mi ja kontentiĝus, ni en Kruusimäe tiutempe ne memoras plu, kio estas viando, bone, se iu trovas almenaŭ klupeovoston, sed jen — estu dankata pro la propono — jen — mi havas ja hejme tri infanojn, kiuj atendas bulkojn —“

„Tri? Kiu estas la tria?“ la mastrino ridetas.

„La plej granda ja! Mi eĉ ne scipovas ankoraŭ konsideri ŝin kiel edzinon, mi devas antaŭe ankoraŭ kutimi. Ne pro la aĝo ŝi ja — sed tiel pro ŝia konduto —“

„Ĉu do vi ne estas tute kontenta pri ŝi?“

„Nu ne, kontenta mi estas, mastrino, kontenta mi estas — ŝi ja faras al mi nenion malbonan, nur ke mi iufoje ne scipovas diferencigi ŝin de miaj du infanoj — kaj alifoje — ili ja ĉiuj estas tie en la arbardistrikto iom alispecaj homoj, unu ĉi tia, alia tia — iufoje mi vidas, ke mi ne komprenas bone ŝin, aŭ kiel diri — sed kontenta —“

„Venu do pli proksimen — vi ja ne havas pli multe por satigi ol nur unu stomakon,“ la mastro decidas, kaj Tõnu ne kontraŭstaras plu. „De kie vi do venas? Ĉu de la preĝejo en Kaude? Vi ja iras ordinare nudpiede tra Mädaaka.“

„Nu jes, de la preĝejo,“ Prillup sidiĝas sur la seĝon, alportitan de Villu. „Trummi-Joap antaŭ la drinkejo permesis al mi sidiĝi en la veturilon — tiam oni ne bezonas duan fojon senvestigi la piedojn.“

„Vi vizitas tute sola la preĝejon?“

„Jes, nu — la aliaj du ja ne volus postresti, se Mari irus — Dio gardu! — Sed jen, unu ne havas novan kaptukon, la alia ne havas novan ĉapon — mi ja ne povas ĉion tiel, kiel ili dezirus.“

Oni manĝas dum kelka tempo silentante. La sorbaĉadon de l' supo superas la ŝmacado de Kuru Jaan. Brandodoro estas

kelkfoje sentebila. Liisu rimarkas, ke al Prillup ne prosperas la manĝado. Liaj fingroj tremas, la rigardo ĉirkaŭvagas, kaj sur la vangoj alternas ruĝo. Impresite de l' rigardo de Liisu, li foje alrigardas la knabinon larĝokule trans la tablon, kaj ĉi tiu ne scias, ĉu la rigardo estis puna aŭ timema.

Liisu finas, krucigante la manojn, kaj kun la frato malaperas el la ĉambro.

Dum ŝi fermas la pordon, ŝia rigardo tuŝas la gaston de malantaŭe. Al ŝi ŝajnas, kvazaŭ eĉ la haroj de Prillup estus maltrankvilaj.

Sed Prillup ekparolas subite tute trankvile:

„Je-es, oni devas efektive multe klopodi pro la monda havaĵo. Ekzemple, kiel la mastro de ĉi tiu domo. Mi ja ofte estas pensinta, kien do tiu viro metos fine sian monon, se li ankoraŭ same longe laboregos!“

„Ankoraŭ same longe?“ Jaan ridetis acidete. „Mi ja ne estas freneziga! Mi ja ne estas freneziga, kara mia! Duonnokton kurbe kaŭri inter la bareletoj, la alian duonnokton kuŝaĉi kuntiriginte sur drinkejbenkoj, de jaro al jaro kvazaŭ en eterna karavano — nu, ne, fratesto! Mi volus ankaŭ meti la manojn iom sur la koksojn kaj foje konduki kiel mastro; la dungitoj laboradu ĝis laciĝo. Unu aŭ du jarojn ankoraŭ — ne pli multe — tiam mi volas la piedojn apogi al mia propra terpeco, tiam —“

„Prenu do viandon, Prillup, kial vi manĝetas tiel nerve,“ la mastrino admonas.

Sed Prillup ne aŭdas ŝin, li aŭdas nur la estontan mastron, kiu volas meti la manojn sur la koksojn kaj la piedojn apogi al propra terpeco.

„Vi do verŝajne aĉetos ian centdesatitan bieneton tie trans la rivero — neniŭ el la ĉi-tieaj ja taŭgas?“ Mem li rigardas en la telefonon kaj ĉirkaŭmovas la kuleron, kvazaŭ la pizoj ne volus eniĝi.

Jaan ne respondas tuj, li penseme rigardas la malgrandan suplageiton antaŭ si; tiam li levas la nazon, skuas la kapon kaj diras kun humila ridado:

„Kiu scias, eble mi povos aĉeti eĉ du tiajn — eble mi eĉ — kiu scias nun tiel precize — eble mi povos eĉ iun bienon — iun duonbienon aĉeti!“

Kaj la ambaŭ linfloroj de Jaan momente bluas, alrigardante la gaston.

Ties kulero haltas antaŭ la malfermiĝinta buŝo, kaj pasas iom da tempo, antaŭ ol el ĝi povas eligi obtuza „jen kiel!“

Sed al tio sekvas des pli enfaza: „Nu je-es — nu je-es — — kial do ne — kial do ne, mia kara!“ Kaj kiam li estas malpleniginta la kuleron, la mallarĝan bruston kaj la ostajn ŝultr-ojn de Prillup ekskuas laŭta, ĝoja ridado. Li rigardas de unu al la alia, kaj lia tuta survanga hardensajo ridespermas senenvian bonvolemon.

Samtempe li satiĝas. La mastrino, kies malgranda fingro ludis per paneroj, levas la okulojn kaj provas ankoraŭ proponi ion, sed Tōnu formetas la kuleron, kunmetas sian poŝtrancilon kaj kun la seĝo deiras de la tablo, preminte la manon de ili ambaŭ. La fingrojn li viŝpurigas je la malleviĝintaj tibiingo-

„Eble vi venis eĉ pro ia afero, Prillup?“ la gemastroj demandas.

„Pro afero? Ha, jes, mi estus tute forgesinta! — Mi intencas veturi kun Tiitsu Mihkel morgaŭ vespere al la fiŝbordo — por ricevi iom da freŝaĵo por Johantago — — eble ni povos ankaŭ al vi, se vi deziras —“

Sed Kuru estas antaŭ nelonge alportinta el la urbo; li alportas por si ĉiam la fiŝojn el la urbo.

„Nu jes, nu jes — — Ĉe la pordego subite memoriĝis al mi: mi eniru do kaj demandu — — Tio ja ne gravas — —“

La vetero pluvbanis sin en la sunvarmego, la paŝtejaj argilmontetoj helis tra la sunsekigita herbtavolo, kaj Prillup iris parton de la vojo kun preskaŭ fermitaj okuloj. Liaj piedoj estis malpezaĵ, la lumboj flekseblaj kaj ankaŭ la kapo ree klara kaj freŝa. Tiel li preteriris la forĝejon, la bienon, la avelujaron ĉe la tenejo, ne rimarkante, kiam. Sed kiam li proksimiĝis al la herbejpordego de Kruusimäe kaj staris ĉe la tri izolaj, krispaj pinoj, kies ombroj sur la ardanta sablaĵdeklivo etendiĝis al li kvazaŭ tri manoj kun disigitaj fingroj, tiam subite lin atakis senfortiĝo. Li sidigis ĉe la vojo sur grandan kampoŝtonon, ekkaptis la kapon inter la manojn kaj ĝemis mallaŭte.

VI.

La Johantaga mateno rigardas jam de alte en la varmegan ĉambron de Prillup, sed trovas la novgeedzojn ankoraŭ en la lito. Ĝi ne miras, ĉar de l' nokteto ĝi aŭdis, ke ili kun la infanoj estas estintaj sur la herbejo, ĝis kiam la lastaj restaĵoj de la gudrobareloj iĝis malhelruĝaj cindreroj. Ĝi ne miras, sed nur ridetas kaj leviĝas pli alten.

Dormas nur Tõnu, la junedzino maldormas. La junedzino apogas la kubuton al la pajlajkuseno, la vangon al la pugno kaj observas, kiel Tõnu dormas. Tõnu dormas surdorse, kun la manoj sur la ventro, la mentono suprenlevita, la nazo supren-igita kaj la buŝo malfermita. La brusto estas larĝe malkovrita, videbla de lia korpo, tio estas haroza, vile haroza — brusto, kolo, mentono kaj vangoj, brakoj kaj manoj. Tiu malpura harkovraĵo, mola kaj brilanta, rampanta kaj ŝoviĝanta laŭ la haŭto, nur sur la manoj malpli densa, preskaŭ nek longiĝas, nek densiĝas, eĉ kiam ĝi fariĝas makuleca barbo kaj vila hararo. La barbo finiĝas nur ĉe la vangostoj, la hararo komenciĝas jam je kelka distanco de la brovoj. Eĉ el la nazo elkreskas hartufetoj kaj unuopaj haretoj el la oreloj.

La junedzinon incitas la natura peltito de Tõnu. Ŝia rigardo vagas laŭ la brusto supren kaj malsupren, haltas sur la brakoj kaj la vizaĝo kaj vagas ree laŭ la brusto supren kaj malsupren. Kaj tiam ŝia libera mano leviĝas kaŝeme kaj glitas kelkfoje laŭ tiu brustdenseja supro, delikate kaj ŝtele, kiel timema infano karesas hundon. Kaj dum ŝi retiras la kontentigitan manon kaj ĉirkaŭrigardas en la ĉambro, el ŝia okulo elsaltas ridfajrero, ĉar ekmemoriĝis al ŝi bildo en lernolibro, kaj sur ŝiaj lipoj formiĝas flustre la vorteto „orangutango“.

Kaj subite ŝin ekkaptas deziro, pasia deziro, neretenebla deziro: ekbruligi la molan, brilantan densaĵon sur la brusto de Tõnu kaj rigardi, kiel ĝi muĝe ekbruladas kiel lastjara herbo! La alumetuĵo kun la pipo kaj la tabaksaketo estas ĉiam en la kaploko de Tõnu. — La brako de la junedzino etendiĝas kaj atingas ilin, ŝiaj okuloj brilegas. Mari daŭrigas la petoladon tiom, ke ŝi ekbruligas alumeton kaj nur atendas ankoraŭ, ĝis kiam la flameto, fandanta la fosforon, pligrandiĝos.

Sed nun moviĝas la dormanto, ŝmace movas la buŝon kaj vekiga. „Kio estas — kio estas?“ li murmuretas dormeme kaj ekviŝas per la mandorso sian ŝvitajn frunton. Liaj brunruĝaj okuloj, troviĝantaj unu proksime al la alia, serĉrigardas senkomprene, kaj al Mari ŝajnas, kvazaŭ la orbitoj, sur kies fundo ili briletas, estus lasttempe tre profundiĝintaj.

„Mi volis vin ekbruligi,“ respondas la junedzino. „Min ekbruligi — jen — kial do?“ La rigardo de Tõnu estas trovinta la manon de la edzino, inter kies fingroj ankoraŭ brulas la alumeto.

„Vi estas tiom haroza.“

Tõnu oscedas. „Ĉu vi tion nur nun, hodiaŭ ekvidis?“

„Jes.“

„Nu, kie do viaj okuloj antaŭe estis?“

„Mi ne scias.“

Tõnu ree oscedas. „Nu, ekbruligu do!“

„Nun mi jam ne volas,“ kaj Mari ĵetas la alumeton trans la ĉekapan littabulon.

„Jes, mi estas haroza — de la verto ĝis la piedfingroj kaj de ĉiuj flankoj. Mia mortinta patrino ĉiam diris: Tõnu, vi fariĝos riĉulo! En nia parencaro neniu estas haroza, tial ni ĉiuj estas malriĉaj, sed vi fariĝos riĉulo.“

„Sed vi ne fariĝis.“

Prillup estas metinta la manojn sub la kapon kaj direktinta ridetan rigardon al la plafono. La haroj ĉirkaŭ lia buŝo tremas pro rakontemo, kaj la voĉo havas revan, molan tonon.

„Ĝis hodiaŭ mi ne fariĝis. — Tiel diradis la patrino — sed la patro diradis alimaniere. La patro diris: Virinaj parolacoj! Kie oni donos al ni senpage, kaj de kiuj ni prenu! Ni ne estas viroj, kiuj emas preni — nek estis mia patro, nek mi, nek vi, infano, — ni ne havas la emon por prenado. Kelkfoje oni eĉ prenas, se io estas ĝuste antaŭ la nazo, sed, ekprenonte — oni jam vidas, ke alia forprenis, nur rezignu. Prefere jam nek deziru, nek pensu, sed vespere enlitigu vian lacan korpon kaj estu certa, ke la suno matene ree leviĝos, kaj ke tiam ĝi estos lastan fojon leviĝinta, kiam vi iun matenon movos nek la man-, nek la piedfingrojn. Klupeoj kaj pano, pipopleno da tabako kaj buŝpleno da brando — ilin Prillup'oj ĉiam havis, kaj tio ankaŭ al vi ne mankos.“

„Kion la patrino pri tio diris?“

„Nu, la patrino ja ne cedis. Se la knabo tamen estas haroza kaj preĝas al Dio, nenio estas neebla — ŝi ordonis nur fervore preĝi al Dio, kiu ja estas doninta la harojn.“

„Kion do la patro respondis?“

„Nu, la patro havis kontraŭ Dio nenion, li ja ne estis idolano. Sed unu fojon li tamen koleretis — versaĵne li estis ricevinta anstataŭ unu buŝpleno du buŝplenon da brando: ili venis ĵus de la preĝejo — nu, kaj li grumbliis, ke, kiel vi scias, kiun oni petu pro riĉiĝo, ĉu Dion aŭ diablon? Jen, ĝuste diablo onidire estas haroza, Dio ne — pri haroza Dio neniu estas aŭdinta ion! — Sed al mi li diris tute kolere: Prefere preĝu al neniu el ili, tio neniom helpas, klupeojn kaj panon vi tamen ricevos!“

Prillup ridetas, lia rigardo estas ĉiam ankoraŭ direktita al la plafono. „La maljunulo estis kelkfoje stranga.“

„Kiun vi do finfine ekkredis, ĉu la patron aŭ la patrinon?“
„Ĉu mi? Mi finfine ekkredis ilin ambaŭ.“

„Kiel do, ilin ambaŭ?“ La junedzino saltetigas la alumetujon.

„Jen vidu, Manjo — mi ja estas pensadinta kelkfoje, precipe dum mia juneco, ke mi zonu min per rimeno, puŝu la ĉapelon al la alia orelo kaj iru kaj serĉu ion alian, se aliaj trovis, eble mi trovos ankaŭ, kaj se mi havos bonŝancon, eble mi povos akiri eĉ ion pli bonan, ĉar al mi ja ankaŭ ne estas ŝovita anstataŭ nazo korno en la vizaĝon kaj anstataŭ okuloj glanoj en la kapon, mi ja tamen iom flaras kaj vidas, kaj kion miaj manoj ne scipovas tuj fari, ili povas ja lerni tion, ili ja moviĝas je la artikoj, ili ja ne estas kompaktaj, kaj ke mi nur eligu el tiuj ĉi gruzejoj kaj marĉkavoj! Jen tiel, kiel Vuti Mikhel, tie, trans la marĉo. Li scipovis iom da ĉarpentado — kion do li sciis, mem li ekkomencis, tiom scipovus eĉ mi kaj ĉiu ajn — sed jen, iun tagon li ŝovas la hakilon malantaŭ la zonon kaj ekiras! Mi tion ne kapablas. Mi nur projektas, sed ne ekiras. La sojlon mi ĝisiras, sed ne transiras. Kvazaŭ iu retenus min je vosto.“

„Do kio Mikhel fariĝis?“

„Nu, li ja fartas bone. Jam tri domojn li posedas en Kassisaba¹, unu kun vendejo. Antaŭe li vagis kaj laboris ĉe bienaj konstruaĵoj, poste en la urbo, tiam fariĝis konstru-entreprenisto — kiu scias, kiel tio sukcesis al li — kaj nun li konstruas por aliaj domojn, kaj ĉe konstruataj domoj ĉiam restas tiom da traboj kaj tabuloj, ke Miĉjo ree post iom da tempo povas por si konstrui.“

„Tiel estas ja vere malmultekoste konstrui.“

„Tion mi supozas!“ Prillup ridas murmure. „Kaj krome li estas sinjoro: observas kun la manoj en la poŝoj, kiel dungitoj laboras. — Aŭ ĉu li estas la sola, kiun mi konas. Kun iu junulo Mart mi servis en la vilaĝo ĉe la najbaroj, antaŭ ol mortis la patro. Ha, diablo — tio iĝas por mi enua, li kraĉas iun vesperon. Prefere mi iros kaj ŝtelos iun ĉevalon aŭ serĉos iun virinaĉon, havantan iom da mono en la ŝtrumpo. Kaj en Georgtago li ŝovas efektive la baskojn malantaŭ la zonon. Mi ja ne scias, kiom da ĉevaloj li estas ŝtelinta, antaŭ ol li trovis ie sur ŝtrumpo virinaĉon, sed la sama Mart posedas jam de longe en Paldiski restoracion, kaj granda ventro pendas antaŭe, sed jen, Tõnu ekkauzis anstataŭ la patro en Prillupi

¹ Antaŭurbo en Tallinn, laŭvorta traduko „katvosto“.

kaj kaŭras nun ankoraŭ ĉi tie. Tõnu estas eksaltonta, sed li ja tamen ne eksaltos.“

„Via nazo ankaŭ kvazaŭ estas eksaltonta al la ĉielo, sed baldaŭ ekkauzos sur la lipo.“ Kaj la junedzino glitas per la alumetujo laŭ la nazo de Tõnu malsupren.

„Ni povus ja ankaŭ de ĉi tie foriri, neniu ja malpermesas“ — la parolanto dum sia rakontemo eĉ ne rimarkas la tuŝadon — „aŭ ni povus eĉ ĉi tie ion komenci (la deviga bona taglaboro ja ne okupas nian tutan tempon, kaj kia pago tio estas, kion li donas pro la laboro) — se nur estus pli multe da entreprenemo en la sango. Kiel tiu Simu-Jüri en Joagu, trans la rivero. Li estis en Tapu bienfarmulo, same kiel mi ĉi tie. Antaŭ dek du — dek tri jaroj li subite komencas brokanti per pomoj kaj beroj — komence tre modeste: vendas ilin dimanĉe sur la preĝejplaco kaj kelktage en la urbobazaro, tiom, kiom oni povas ricevi el unu bienĝardeno. Sed tiam li farmas du kaj tri kaj multajn ĝardenojn kaj komencas eksporti en Peterburgon kaj poste akaparas ankoraŭ terpomojn kaj ovojn kaj ĉion ĉiam en Peterburgon, kaj nun la maljunulo posedas belan propran bieneton ĉe la fervojo kaj daŭrigas tie la brokantadon, tiel ke plezure estas rigardi!“

„Ĉu vi envias?“

Mari estas nun ekludinta per la tabaksaketo kaj ŝvingas ĝin je la ŝnuro en la mano.

„Kial do envii aŭ — mi nur parolis pri tio. Vi demandas, ĉu mi kredas la patron aŭ la patrinon. Mi kredas la patron, ke mi ne fariĝos foriranto kaj entreprenanto, sed jen, eble ankaŭ la patrino pravas — povos ja io mem okazi, se tiel estas destinite —“

„Ha, tiel flugi en la buŝon?“

„Pro mi ĝi povas eĉ en la buŝon flugi aŭ kiel ajn, sed tamen tiel, ke jen, ĉi tie mi estas, nun vi povas min preni, ĉar por vi mi estas sendita. Ne estas bezone tiel fali el nuboj, kiel al la lamanta tajloro en la parohoj, ke juĝejo serĉas lin, ke, kial vi ne venas por akcepti viajn tri milojn, kiujn iu nekonata parenco heredis al vi en Krimeo aŭ en Kaŭkazo, — tio povas ankaŭ alimaniere okazi, tiel ke antaŭe vi vidas ĝin tra fenestro kaj poste enlasas tra pordo...“

„Sed la patrino ordonis vin preĝi al Dio — ĉu vi estas preĝinta?“

La buŝo de Prillup restas malfermita, la brunaj okuloj turnas sin for de la plafono, rigardas strabe la pendantan tabak-

saketon kaj poste kaŝas sin sub la brovoj kaj okulharoj. Nur post kelka tempo li respondas:

„Preĝejon mi ja estas vizitinta — kaj kelkfoje ankaŭ preĝdomon —“

„Jes — preĝejon kaj preĝdomon ĉiu vizitadas!“

„Nu, ĉu mi do havis ion specialan por deziri aŭ sopiri —“

„Do ĝis tiam vi kredis la patron, kaj nur lasttempe vi ekkredis la patrino?“

Tõnu levetas la ŝultrojn, ekmurmuretas kelkfoje kaj ree stelrigardas serĉe al la fumumiĝinta plafono, antaŭ ol malgranda menton-ekmovo sciigas la serĉaĵon; li respondas triumfe:

„Nu, vi estas vere stulta! — Nu, ĉu Kuru Jaan ĉiam genufleksiĝinte preĝadis al Dio dum tiuj jaroj, antaŭ ol oni donis al li la laktofarmon de Mäeküla! Jes — fajfu! Jaan komencis krucigi la manojn ĉe la manĝotablo nur, kiam li havis jam ion en la monujo, kaj kiam ĉi tio plimultiĝis, tiam li ekaranĝis ĉe si preĝadojn. Sed jen, la laktofarmo, ĝi alvenis mem — ĝi subite envenis tra la pordo. Nur iun tagon iro al la kontoro — la laktofarmo estos de post Georgtago vaka — ĉu vi volas preni — vi loĝas plej proksime al la bieno —“

„Kial do la antaŭa fordonis ĝin?“

„Li estis najbarbiena laktofarmulo kaj alprenis ankoraŭ aldone pli grandan freŝlaktofarmon — Nu, kaj Jaan — mi ne scias, ĉu li mem havis eĉ cent rublojn — eble li havis, kaj eĉ certe havis, li posedas ja la plej bonan bieneton — sed de la parencoj, de siaj propraj kaj de tiuj de la edzino, ili almoŝpetadis kaj kolektis tiom, kiom estas necese por la komenco — por la kaŭcio, por la ilaro kaj por veturilo — kaj jen strangajo: iun tagon Kuru Jaan estas laktisto, same kiel aliaj laktisto — ne, nu — malgranda diferenco estis komence tamen — mi memoras ĉion tiel klare, kvazaŭ tio estus hieraŭ okazinta.“

Sajnas, ke la rakontanto nur nun estas trovinta la veran temon. Sed ankoraŭ pli agrable estus rakonti kun pipo en la buŝo. Li etendas la manon al la kaploko, sed la pipo ne estas tie. La pipo pendas en la buŝo de Mari, en la pipkapo estas videbla freŝa tabako, kaj ŝi estas ĝuste ekbruliganta alumeton.

„Jen kiel! Nu, kial do vi maldolĉigas vian langon!“

„Mi gustumas, kia ĝi estas. Baldaŭ vi povos ricevi ĝin.“

La junedzino fumas serioze kaj enpense. La pipo iom malsuprenigas unu buŝangulon, ĉar la manoj de la sidantino ĉirkaŭprenas la genuon, ĉiu fumtiro kavigas la vangojn, kaj

ĉiam nur post kelke da tiroj sukcesas leviĝi blujaj ringoj, sed la tirsonoj estingiĝas sur la lipoj kun mallarĝa brusono.

Sed al Tõnu mankas humoro por la ridiga vidaĵo. Li restigas la manon atendantan la pipon kaj ree paroligas la buŝon. Li, kiu uzadis dum tago ne pli ol dek frazojn, parolas subite nun tiel, ke en la buŝanguloj aperas saŭmo. Kaj kiam la pipo estas transdonita al li, lin tute ne malhelpas, ke ĝi post kelkaj tiroj estingiĝas.

„Li, stultulo, komence iradis ja al la bazaro piedvestite per pastloj. Oni rigardis, rigardis — de kie do ekaperis tia urspiedulo — honte al nia profesio kaj klaso antaŭ la tuta urbo! — Kaj jen — oni komplete interkonsentas — la laktisto de la bieno Kaikna rakontis tion poste en drinkejo al Kulbi Madis, kaj tiam ni ĉiuj eksciis — jes, oni komplete interkonsentas, kaj iun tagon en la bazaro dum la plej bona vendotempo aperas delegacio al Jaan, kun malnovaj botoj en la mano — bone riparitaj, eĉ kun kalkanumferaj. — Tre ĝentile kaj respektive — oni eĉ riverencas — ni eksciis, ke la tre estimata kolego havas hodiaŭ naskiĝtagon, kaj ni petas, ke vi akceptu ankaŭ de ni malgrandan donacon. — Jaĉjo ne sukcesas eĉ malfermi la buŝon, kiam li jam sidas sur la veturilrando: la pastloj estas deprenataj kaj la botoj surmetataj! Multe da homoj kompreneble ĉirkaŭe — diablo, kiom da ridado kaj bruo! —

„Nu, li ja ne restigis la donacon por si, post bazartempo li ĵetis ĝin en ies veturilon. Sed jen, sekvontfoje — Jaan havis jam botojn! Botaĉoj ili ja estas, sed per betula gudro nigritaj ĝissupre. Kaj tute nigraj botoj ekaperis poste —

„Sed ne nur la botoj faris el li decaspektan laktiston. Komence oni ankoraŭ trovis mankojn. Alian tagon ree: du viroj amike ekkaptas lin unu sub unu, alia sub la alia brako — ni iru, ni pagos! Jaan opinias, ke en la drinkejon malantaŭ la urbdomo. Sed apud la drinkejo estas frizisto — ili iras tien, kaj la haroj de Jaan estas plimallongigataj! —

„Nu, estis komence kiel ajn, sed ne pasis ankoraŭ eĉ du jaroj, kiam la nazo de Jaan jam komencis leviĝi kaj la kapo skuĝi. Ĉiam pli kaj pli bone. Baldaŭ ni plu ne estis homoj, nur homaj haŭtoj, nur almoŝuloj, kaj mizeruloj, kaj sentaŭguloj. Kaj Jaan ektrovis ĉiam pli kaj pli multe da ili, kaj finfine preskaŭ eĉ ne restis aliaj homoj en la komunumo, nek en la nia, nek en la aliaj ĉirkaŭe. Kaj de post tiu tempo en la drinkejoj apud la soŝeo ne aŭdiĝas aliaj diroj ol: Kuru Jaan havas monon —“

„Jes, mi havas monon!“ imitas Mari per kantanta voĉo.
„Nu jes, nu jes — ankaŭ vi estas jam aŭdinta — nu, oni ja imitaĉas malantaŭ lia dorso —“

„Je-es, mi ne povas mem ja ĉion formangi — do la infano trovos!“ la junedzino diras, kapskuante, samtone kiel Jaan.

„Jen kian bonan memoron vi havas, he, he,“ kaj Prillup ektuŝas la ŝultron de la edzino, — „kaj kiel lerte li scias ĉiam direkti la parolon al la sama temo, ĉiam al la sama temo — direkti la ekparoli pri geotrupo, aŭ pri preĝejkoko, aŭ pri erpilo povas ekparoli pri geotrupo, aŭ pri preĝejkoko, aŭ pri erpilo — finfine vi tamen alvenas al la monujo de Kuru, kaj se vi estas tiom prudenta, ke vi mem direktas la parolon al ĝi, li tute forgesas, kiu vi, mizerulo, estas, kaj iufoje eĉ faras bonon al vi.“

Prillup puŝas la malvarman pipon en la alian buŝangulon, la rando de lia maldekstra okulo tremetas kaŝe, la piedfingroj, videblaj de sub la litkovrilo, estas maltrankvilaj, kaj kiam li poste daŭrigas, la vortoj ŝajnas veni el la brusto.

„Sed ni diru: li estas prava. Li ja ne parolas senkaŭze, li havas kaŭzon. Kaj se iu havas kaŭzon — provu fari al li ion. Silentigu la kokinon, kiam ĝi estas ovuminta kaj klukas. Kion signifas, ke rato en sia truo priridas katon — rato estas rato, kaj kato estas kato — kato estas sata, rato malsata. Igu kato, se vi ne volas esti rato, sed tiel longe vi priridas pro envio la katon, ĝis kiam vi mem ankoraŭ ne estas kato, kaj la kato spite saltetas antaŭ vin, vidante vian envion. Ĉiuj volus ja esti Kuru Jaan'oj kaj same klukadi en la drinkejo kaj antaŭ la preĝejo, sed nun silentu kaj kurbigu vian kolon antaŭ Kuru Jaan! — Jen, eĉ la drinkejmaŝtoj ĉe la ŝoseo de l' preĝejo al la urbo: de li ili ja ion konsiderindan ne ricevas — li preskaŭ neniom trinkas — botelon da mielakvo aŭ brando, jen ĉio — eĉ ne estas fumanto, veturadas kiel virino — sed jen, se li tamen enpaŝas — oni aŭdas nur: Mäeküla kaj Mäeküla! Forgesitaj estas la pastloj kaj longaj hubulharoj —“

Mari estas dume kaptinta muŝojn sur la litkovrilo, kolektante ilin en sia maldekstra mano; turnante la kapon, ŝi rimarkas la brunajn okulojn de la silentiĝinta parolanto, direktitajn al ŝi preskaŭ turmentesprime. Ŝi liberigas la kaptitojn kaj ĉesigas la kaptadon.

„Nu, kaj plu?“

Tõnu ne daŭrigas tuj. Li gratas per la pinto de la piptubo sian harozan vangon ĉi tie kaj tie, reĵetas tiam brue la pipon al la kaploko de la lito kaj glutas unu fojon per la alten leviganta laringo. Kaj nun eĉ lia voĉo ŝajnas raŭka kaj la

vortoj elpuŝitaj, kvankam la frazo estas dirata kun indifereanta trankvileco:

„Nenio grava plu — Kuru Jaan aĉetos baldaŭ bienon —“

„Ĉu vere!“

„Kuru Jaan estis dum naŭ jaroj laktisto kaj fariĝos nun bienposedanto. Kuru Jaan komencis pastlovestite veturadi al la bazono, sed nun li surmetos ciritajn botojn kaj veturos en kaleŝo —“

„Fanfaronas nur.“

„Li ja rajtas fanfaroni. Iu alia fanfaronus ankaŭ, se estus pri kio fanfaroni —“

„Eble li ne scipovas komputi sian monon!“

„Monon li jam scipovas komputi — sed skribajon li ne scipovas legi, kaj libron li silabas kiel infano, sed monon li jam scipovas komputi. Kaj bienoj estas ja diversgrandaj kaj diversspecaj. Li ja ne ekvolos aĉeti Kaikna'n aŭ Tappu'n aŭ Särgrave'n; ankaŭ Mäeküla'n oni povus restigi al la maljunulo kaj Viduste'n al la laktisto de Kaikna, kiu duoble pli multe estas veturaĉinta inter la urbo kaj la bieno. Sed Laiksalu kaj Mudriku — ili estas ja ankaŭ bienoj, kaj ankoraŭ aliaj estas ĉi-kaj aliflanke de la urbo, en nia lando, en Rigalando kaj en Ruslando — — — Kial vi ridas?“

„Mi ridas pri tio, kiel Kuru Jaan veturos en kaleŝo: ho, lia bedaŭrinda kapo!“

„Vi ne zorgu pri lia kapo, ĝi fartos bone, prefere atentu, ke vin en la sekvonta aŭ postsekvonta somero ne surveturu liaj kaleŝradoj!“ La manoj de Prillup estas kruce sub la kapo, li frapetadas per la piedfingroj al la ĉepieda littabulo.

„Povas ja ankaŭ esti, ke li bienon ne aĉetos, li eĉ mem ankoraŭ certe ne scias, aŭ li ekvidos ie aron da bienetoj, aĉetos ilin, kaj tiamaniere li posedos kvazaŭ bienon. Sed ni diru, ke li per la buŝo kapablas aĉeti ankoraŭ pli multe, sed la monujo permesas aĉeti nur du aŭ eble eĉ nur unu grandan bienon — kara mia, ĉu tio ne estas kompenso pro la naŭ aŭ dekjara transporta peno, li ja povos kondukti kiel sinjoro kaj lasi la edzinon kondukti kiel sinjorino, kaj tiam ili povos senpene kolekti tiom, kiom eble mankas por aĉeto de kaleŝo! — Sed vi diras, ke li fanfaronas — kiamaniere vi scias, ke li fanfaronas? Mi diras, ke li ne fanfaronas — li mem diris al mi — nur antaŭ kelkaj tagoj li diris al mi — diris en ĉesto de la edzino — kaj estas jam videble laŭ la okuloj kaj aŭdeble laŭ la voĉo — kaj ankaŭ la sinjoro ja mem diris — ĉu vi scias, tiam — diris, jes, ke la laktejo, ĝi estos ja monejo, kaj ke Jaan — —“

Sed la parolanto subite ne havas plu aŭskultanton. La junedzino ekrigardas al la fenestro: en la korto kuradas Anni kaj Juku, vestitaj nur per ĉemizoj, ilin postkuras la bojanta hundo — ili ĉiuj estas jam ellitiĝintaj! Mallonga, rapida ekriĝardo al la senlaca rakontanto, kaj ankaŭ Mari estas jam ellitiĝinta kaj en sekvonta momento for el la ĉambro, kaj kiam paĉjo Prillup finfine, allogate de la eksteraj voĉoj, turnas la rigardon tra la kontraŭe troviganta fenestreto al la korto, li ekvidas tri ĉemizulojn, fervore interbatalantajn per akvo ĉe la putotrogo, kaj saltetantan hundeton, embarasitan pro nescio, kiun el la tri partioj helpi.

Tõnu estas dum kelka tempo senmova, lia vizaĝo estas malplena je esprimo kaj, por plenigi ĉi tiun malplenecon, la oreloj aŭskultas la zumadon de la muŝoj. Muŝoj vagas sur lia haroza brusto, sur liaj harozaj brakoj kaj piedoj, en lia barbo kaj sur la brovoj — Tõnu ne malhelpas ilin. Tiam li oscedas dolore kaj voĉetante kiel pulhava hundo kaj eligas la krurojn el la lito. Kaj vestinte ilin, li eksidas en angulo apud la fenestro, apogata la kubutojn al la genuoj, prenas la kapon inter la manojn kaj zorge rigardas rekte al la planko, dum oni ekstere petole gajkrietas.

Sed subite ŝajnas al Prillup, kvazaŭ Leenu starus en la mezo de la luma kaj zumplena ĉambro. Kaj en la koro iu vejneto kvazaŭ batus bonvenige al ŝi.

Jes, Leenu — ŝi jam sciis kaj farus, kio necesas! Ŝi estis homo kun animo kaj menso!

Sed ĉu tiam oni volis ŝin.

Kaj kiel ŝi laboregis de matena krepusko ĝis nokta malumo, kaj kiel ŝi igis lin laboregi — Dio mia, jen kion ni atingis!

Kaj la koro de Tõnu pleniĝas je trankvila emocio. Jen staras Leenu — kaduka, osta, seka kiel tindro, ĉiam barakte moviĝanta kiel koleoptero, sen videbla rezulto, sed sindona, helpema, humila, atentema — ŝi estus povinta ja pli longe vivi, kial ŝi restigis la domon kaj la edzon sen helpanto!

Estas vero ja, ŝi multe grumbladis. Ŝi murmuradis kaj grumbladis de mateno ĝis vespero kun ĉiu kaj ĉiuj, kun dukaj kvarpieduloj, kun vivuloj kaj malvivaĵoj, ŝi riproĉadis kaj insultadis ŝtipojn kaj vergojn, kvazaŭ homo starus antaŭ ŝi, kaj dum la lastaj jaroj ŝajnis, kvazaŭ ŝia sulka vizaĝo estus sekiginta je spongo, de kiu senĉese gutas galo. Tio tediis, kvankam kutimado faris rezistema, des pli, ke ĉi tiu murmurado kaj grumblado okazis kviete, zume, kvazaŭ nevole kaj por si mem,

laŭ natura maniero, samkiel tabano kaj muŝo ne povas alimaniere. Sed tio tediis tamen, estas vere, eĉ la infanojn tio tediis tiom, ke ili evitadis ŝin, kiom ili nur povis, kaj Tõnu mem ne sciis alian rimedon, ol kunpremi la dentojn kaj silenti kiel ŝtupo.

Sed se nun konsideri, ke ŝi ne estis tia pro malbonvolo, ke ŝi per tio ĝuste penis fari bonon kaj esti utila al la familio, kaj se nun ankoraŭ konsideri, ke la saĝa maljunulino eble pravis, dirante, ke la unua nasko, kiu estis tiel malfacila kaj pro kiu mortis la plej aĝa fileto, kaŭzis al Leenu iun kaŝan difekton pro malbonfaraj rigardo kaj diro dum la gravedeco, tiuokaze — tiuokaze —

Kaj nova forta eksento korprema kaj vidveca trafluas la koron de Tõnu, kaj la soleco, pezanta sur lia nuko, premas lian kapon ankoraŭ pli malalten, kaj la flustranta buŝo konfesas al la polva planko antaŭ la piedoj, ke tio, kio entombiĝis kune kun Leenu, estis io propra — malgraŭ ĉio estis io propra. —

Prillup sidas ankoraŭ sur la sama loko, kiam la tri batalintoj brue kaj vikle enkuras tra la pordo. Ĉies ĉemizoj estas malsekaj, la piedoj kotkovritaj, laŭ la tibioj fluetas ankoraŭ akvostrietoj. Ili priparolas ridante kaj disputante la grandan okazaĵon kaj ĝiajn postsignojn sur sia eksteraĵo, atentis nur malmulte la dommastron kiel nekompetentulon pri tiaj aferoj kaj disiĝas nur, kiam Mari, surmetante la jupon, memorigas al la du aliaj, ke ili ankaŭ iom pli vestu sin. Sed Mari mem komencas antaŭ speguleto kombi per hejmfarita peĉbroso siajn taŭzittajn krispajn harojn.

Io estas subite ŝanĝiĝinta, sentiĝas al Tõnu apud la fenestro.

Kiam ili venis tiel trio, saltetante kiel tri petolemaj ĉevalidoj — kiel juna ĉevalo kun du ĉevalidoj — io enfluis en la ĉambron kaj en la bruston, kio forigis ĉion antaŭan.

Tiel estas pli bone — tiel estas tamen pli bone — tiel estas, verdire, multe pli bone! —

Kaj tio eĉ ne bezonus aliĝi — ne, kial — se ne, do ne!

Kaj tio eĉ ne devus aliĝi — la rigardo de Prillup glitas malsupren laŭ la figuro de la harkombantino kaj ree supren — eĉ ne devus — eĉ ne devus —

Li subite stariĝas, proksimiĝas ridetante al la anstataŭantino de Leenu, volus ion diri, ion fari, sed ne scias fari ion alian, ol tuŝi per fingro ŝian kolon kaj aŭdigi per la lango kaj palato sonon, similan al tiu, per kiu gaja mastro karesas ŝian belaspektan junan ĉevalon.

La noktoj plilongiĝis malrapide, sed al Tõnu Prillup tio ne utilis, ĉar li dormis malbone. La dormo evitadis lin, kaj timigaj sonĝoj difektadis eĉ tion, kio estis. Pri li, kiu ordinare dormis kiel ŝtipa, Mari nun ripete diradis, ke li endorme murmuris kaj eĉ parolas. Foje li estas provinta plori kaj alifoje eĉ kanti.

Vidita sonĝo estis plej ofte tiel malklara, ke la sonĝinto memoris nenion krom la sento, ke li estis iamaniere embarasita. Sed tio, kio iufoje enmemorigis, ŝajnis al la menso tiel absurda, ke ĝi baldaŭ forgesiĝis.

Tamen iun nokton Tõnu havis sonĝon, kiun li ne forgesis kaj en kiu estis ankaŭ nenio embarasa. Juna foko grimpis trans la ĉepiedan littabulon en la liton kaj sidiĝis sur Tõnu. Ĝi alrigardadis lin seninterrompe, en la okuloj kaj ĉirkaŭ la buŝo estis amikeca rideto.

„Kial vi rigardadas min?“ Tõnu demandis kaj karesis ĝiajn kapon kaj mentonon, kiuj estis molaj kiel lipo de ĉevalido; la besto certe scipovis paroli, ĝi havis tian aspekton.

„Mi rigardas, kia viro do vi estas!“ la foko respondis per iom grasa, sed tamen klara voĉo.

„Kio do mankas al mi?“

„Kio mankas al vi?“ La foko kurbigis strange la kolon.

„Kia viro, kiu ne povas obeigi sian edzinon!“

„Tiel, — kion do mi faru laŭ via opinio?“

„Bati ŝin, karulo, bati ŝin!“

Ĝi pinĉis per unu piedo la nazon de Tõnu, per la alia ĝi karesis la vangon de l'junedzino, ridetis bonkore kaj elsaltis el la lito.

„Kien do vi mem nun iros?“

„Ha,“ aŭdiĝis jam de neproksime el la nevideblo, „mi nur vagadas en la mondo kaj donas bonajn konsilojn al la mal-kuraĝuloj.“

Tõnu ridis, vekigante: la parolanta buŝo de la besto, ĝia rigardo, ĉiuj ĝiaj faroj kaj konduto ŝajnis tute strangaj, sed tamen ĝi impresis tiel, kvazaŭ Tõnu estus renkontinta iun realan estaĵon.

Kaj ĉi estaĵon li ne povis forgesi, nek ĝian aspekton, nek ĝiajn vortojn, ĉiam ree ĝi ekaperadis antaŭ li kaj ripetadis sian komikan parolon.

Kaj fine la parolo ne estis plu komika, nek la estaĵo plu fokeca, ne, sed Tõnu plikuraĝiĝis rilate al la edzino, ĉar la

konsilo pruviĝis prudenta — tiel prudenta, kvazaŭ Tõnu mem estus elpensinta ĝin.

Tamen la unuaj provoj malsukcesis. La edzino havis tro brilantajn okulojn. Sub ilia brila rigardo ŝajnis al Tõnu, kvazaŭ oni pikus fingron en lian laringon. Sed li sciis, kion fari. Kaj kiam li iun vesperon, kun tabakpakajeto sub la brako, venis de la turo, surhavanta kokon¹, tiam li estis armita kontraŭ la brilaj okuloj.

La ekparolado tuj sukcesis.

Se li, bedaŭrinda viro, estus sciinta, ke li edziĝas je tia afektulino! En la domo regas ĉie malordo, la malmulta kremo troacidiĝas, la kokinoj ovumas nesciate kie ajn, la maltaĉerpilo ŝimas, nek la edzo nek la infanoj havas plu purajn vestojn — la mastrino ĝojkrias kun geknabaĉoj ĉe la balancilo! La edzo revenas malsata hejmen, — la pordo estas ŝlosita, kaj li devas iri por serĉi la edzinon kaj hejmenigi ŝin de la balancilo!

La junedzino vidas, divenas kaj silentas.

Li, bonulo, estas jam sufiĉe devinta indulge malatenti kaj multon toleri, kiukaze iu alia estus jam delonge koleriĝinta; li estas dirinta nenion vorton pri la korto, kie malpuraĵo jam superas hom-altecon, nek pri la bovino, kiu en la stalo dronas en sterko, nek pri la maltaĵujo, kiu Dio scias kiam estis lastfoje vaporumita —

Tõnu trinkas el la ĉerpilo kaj elkraĉas ĉion sur la plankon — aĉaĵo, vere aĉaĵo!

— Sed ŝi ne imagu — eĉ la plej longa ŝnurego havas finon, ankaŭ la pacienco-ŝnurego de Tõnu. Kaj tiam povas facile okazi, ke ĉi ŝnuregfinajo eksvingiĝos, kolere eksvingiĝos! — Se tio estus ankoraŭ homo, kiu penas kelkrilate esti laŭ plaĉo de la edzo, kelkiam ankaŭ afabla kaj obeema, kiam la edzo petas, kaj la vivo postulas. Jen nun la bona afero. Ŝi ne volas! Kial ne volas? Demandu! Nenian pretekston ŝi havas. Nura spiteco kaj obstineco. Nur por superi la edzon! Malprofiton ŝi ne atentis! — Pratempe ĉiuj jupulinoj apartenis al biensinjoro, li prenis, kiun li deziris, kaj neniu kontraŭstaris, eĉ junedzino apartenis antaŭe al li kaj nur poste al sia edzo, kaj neniu povis elekti, ĉu la biensinjoro estas juna aŭ maljuna, bela aŭ malbela. Sed nia Mari fieraĉas — ne taŭgas la nobelo de Mäeküla por ŝi, devus esti iu bela kaj juna generalo!

¹ Preĝeja turo. Ĉe la preĝejoj kutime troviĝis drinkejo.

Tõnu haltas kaj atendas, sed la ĵunedzino daŭrigas silenti. Tio efikas je Tõnu, kiel kontraŭhara kareso je hundo.

„Se ŝi almenaŭ malfermus la buŝon kaj malkaŝus siajn stultaĵojn! Tiam oni fine povus ekscii, kia aĉulino ŝi efektive estas! Se ŝi venus kaj dirus: mi timas pekon. Sed kia diabla peko tio estas, se la edzo konsentas! Ni pekas ĉiutage — serĉu tie randon kaj limon! Kaj ĉu tiam la biensinjoroj estis idoloj, kiam ili ekposedis la kamparanajn fianĉinojn, aŭ ĉu eble la nia estas idolo? Ne, ili ĉiuj estas piaj, eĉ pli ol niaspecaj homoj, kaj ili havas la saman pastron, kiun ni havas. Kaj se tio estus peko — ĉu vi do opinias, ke Dio kaj la pastro estus tolerantaj la leĝon, ke biensinjoro povas havi cent edzinojn? — Vi kun mi ne disputu, alie vi baldaŭ malsukcesos kun via kuireja kaj draŝeja saĝeco!“

La buŝo de Tõnu estas sekiginta. Li honorigas la maltaĵojn per longa ektrinko. La ĵunedzino, apoganta sin al la litrando, pinĉetas la nazon kaj viŝas la buŝon.

„Aŭ se ŝi dirus: mi hontas aliajn homojn. Sed per tio vi prefere ne afektu. Mi ja estas jam antaŭe multfoje klariginta al vi: al kiu do vi rakontos tion, kaj vi ja ne estas malsaĝaj infanoj, kaj li ja havas ankaŭ en la urbo loĝejon! Kaj se oni fine tamen ekscios — do kio, diablo! Al kiu vi ŝuldas? Kiu rajtas al vi diri ion? Vi, malsaĝulino, havos ja monon en la poŝo! Vi perlaboros ja monon! Kiu havas pezan monujon, tiu ne bezonas ruĝiĝi, kiu enspezas per du manoj, tiun ne malhelpas famo. En la buŝon vi povos kraĉi al tia homo, kaj se vi ankoraŭ diros tion al mi — mi mortbatos la fiulon!“

La pugno de Prillup brufalas kun granda fiereco sur la tablon. Li levas la okulojn, por vidi la efikon sur la vizaĝo de la kulpulino, sed la krepusko inter ili estas jam tro densa.

Kaj tiam li daŭrigas paroli, flue paroli, gutigante sur ĉiun vorton eksciton por ŝi kaj por si mem, por proksimiĝi la momenton, kiam anstataŭ la buŝo povu ekagi la manoj. Sed kiam li estas atinginta la ĉi-koncernen minacon, kiam li estas certiginta, ke ankaŭ ĉi-riilate devas validi en la domo nur lia ordono, kaj kiam li dum tia minacado ree serĉas per siaj nebul-pezaĵoj okuloj la kulpulinon, tiam — tiam la kulpulino ne estas plu ĉe la litrando, ŝi eĉ ne estas plu en la ĉambro. Palpa iro al la duonfermita pordo provas al Tõnu, ke la okuloj tute ne trompis lin.

Dum kelka tempo la viro staras silente antaŭ la fakto, ke li nun neniel povas apliki sian povon de ordonanto. Li ŝanceliĝas, kiel rilati al la situacio. Malkonscie li eksentas: eble tiel

estas tute bone! Sed ne, kontraŭbatalas alia sento, tio estus malforteco, kaj nuna malforteco estus fina malvenko. Kaj la fortigilo, trinkita en la ĉepreĝeja drinkejo, krias: Ne cedu! Vi ja vidas, ke ŝi spitas vin! Ĉu tio estas viro, kiu ne povas estri sian edzinon! Kaj Tõnu, hezitanta antaŭ la sojlo, subite transiras la sojlon.

Ekstere estas konsiderinde pli lume, la korto estas klare videbla, sed la serĉatino ne estas tie. Prillup rigardas en la provizejon, rigardas en la draŝejon, en la stalon — ankaŭ tie ŝi ne estas. Kaj survoje en lia mano ektroviĝas bona bastonego. Ĉu eble voki? Ne. Kiu scias, kien ŝi kuros, aŭdante, ke oni postvenis ŝin.

Tiel li alvenas la brasik-ĝardenon ĉe la herbejflanko de la domo kaj ekvidas ŝin tie. Mari sidas en ĝardenangulo sur granda panforma ŝtono, kun laktkolora paleco ĉirkaŭ la kapo, kvazaŭ delikata kotona tuko, ĉar subite la luno stelrigardas malsupren tra nubfendo.

Tõnu estas jam trapasinta la barilan trairejon, kiam li ekrimarkas, ke la ĵunedzino ne estas sola. Ĉe la piedoj de Mari kaŭras Anni kaj Juku kaj atente aŭskultadas ŝin kun malfermitaj buŝoj. Versajne ŝi rakontas al ili unu el siaj kuriozaj rakontoj, pri kiuj ili tre emas petadi ŝin, iun improvizitan rakonteton pri si mem kaj pri konataj personoj, plenan je komikaj neeblaĵoj. „Mari, rakontu al ni nun ion kuriozan!“ oni ofte aŭdas ilin diri, kaj la ordinare tiel malparolema duonpatrino ne rifuzas al ili. Siajn artifaĵojn ŝi prezentas al ili kun natura seriozeco, kuniĝo, loganta el iliaj buŝoj des pli fervoran ridan laŭdon.

Mari ne estas sola — estas alimaniere, ol Tõnu supozis, kontraŭ tio li ne estas armita. Kompreneble, li ja ne hontas la infanaĉojn ĉe siaj piedoj, sed — io nova estas en la situacio! Kaj la paŝoj de Tõnu ne estas plu tiel fortaj kaj kuraĝaj, kiam li nun proksimiĝas, anstataŭ aj unu, al tri.

Kaj kiam li estas atinginta ilin, lin malhelpas ankoraŭ alia fakto. Ili ekvidas lin kun la bastonego, sed neniu montras ektimon. La granda el ili haltas en la rakontado, la malgrandaj en la ridado, ili alrigardas lin, sed restas senzorge sur la samaj lokoj. Verdire ili estas kvarope: inter Juku kaj Anni kuŝas surventre la vila Kaaru, kaj ĝi estas la sola, kiu eksentas timon. Sed ankaŭ ĝi ne forkuras, ĝi nur levigas sur la antaŭajn piedojn, movas la naztruojn kaj observas la finajon de la bastonego. Kaj per la svinganta vosto ĝi petas pardonon eĉ pro tiu ĉi malfidemo.

„Jen, li ankoraŭ maldormas! Mi opiniis, ke vi jam delonge feliĉege ronkas en la lito.“

Ĉi tiuj vortoj, senzorge diritaj kun indiferenta afableco, finfaris tion, kio ankoraŭ estis farota. La punonto estas venkita. — Li ne scias subite, por kio li staras ĉi tie kaj por kio li havas la bastonegon en la mano. Li ne scipovas legitimi sin antaŭ la kvar okulparoj, fiksrigardantaj lin, plej malmulte antaŭ la okulparo, de sub kiu oni ĵus salutis lin tiel neniige. Kaj Tōnu rigardas silentante de unu al alia kaj silentas tiam ankoraŭ dum iom da tempo, ĝis kiam li fine diras la tute senkulpan mensogon:

„Je-en, mi venis por enlitigi vin, petolemulojn, per bastono! Kia vagaĉado tio estas dum la tuta nokto apud bariloj, matene vi ne povas ellitiĝi! Rapide en la ĉambron, friponoj!“

Pro liaj botoj disflugas la nestanaro, la ĝardeno kaj la korto estas subite plenaj je rid-ekkrioj, Kaaru bojas tutforte kaj penas ekkapti per la dentoj la finajon de la bastonego, eĉ Juku ekkuraĝiĝas kaj provas fari petolajojn al la patro malantaŭ lia dorso, kaj fine la ĝojkaliko tropleniĝas, kiam la potenca malamiko, faletante pro io, brufalas je sia tuta longeco sur la kortherbajon kaj malgajnas per tio la batalon.

„Kiu scias, kial patro ne petolas kun ni ĉiuvespere?“ Anni diras al Juku, kiam ambaŭ kuŝas en la lito.

„Stultulino,“ oscedas Juku, „li ja ne ĉiun vesperon iras por alporti tabakon!“

Juku pravas, tia vespero ne ripetigas plu. Verŝajne la patro fumas malmulte, ĉar la tabako sufiĉas por longa tempo. Kaj alportinte dum preĝejtagoj tabakon, ankaŭ antaŭe li ne estas ludinta militon kun ili.

Aŭ eble li hontas pro sia malvenko? Al la infanoj ŝajnas, kvazaŭ ili neniam estus vidintaj la patron tiel pensema kaj tiel silentema homo. Ŝajnas, ke li eĉ ne rimarkas la aliajn en la domo, kaj parolado ŝajnas malagraba al li, ĉar la vortoj sekiĝas sur la langoj. Ili rimarkas ankaŭ, ke la okulsubaĵoj estas larĝe ŝvelintaj kaj strange bluas, kaj ili diras pri tio ankaŭ al Mari.

Prillup ne fartas bone, tio estas vera. Li devus iri al la biensinjoro, sed li ne iras. Mankas forto, mankas simple forto, la piedoj ne portas lin. Li atendas, eble oni sendos el la bieno inviton, tiam estos neeviteble, tiam oni devos jam iamaniere. Sed la invito ne alvenas, la korpmoro restas, de la duonkonstruita domo sur la monto suferige alspiris lin io, al kio lia malklara kapo ne scias doni nomon.

Al ĉi tio aliĝas naŭza tediĝo de la ĉiutaga laboro, de laboro en la hejmo kaj ankaŭ en la bieno, kaj la tediĝo pligrandiĝas

ĝis abomeno ĉe la penso, ke ne ekzistas savo de ĉi laboro, ke oni estas kondamnita resti tiu, kiu oni estis kaj estas — eterna baraktanto pro klupeoj kaj pano, dronanto, kiu ne dronas, sed ankaŭ ne albordigas.

Kaj ĉio, kio estis ĝis nun senco kaj esenco de lia ekzistado, la kampstrio kaj la ĉevalaĉo, laboriloj kaj la dometo, karaj al li malgraŭ ĉia mizereco, ĉio ĉi ŝvebas nun antaŭ liaj sensoj en griza vanteco, kovrita de abomenslimo de malestimo. Tōnu sentas, ke li havas plu nenion, kaj ke ankaŭ li mem estas plu nenio. Li ne komprenas, kial li movas ankoraŭ la manojn kaj la piedojn, laboras pri tio kaj ĉi tio, kial lia okulo vidas la farataĵojn kaj la menso komprenas ĝin.

Li ne estas ĉiam profundiginta en silentadon, sur la vizaĝo malvigla velkeco. Estas momentoj, kiam li subite flamiĝas pro ekscitiĝo, pro senpova ekscitiĝo, ne sciante, kial. Tiam li puŝas brutale la hundon, kiu faris al li nenion, ŝtonjetas je kokino, kiu nur klukadis, batadas sian ĉevalon, kiu ĉiel plenumis sian devon, kaj intence batas la falĉilon al ŝtono. Li bedaŭras tuj poste la faron, sed la bezono turmenti sin, post tio malice priridi sin, estas pli potenca.

Ĉirkaŭ li ŝvebas nun ĉiam stranga duonlumo kaj atmosfero, kiun li ne konas. Li bataladas kun iu neklarigebla fremdulo sekretan batalon. La tero sub liaj piedoj ne moviĝas plu, male, sentiĝas, kvazaŭ ĝi eĉ ne ekzistus, kvazaŭ la piedo paŝus, ne tuŝante ĝin. Kaj kiam li en iu pli varma tago falĉas sur sia hordeokampeto, oni subite enkapigas al li, ke la malamiko embuskas lin kun konscia intenco suprenlevi lin de la tersurfaco, supren en la aeron, kiu estas nekonata al Tōnu kaj en kiu onidire estas pli mallume, ol ĉi tie malsupre en la heleta duonlumo.

Mari, falĉanta je kelka distanco de li, vidas la edzon ekpaŝanta malantaŭen, kvazaŭ li estus rimarkinta ion timigan antaŭ la falĉilo. Tōnu reiras per mallongaj nefirmaj glitpaŝoj, ĉe kio liaj piedoj plimalproksimiĝas unu de la alia, dum la falĉilo, konvulsie tenata en la manoj, gratas per la pinto la teron. Kaj tiam li ŝanceliĝante surdorsiĝas tutlongece sur la falĉlinion.

„Ĉu ĝi foriris?“ ridetas Prillup kun gutanta vizaĝo, kiam, rekonsciigite per la malvarma putakvo, li ree malfermas la okulojn.

„Foriris.“ Mari respondas trafe-netrafe.

„Vi vidis?“

„Mi vidis.“

La junedzino levsidigas lin. Tõnu ĉirkaŭrigardas, senkomprene pensetante. Tiam li rekonas la lokon, kaj li ree ridetas, ĉi-foje iom honteme.

„Kie estas mia falĉilo?“

„Tie.“

„Nu, tiam oni devas ree —“ Sed li sukcesas stariĝi nur, helpate de Mari. Dum la leviĝo miro grandigas liajn okulojn: la forto, levanta lian korpon, ŝajnas neatendite granda.

„Ne, vi prefere enlitiĝu, mi jam sola falĉos!“

„Sensencaĵo! Kial do mi ne povas?! Atendu, mi prenos la falĉilon!“

Sed li ne prenas la falĉilon, la falĉilo estas tro malalte, tro profunde kaj, kiam li klinas sin, ĝi malleviĝas ankoraŭ pli profunden, malleviĝas kvazaŭ sur fundon de lago. Kaj tiel li paŝas, apogante sin al la edzino, en la ĉambron kaj enlitiĝas. Mari malfermas ambaŭ fenestrojn kaj la pordon, ĉar al Tõnu ŝajnas, ke la ĉambro estas mallumega.

Reirante al la kampo, ŝi revokas Anni'n el Pajusi — la alia infano estas hodiaŭ en la marĉo paŝtvice — por ke ŝi povu helpi la patron, se li bezonas ion.

„Li dormas,“ Anni venas post mallonga tempo kun sciigo. „Mi metis al li benketon kun maltajujo antaŭ la liton. Kiel li trinkegis, antaŭ ol li ekdormis!“

Kaj Anni komencas kun infana fervoro labori per rastilo malantaŭ la patrino.

„Iru, rigardu, kion li nun faras,“ Mari ordonas post kelkaj horoj.

„Mi fermis la pordon kaj la fenestrojn, li tremis, turnante sin sur la alian flankon,“ la revenantino havas por sciigi.

Kaj tiam ambaŭ laboras ĝis la subiro de la suno. Malmulte parolante, kiel konvenas ĉe serioza laboro. Precipe Anni estas konscia pri la konveneco de tia labormaniero.

Prillup dormas ankoraŭ, kiam lia malgranda familio vespere kolektiĝas en la ĉambro. Li dormas surdorse, kaj ili ĉiuj rimarkas kiel freŝaspekta estas subite lia vizaĝo. Liaj vangoj ruĝas, tio estas videbla eĉ tra la harkovraĵo, kaj la orbitoj kaj la sulkoj ĉe la buŝrandoj estas tute pleniĝintaj.

„Tõnu, eble vi volas manĝi,“ la junedzino vekas lin, kiam la manĝaĵo estas sur la tablo.

„Manĝi? Ne,“ Tõnu respondas, larĝe malfermante la okulojn. „Ĉu do manĝaĵo subtenas ies vivon, se mankas loĝejo!“

Anni kaj Juku samtempe alrigardas la duonpatrinon. Ties trankvila mano tuŝas la kapon de la deliranto.

„Mi donos al vi lakton por trinki — eble vi volas.“

Tõnu sidiĝas, maldormiĝas kaj trinkas la lakton.

Sed la febroy alialtigas dum la unua parto de la nokto kaj instigas la malsanulon paroli kelkfoje trete longe kaj vigle. Tio okazas kelkfoje ĉe malfermitaj okuloj, kiel Mari povas vidi ĉe la lumo de la neestingita lampeto, kaj ĝi ŝajnas tiam objektiva diskuto kun si mem, des pli ke la senco nur post kelka tempo refoje estas perdiganta kaj malklariganta.

Fakte la deliranto havas nur unu temon, kiun li senĉese tuŝetadas, kiun li turnadas diversmaniere jen laŭ tiu jen laŭ alia supozo, kaj tio ne estas plu lia grava afero, sed jam io, dependanta de ĝi. Prillup batalas kun zorgoj pri la bieneto, kiun li timas perdi aŭ kiun li eĉ estas jam perdinta, ĉar la biensinjoro ne permesas montri al si la langon. „En unu parto de la parolo li ankoraŭ atendas nuligon de la farmkontrakto kaj ĝemadas pro nova bieneto, kiun oni devos serĉi en fremda komunumo; en alia li estas jam forpelata, sed nenie estas trov-ebla nova loĝloko, dum la printempo proksimiĝas, kaj en tria jam estas Georgtago, oni elportas el la bieneto lian havaĵon, kaj li ne scias, kien iri kun siaj „kvar infanoj“. La kvara infano — la maldensaj dentoj de Mari ekbriletas — prezentigas al li en vindaĵoj.

La ekscititajn parolojn la deliranto akompanas per konformaj movoj. La ĉemiz-antaŭaĵo estas malbutonumita de liaj maltrankvilaj fingroj, tola saketo, pendanta je maldika ŝnuro, ekvidebliĝas sur la brusto, kaj la junedzino palpas tra la ŝtofo, kion ĝi enhavas. Mari eĉ eligas la trovitan aĵeton el la saketo, ne rimarkate de la parolanta posedanto kaj, ĉar ŝi ne vidas ĝin bone en la lita duonlumo, ŝi saltas trans la edzon el la lito kaj rigardas la trovitaĵon en la lampolumo ĉe la tablo. Ŝi rulas ĝin sur la manplato, flaras, gratetas per la ungo kaj levetas fine la ŝultrojn, ĉe kio ŝi strabe rigardas en la malgrandan fajr-okulon de la lampo. Tiam ŝi, oscedante kaj streĉiĝante, suprenlevas ambaŭ manojn kaj intencas faligi per la dekstra fingro tiun strangan piprograjnon en la ridantan buŝon, sed ŝi ne faras tion, reportas ĝin bone en la brustsaketon de Tõnu. Antaŭ la enlitiĝo ŝi ankoraŭ estingas la lampeton, kiu tamen jam estis estingiĝanta.

„Vi ne parolu plu, Tõnu, sed penu ankaŭ dormi!“

Ŝi krias tion per klara voĉo en lian oreleon.

..

Kaj li obeas.

Prillup hezitas kaj nazspiregas iomete kaj respondas tiam kun murmuro, en kiu jam sentiĝas laciĝo:

„Nu jes, nu jes, sed kien vi morgaŭ metu la kapon! Kie vi ekvidas rifugejon, tie enestas iu alia!“

„Nu, iel la afero tamen aranĝiĝos!“ Mari trumpetis en lian orelon.

„Nu jes, nu jes —“ La daŭrigo iĝas kvietiga murmuro, la mano kaj la piedo ekmoviĝetas foje, tiam en la domo regas silento, tiam oni ripozas en Prillupi, same kiel en la aliaj kabanoj en Kruusimäe.

Kaj en la fajrujo violonas grilo, en la subtegmento kikerikas koko, kaj la hundo malantaŭ la fenestro ekbojetas dormante. Sed la granda vekanto — ĝi ja leviĝos ree, kiam estos tempo por tio —

Prillup restas matene pro la postulo de la edzino en la lito, sed elitiĝas tagmeze. Ankaŭ antaŭe li ja ne estas kuŝinta malsana en la lito, li hontas ankaŭ nun montri tion al la Dia taglumo. Kaj la laboro, teda kaj malfacila — ĝi estas tamen farenda, ĝi estas tamen farenda.

El la sango de Tõnu foriĝas la febro, sed ne la zorgo el lia cerbo. Ĝi estas tie alkroĉiĝinta, mordadas kaj mordadas kaj elpremas el la buŝo de la viro plendvortojn.

Per ili li ne intencas influi je Mari. Ne, tiun ĉapitron li estas trastrekinta. Kaj la sorĉsaketon li forigis de sur la brusto, kiam li tiutagmeze kuŝis en la lito. Li eĉ batalas jam kun sia inkubo plejparte sola, sed ne povas malhelpi, ke ankaŭ dum ĉeesto de la edzino elglitas lian buŝon frazeto pri tio. Kaj tio plioftiĝas, ju pli multe da fojoj la suno estingiĝas malantaŭ la domo, kaj malgraŭ tio, ke ŝi ne partoprenas liajn timojn, ke la junedzino pro sia naiveco kredas nek tion nek ĉi tion: nek tion, ke oni forprenos de Tõnu la bieneton, nek ke li ne trovos iun novan, se tio efektive okazos.

„Li tie eĉ ne aspektas tiel,“ Mari diras. „Al li oni devos fari grandan malbonon, antaŭ ol li forpelos nin.“

Sed Tõnu ridetas malgajete. „Kion vi, karulino, vidas laŭ lia vizaĝo. Ankaŭ antaŭe oni ja estas maldunginta kaj elpelinta de tie.“

„Ja ne pro ŝerco.“

„Je-es, sed komprenu, kion la biensinjoro opinias ŝercaĵo kaj kion seriozaĵo! La biensinjoro faras, kion la biensinjoro volas.“

„Nu, la bienetoj ja ne estas malaperintaj de sur la tero! Oni ja trovos, se estos ĝusta tempo.“

„Iun mizeran oni eble trovos ie, sed kion oni faru per ĝi! Ni estas kvarope, kaj printempe verŝajne kvinope.“

„Ne, verŝajne kvarope. — Sed ekzistas ja aliaj laboroj en la mondo ol nur bienlaboro, ĉiuspecaj en kamparo kaj en urbo.“

„Dio gardu min iĝi bien- aŭ havenlaboristo — tio estos jam la plej aĉa vivrimedo!“

Nenio helpas. La kapo de Tõnu malleviĝas zorgoplene. Li bedaŭras la vortojn, jam tiel ofte uzitajn.

Kaj li troprenadas tiel, ke dimanĉe sur la preĝeja placo li serĉdemandadas la najbarojn pri nova bieneto, kvankam la kontrakto eĉ ne estas ankoraŭ nuligita. Kaj kiam li kun la bien-administranto vizitas iun malproksimetan foiron, tiam li sekrete pridemandas eĉ tie la vilaĝanojn. Kaj reveninte hejmen, li instigas la edzinon, ke ŝi iru al la arbardistrikto por informiĝi, ŝi estas kvazaŭ pli konata al ili, ĉar al fremdulo oni pri bonaj aferoj ne volonte parolas, se eĉ oni pridemandados, ĝis kiam la makzeloj elartikiĝas.“

„Ne estas necese,“ Mari respondas kun esprimo de enuo sur la vizaĝo, „iru kaj alportu vian laktokontrakton el la bieno.“

La estiĝanta silentado ne estas longedaŭra. La mano de Prillup kun brulanta alumeto, kiu estas haltinta je la distanco de du, tri koloroj de la pipokapo, finas sian vojon.

„Ho jes — kial mi ne alportus — se estus kion alporti,“ aŭdiĝas de inter la unuaj fumtiroj; la suĉantaj lipoj ridetas malserene lace.

„Vi povas kuraĝe iri, li promesis finskribi ĝin por hodiaŭ.“

La kulero de la junedzino rondmoviĝas rapide en la kremujo. De la plafono enfalas malpuraĵo, la ungo de la malgranda fingro forigas ĝin, kaj la laboro estas daŭrigata senhalte.

„Kiun do vi intencas moki?“ demandas Tõnu, kies rigardo glitas de la vizaĝo de Mari, diranta nenion, al la turniĝanta kremoj, diranta same malmulte. Kaj ankaŭ la buŝo de Mari silentas ĉi-foje.

Sed Tõnu staras kaj staras. Fine la rando de lia maldekstra okulo ekstremitas, tiam ambaŭ buŝanguloj ekstremitas kaj la koltendenoj malantaŭ ambaŭ makzeloj subite konvulsie kuntiriĝas, tiel ke la orelkonkoj moviĝas. Li volas apogi la genuon al la benketoj, sed maltrafas ĝin kaj falas surgenuen sur la plankon, rekte antaŭ la buterfarantinon. La pipo brufalas inter ilin.

„Ĉu do vi — ĉu do vi — ĉu do vi vere — — ?“
Kaj ŝajnas, kvazaŭ la vortoj dronus en la brilo, kiu radias el
liaj okuloj.

„Nu, ekiru jam, ekiru!“

„— — Kiel do — — kiam do — — ?“

La vizaĝo de Mari iom malsereniĝas. „Bone, Tõnu — lasu
min pretigi la buteron!“

Kiam Prillup eliras tra la pordo, liaj piedoj serĉas ekvilibron
por la korpo, kvazaŭ li havus grandan kaj pezan sakon sur
la dorso.

Trad. J. Temmer.

ENHAVO

	Pg.
Antaŭparolo	5
Mallonga konspekto pri la estona literaturo	
N. ANDRESEN kaj A. ORAS	7
Kelkaj notoj pri la prononcado en la estona lingvo . . .	14
Fabeloj kaj folkloro	
La kreado (trad. Helmi Dresen)	15
La estiĝo de Emajõgi (trad. Agnes Nii)	16
Koit kaj Hämarik (trad. A. R. Saul)	18
Lupo kaj vulpo dum edziĝofesto (trad. Hilda Dresen). . .	19
Belokanto (trad. Henriko Seppik)	20
Infaneco de kantisto (trad. Hilda Dresen)	23
La potenco de l' kanto (trad. A. R. Saul)	23
Triumfado de la kanto (trad. A. R. Saul)	24
Buŝoj kantas, koroj kreas (trad. A. R. Saul)	25
Kantu, buŝeto (trad. Hilda Dresen)	25
Patrina zorgo (trad. Villem Vaher)	26
Tamen devas sklavo naĝi (trad. A. R. Saul)	26
Bela ŝajnas ŝi de fore (trad. A. R. Saul)	27
Vi ne fidu fraŭlan flaton (trad. A. R. Saul)	27
Kiu konas virokoron (trad. Hilda Dresen)	28
Jen mirindaĵo! (trad. Hilda Dresen)	28
El „Kalevipoeg“ (trad. Hilda Dresen).	29
Kristjan Jaak Peterson	
Kantisto (trad. Hilda Dresen)	32
Luno (trad. Hilda Dresen).	33
Dr. Friedrich Reinhold Kreutzwald	
Al libereco (trad. Hilda Dresen)	35
Lydia Koidula	
Efemera (trad. Hilda Dresen)	37
Estona ter' kaj estona koro (trad. Hilda Dresen)	38
Kial ploras vi, floreto? (trad. Helmi Dresen)	39

Anna Haava	Pg.
Mi povas (trad. Hilda Dresen)	40
Songis mi (trad. Hilda Dresen)	41
Ho, ne povas mi silenti (trad. Hilda Dresen)	41
Ho, ni admiru! (trad. Helmi Dresen)	42
Karl Eduard Sööt	
Ombro (trad. Hilda Dresen)	43
Estus tempo! (trad. Hilda Dresen)	44
La sekalkampo (trad. Hilda Dresen)	44
August Kitzberg	
Luphomo (trad. Nikolai Karotam)	45
Juhan Liiv	
Mateno (trad. Hilda Dresen)	54
Falis foliar' (trad. Hilda Dresen)	55
Migranto (trad. Hilda Dresen)	55
Sonoro (trad. Hilda Dresen)	56
Ordinara rakonto (trad. H. Sakaria)	57
Sur Peipsi (trad. E. Lübek)	59
Jakob Liiv	
Koro de poeto (trad. Hilda Dresen)	62
Ranoj (trad. Hilda Dresen)	63
Ernst Peterson	
Helpu! (trad. J. Törn)	64
Jakob Mändmets	
La dishakita galeaso (trad. August Vellner)	78
Eduard Vilde	
Milito en Mahtra (trad. Helmi Dresen)	96
La laktisto de Mäeküla (trad. J. Temmer)	100

La kovrildeŝegnaĵo estas farita de la estona grafikisto E. Viiralt kaj prezentas ilustraĵon al unu el la fabeloj „Rakontoj el Võrumaa“ de la estona verkisto Juhan Jaik. E. Viiralt estas atentinda grafikisto, kiu atingis bonan sukceson ne nur en Estonio, sed ankaŭ ekster sia hejmlando kiel ekz. en Parizo, kie li loĝas nuntempe.